

Chico Xavier  
de la Spirito Emmanuel

# Sur la vojo al la lumo



*Kolekto Emmanuel*



feb

**Francisco Cândido Xavier**

(Mediumo)

# Sur la vojo al la lumo

Historio de la Civilizacio laŭ  
la Spiritismo

diktita de la Spirito

**EMMANUEL**

El la portugala lingvo tradukis

A. K. AFONSO COSTA

laŭ la 6<sup>a</sup> eldono



*Eldonfako de Brazilia Spiritisma Federacio*  
DEPARTAMENTO EDITORIAL e GRÁFICO  
Rua Souza Valente, 17 – CEP 20941 – 040  
Rio de Janeiro, RJ – BRAZILIO

1ª eldono

*De la 1ª ĝis la 5ª ekzempler-milo*

Kovrilo de CECCONI

65-AA; 000.5-O; 6/1974

*Copyright 1972 by*  
FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA  
**(*Brazila Spiritisma Federacio*)**  
SGAN 603 – Conjunto F– Av. L2 Norte  
Brasília – DF – Brasil – CEP 70.830-030

*Kompostado, fotolitografio kaj ofset-presado de*  
*Presejo de la Eldona Fako de FEB*  
*Rua Souza Valente, 17*  
*20941-040 – Rio-RJ – Brasil*  
*C.G.C. nº 33.644.857/0002-84 IE. nº 81.600.503*

*Impreso no Brasil*  
PRESITA EN BRAZILIO

## Tabelo de la enhavo

<i>Antaŭparolo</i> .....	11
<i>Enkonduko</i> .....	13
I — GENEZO DE LA TERO .....	17
La Rondo el la Puraj Spiritoj. — La Scienco de ĉiuj tempoj. — La unuaj tempoj de la terglobo. — Formado de la Luno. — La solidigo de la materio. — La Dia Skulptisto. — La Vorto ĉe la kreado de la Tero.	
II — LA ORGANA VIVO .....	23
La ĉelaj konstruaĵoj. — La unuaj loĝantoj de la Tero. — La pacienca ellaborado de la formoj. — La interaj formoj de la Naturo. — La timegigaj provaĵoj. — La prahomoj. — La granda transiĝo.	
III — LA RASOJ DE ADAMO .....	29
Sistemo de Kapelo. — Iu mondo en transiĝoj. — Spiritoj ekzilitaj sur la Teron. — Fiksado de la rasaj karakteroj. — Origino de la blankaj rasoj. — Kvar grandaj popoloj. — La promesoj de la Kristo.	

IV — LA EGIPTA CIVILIZACIO.....	37
La egiptoj. — La sekreta scienco. — La simbola politeismo. — La kulto por la morto kaj la metempsikozo. — La egiptoj kaj la psikaj sciencoj. — La Piramidoj. — Saviĝo.	
V — HINDUJO.....	43
La hinda organizo. — La arjoj puraj. — Ekspansiismo de la arjoj. — La mahatmoj. — La kasto. — La raĝoj kaj la parioj. — Antaŭ Jesuo.	
VI — LA HIND-EŬROPA FAMILIO.....	49
La sinsekvaj migradoj. — La neekzisto de historiaj sciigoj. — La granda virto de la eŭropaj arjoj. — Mediteraneo kaj la Norda Maro. — La nordanoj kaj la mediteraneanoj. — Origino de la racionalismo. — La admonoj de la Kristo.	
VII — LA POPOLO DE IZRAELO.....	55
Izraelo. — Moseo. — Judismo kaj Kristanismo. — Monoteismo. — Elekto de Izraelo. — La nekompreneco de la Judismo. — En la estonteco.	
VIII — LA MULTEMILJARA ĈINUJO.....	61
Ĉinujo. — Kristaliĝo de la ĉinaj pensoj. — Fo-Hi. — Konfuceo kaj Lao-Ce. — La Nirvano. — La nuna Ĉinujo. — La edifado de la Evangelio.	
IX — LA GRANDAJ RELIGIOJ DE LA PASINTECO.....	67
La unuaj religiaj organizoj. — Ankoraŭ la raso de Adamo. — La genezo de la religiaj kredoj. — La esenca unueco de la religioj. — La gradaj revelacioj. — Preparado por la Kristanismo. — La senkonfuza Kristo.	
X — GREKUJO KAJ LA MISIO DE SOKRATO.....	73
En la antaŭtempo de la plenaĝeco de la Tero. — Ateno kaj Sparto. — Necesaj provoj. — Grekujo. — Sokrato. — La disĉiploj. — Kolektiva provado de Grekujo.	
XI — ROMO.....	79
La etruska popolo. — Unuaj tempoj de Romo. — Decidigaj influoj. — Patricioj kaj	

	plebanoj. — La romana familio. — Militoj kaj la tera plenaĝeco. — En la antaŭtagoj de la Sinjoro.	
XII —	LA ALVENO DE JESUO .....	85
	La staltrago. — La Kristo kaj la esenoj. — Plenumo de la profetaĵoj de Izraelo. — La granda leciono. — La dia parolo. — Krepusko de ia civilizacio. — La ekzemplo de la Kristo.	
XIII —	LA ROMANA IMPERIO KAJ TIES DEVIOJ .....	91
	La romanaj devioj. — La misuzoj de la romanaj devioj. — La misuzoj de la aŭtoritato kaj de la povo. — La estroj de Romo. — La jarcento de Aŭgusto. — Transiĝo de ia epoko. — Kolektivaj provoj de la judoj kaj de la romanoj. — Fino de la homa vantamo.	
XIV —	LA KRISTANA EDIFADO .....	97
	La unuaj kristanoj. — La diskonigo de la Kristanismo. — La redaktado de la definitivaj tekstoj. — La misio de Paŭlo. — La Apokalipso de Johano. — Identigo de la apokalipsa besto. — La gvidilo de lumo kaj amo.	
XV —	EVOLUADO DE LA KRISTANISMO .....	105
	Penigaj romanaj kompromisoj. — Kulpoj kaj doloraj elaĉetoj de la spirita homo. — La martiroj. — La apologiistoj. — Fasto kaj prego. — Konstanteno. — Papismo.	
XVI —	LA EKLEZIO KAJ LA INVADO DE LA BARBAROJ	111
	Venroj de la Kristanismo. — Komenco de la Katolikismo. — La roma eklezio. — La detruo de la imperio. — La invado de la barbaroj. — Kialoj de la Mezepoko. — Instruanto de amo kaj virto.	
XVII —	LA MEZEPOKO .....	117
	La senditoj de Jesuo. — La Bizanca Imperio. — La Islamismo. — La militoj de la Islamo. — Karolo la Granda. — La feŭdismo. — Pravigo de la feŭdismo.	
XVIII —	LA MISUZOJ DE LA RELIGIA POVO .....	123
	Fazoj de la Katolika Eklezio. — Gre-	

	gorio VII. — La admonoj de Jesuo. — Francisko el Asizo. — La franciskanoj. — La Inkvizicio. — La verko de la papismo.	
XIX — LA KRUCMILITIROJ KAJ LA FINO DE LA MEZEPOKO .....	La unuaj krucmilitiroj. — Fino de la Krucmilitiroj. — La penado de la senditoj de la Kristo. — Intelekta mizero. — Renesanco. — Transmigrado de popoloj. — Fino de la Mezepoko.	129
XX — RENESANCO .....	Regeneraj movadoj. — Misio de Ameriko. — La nevidebla mondo kaj la koloniado de la Nova Mondo. — Apogeo de la Renesanco. — Religia Renesanco. — La Kompanio de Jesuo. — Agado de la jezuitismo.	135
XXI — TRANSIĜA EPOKO .....	La luktoj de la Reformado. — La Nevenkebla Mararmeo. — Religiaj militoj. — Francujo kaj Anglujo. — Rifuĝejo de Ameriko. — La enciklopediistoj. — Sendependeco de Ameriko.	141
XXII — LA FRANCA REVOLUCIO .....	Francujo kaj la XVIII jarcento. — Epoko de ombroj. — Kontraŭ la eksceso de la Revolucio. — La periodo da teroro. — La Konstitucio. — Napoleono Bonaparto. — Allan Kardec.	147
XXIII — LA XIX JARCENTO .....	Post la revolucio. — Politika sendependeco de Ameriko. — Allan Kardec kaj lia kunlaborantoj. — La sociaj sciencoj. — La tasko de la misiisto. — Kolektivaj provoj en Francujo. — Provoj de la Eklezio.	153
XXIV — SPIRITISMO KAJ LA GRANDAJ TRANSIĜOJ .....	Estingigo de la sklaveco. — La socialismo. — Restarigante la veron. — Dekadenco de la Katolika Eklezio. — Renovigaj luktoj. — Ameriko kaj la estonteco. — Jesuo.	159
XXV — LA EVANGELIO KAJ LA ESTONTECO .....		167
<i>Konkludo</i> .....		173

## Antaŭparolo

Miaj amikoj, Dio donu al vi pacon.

Plaĉas al mi via konversacio pri niaj laboroj. Ni esperu kaj petegu la benon de la Supro por nia klopodo. Daŭrigante niajn studojn, ni klopodu montri la efektivan pozicion de la Evangelio de la Kristo, tiom nekomprenata tie, en la mondo, de la surteraj religioj kaj filozofioj.

Ĉi tiu laboro ne devos esti historia. La historio de la mondo estas kompilita kaj farita. Nia kontribuo estos al la religia tezo, klarigante la sanktan influon de la fido kaj la spiritan superregadon en la sinsekvo de ĉiuj surteraj civilizacioj. La libro de nia frato Humberto <sup>(\*)</sup> estas la revelacio pri la kolektiva misio de ia lando; nia klopodo konsistos sole nur el rimarkoj sur la margino de la tasko de grandaj misiistoj en la mondo kaj

---

<sup>(\*)</sup> “Brazilo, Koro de la Mondo, Patrolando de la Evangelio”. – **La Eldonistoj.**



de popoloj jam malaperintaj, montrante la grandecon kaj la favorkorecon de la Dia Majstro. Ni do atendu la proksimajn tagojn, kiam ni provos realigi niajn humilajn laborplanojn. Dio donu al vi ĉiuj trankvilecon kaj sanon, kaj al ni la necesajn kapablojn. Mi tre dankas vian personan helpon ĉe la ĝenerala klopodo. Ni laboru ĉe la granda abelaro de la evoluado, ne havante alian zorgon, krom bone servadi Tiun, kiu en la Ĉielo scias pri ĉiuj niaj luktoj kaj larmoj. Ni Lin konfidu. El lia respektiginda kaj kompatema koro originas la fonto de lumo kaj vivo, de harmonio kaj paco por ĉiuj koroj. Li vin benu.

EMMANUEL.

(Mesaĝo ricevita en 17-8-1938.)

## **Enkonduko**

Dum la penigaj transiĝoj de la XX jarcento sin anoncas ĉe la malbonsigna tintado de armiloj, la spiritaj fortoj kunvenas por la grandaj rekonstruoj de la estonteco.

Alproksimiĝas la tempo, kiam la taksado de ĉiuj surteraj valoroj efektiviĝos por reapero de la energioj kreontaj iun novan mondon kaj estas kompreneble, ke ni konsideru la mistikan forton ĉe ĉiuj civilizacioj, kiuj aperis kaj malaperis, rememorante la grandajn evoluajn periodojn de la Homaro kun ĝiaj mizeraĵoj kaj ĝiaj bril-oj, por certigi la spiritajn realaĵojn super ĉiuj efemeraj fenomenoj de la materio.

Tiu klopodo de koncizeco estas tiu de la fido, postulanta sian pozicion ĉe la scienco de la homoj kaj ĉe la religioj de apartiĝo, kvazaŭ kompasoj de la efektiva saĝeco.

Antaŭ niaj spiritaj okuloj preterpasas la fantomoj de la mortintaj civilizacioj, kvazaŭ ni estas antaŭ magia

ekrano. Animoj ŝanĝas sian karnan veston en la senĉesa pasado de la jarcentoj; faras la multjarmilan konstruaĵon de la homa evoluo per siaj larmoj kaj suferoj kaj ĝis niaj oreloj venas la doloraj eĥoj de iliaj afliktiĝoj. Malaperas la unuaj homaj organizoj kaj malaperas iliaj grandaj urboj, transformiĝintaj en silentajn ostulojn. La tempo, kvazaŭ dia propraĵo de la Spirito, renovigas la maltrankvilojn kaj angorojn de ĉiu jarcento, por prilumi la vojon de la homaj spertoj. Malaperas rasoj kaj generacioj, lingvoj kaj popoloj, landoj kaj landlimoj, sciencoj kaj religioj. La dia blovo movas ĉiujn aferojn en tiu miriga ventokirilo. Tiam estiĝas la ordo, ekvilibrigante ĉiujn fenomenojn kaj movojn de nia planeda konstruaĵo, fortigante la eternajn ligilojn, kiuj kunigas la grandan familion.

Tiam oni vidas la nerompeblan fadenon, kiu subtenas la jarcentojn da surteraj spertoj, reunuigante ĉi tiujn, unujn al aliaj, ke ili konsistigu la nedetruoblan trezoron de la homa animo en ties glora suprenirado al la Senfino.

Animoj anstataŭas rasojn, kaj generacioj estas stadioj de iliaj lernado kaj profitado; la lingvoj estas esprimoformoj, aliĝantaj en la nuran esprimon de frateco kaj amo, kaj la popoloj estas disaj membroj de ia granda familio, laboranta por la definitiva starigo de sia universala komunumo. Ĝiaj plej eminentaj filoj sur la kampo de la spiritaj valoroj estas favoratoj de la Superega Justeco, leĝofaranta en la Supro por ĉiuj mondoj en la Universo, kaj povas viziti aliajn astrajn patrujojn kaj reveni sur la terglobon, por la benata klopodo en regeneraj misioj, en preĝejoj kaj en surteraj akademioj.

Sur la magia ekranon de niaj studoj, elstariĝas tiuj misiistoj, kiujn la mondo multfoje krucumis pro la nekompreno de la vulgarej homoj, sed en ĉion kaj super ĉion disradias la lumo de tiu fadeno el spiriteco, kiu diigas la materion, kunordigante la laboron de la civilizacioj, kaj, pli supre, blinde heligantan la ekranon de niaj observoj kaj studoj, ni vidas tiun fonton de eksterordinara lumo, de kie ekmoviĝas la unua geometria punkto de tiu fadeno de vivo kaj harmonio, ekvilibri-

ta la tutan Teron kaj saturanta ĝin per apoteoza movo kaj diaj helecoj.

Niaj kompatindaj okuloj ne povas vidi detalojn de tiu brilego, sed ni scias, ke la fadeno de la lumo kaj de la vivo estas en ĝiaj manoj. Ĝi estas Li, kiu subtenas ĉiujn aktivajn kaj pasivajn elementojn de la surtera ekzistado. En lia respektinda kaj kompatema koro estas la Vorto de la komenco. Iu blovo de lia volo povas renovigi ĉiujn aferojn kaj unu lia ago povas transformi la fizionomion de ĉiuj surteraj horizontoj.

La generacioj de ĉiuj tempoj forpasis kun siaj maltrankviloj kaj angoroj. La militoj malsekigis per sango la vojon de la popoloj en iliaj migradoj al la supera kono. La tronoj de reĝoj disfalis kaj la jarmilaj kronoj disrompiĝis. La potenculoj de la mondo revenis en la teatron de sia fiera vanteco, en la humila vesto de sklavoj, kaj la diktatoroj vane kunvokis kaj ankoraŭ kunvokas la popolojn sur la Tero, por murdado kaj detruado.

La determinismo de amo kaj bono estas la leĝo de la tuta Universo kaj la homa animo eliĝas el ĉiuj katastrofoj serĉe de ia pli bona vivo.

Nur Jesuo ne forpasis dum la dolora irado de la raso, celante la detruon de ĉiuj landlimoj por la universala frateco. Li estas la Lumo de la Komenco kaj en liaj favorkoraj manoj kuŝas la destinoj de la mondo. Lia grandanima koro estas la fonto de la vivo por la tuta surtera homaro. Lia mesaĝo de amo, en la Evangelio, estas la eterna parolo pri reviviĝo kaj justeco, pri frateco kaj favorkoreco. Ĉiuj homaj aferoj forpasis, ĉiuj homaj aferoj ŝanĝiĝos. Sed Li estas la Lumo de ĉiuj surteraj vivoj, neatingebla de la tempo kaj detruo.

Dum ni parolas pri la misio de la XX jarcento, rigardante la nunajn diktatorojn, kiuj faras la rolon de ekzekutistoj de homamasoj, ni devas turni niajn humilajn okulojn al la senlima favorkoreco de la Sinjoro, petegante de Li pacon kaj amon por ĉiuj koroj.

# I

## GENEZO DE LA TERO

### **La Rondo el la Puraj Spiritoj**

Diras la tradicioj en la spirita mondo, ke, por la direktado de ĉiuj fenomenoj de nia sistemo, ekzistas ia Rondo el Spiritoj Puraj kaj Elektitaj de la Superega Sinjoro de la Universo, en kies manoj kuŝas la potenco direktanta la vivon de ĉiuj planedaj kolektivoj.

Tiu Rondo el anĝelaj kaj perfektaj estuloj, el kiu Jesuo estas unu el ĝiaj diaj membroj, laŭ tio, kion ni eksciis, jam kunvenis proksime de la Tero, por solvo de aferoj nepre necesaj al la organizado kaj direktado de nia planedo, nur dufoje en la daŭro de la konataj jarmiloj.

La unua kunveno okazis tiam, kiam la terглоbo depreniĝis de la suna nebulozo, ke oni ĵetos en la Tempon kaj en la Spacon la celstangojn de nia kosmogonia sistemo kaj la ĝermojn de la vivo en la brulantan materion

de nia planedo, kaj la dua tiam, kiam oni decidis la venon de la Sinjoro sur la supraĵon de la Tero, ke Li portu al la homa familio la senmortan lecionon de sia Evangelio de amo kaj savo.

### **La Scienco de ĉiuj tempoj**

Ne estas nia intenco prezenti al la konsiderado de la studemuloj ian novan teorion pri la formiĝo de la mondo. La Scienco de ĉiuj jarcentoj estas plena de apostoloj kaj misiistoj. Ili ĉiuj siatempe estis inspirataj, spegulante la helecon de la Supro, kiun la spertoj de la Senlimo stampis sur ilian spiritan memoron, kaj eksterigante la erarojn kaj konceptojn de la epoko, en kiu ili vivis en la formo homa de sia memeco.

Kiel laborantoj de la universala progreso, ili estis portantoj de iompostiomaj revelacioj, sur la kampo de la superaj konoj de la Homaro. Inspiritaj de Dio ĉe la penigaj klopodoj por la vera civilizacio, iliaj pensoj kaj laboroj indas la respekton de ĉiuj generacioj de la Tero, eĉ tiam, kiam la modernaj evoluaj esprimoj de la kultura rondo de la homaj societoj estis devigitaj nuligi iliajn teoriojn kaj malnovajn formulojn.

Sed pli atente rigardante ĉiujn, kiuj sciis ricevi la intuicion pri la realaĵo ĉe la esploroj de la Senfino, ni peni rememori la terglobon dum ĝiaj unuaj tagoj.

### **La unuaj tempoj de la terglobo**

Kia forto superhoma povis tenadi la ekvilibron de la tera nebulozo, disigita de la centra kerno de la sistemo, donante al ĝi aron da matematikaj leĝoj, laŭ kiuj estis manifestiĝontaj ĉiuj inteligentaj kaj harmoniaj fenomenoj de ĝia vivo, dum jarmiloj da jarmiloj? Distantanta de la Suno je ĉirkaŭe 149.000.000 da kilometroj kaj moviĝanta en la spaco kun rapido de 2.500.000 da kilometroj en tago, ĉirkaŭ la granda astro de la tago, ni prezentu al ni ĝian komponaĵon en la unuaj tempoj de ĝia ekzistado kiel planedo.

Laboratorio de flamantaj materioj, la konflikto de la teraj fortoj kaj de la fizikakemiaj energioj estigas la grandiozajn konstruaĵojn de la teatro de la vivo, en la grandega fandujo, kie la temperaturo iafoje altiĝas ĝis 2.000 gradoj da varmo, kvazaŭ la inkandeska materio, enmetita en ian fornon, estus submetita al plej diversaj eksperimentoj, por ekzameno de ĝiaj kvalito kaj eblecoj por starigo de la nova lernejo de la estaĵoj. La elektraĵ malŝargoj laŭ proporcioj neniam viditaj de la homaro kaŭzas strangajn skuojn ĉe la planeda organismo, kies formiĝo okazas en la laborejoj de la Senfino.

### **Formado de la Luno**

En tiu alkalkulado de kosmaj valoraĵoj, ĉe kiuj agas servantoj el la spiritaro sub la favorkora gvidado de la Kristo, oni decidas la formadon de la tera satelito.

La laborprogramo realiĝonta en la mondo postulis la helpon de la Luno, en siaj plej malgrandaj detaloj. Ĝi estos la ankro de la tera ekvilibro dum la rivoluoj, kiuj la terglobon efektiviĝos ĉirkaŭ la Suno; la fonto de fortoj farantaj la planedan stablecon kaj, super ĉio, la naskiĝanta Tero bezonos ĝian polarizitan lumon, kies milda magnetismo decide agos sur la senfinan fenomenon de la kreado kaj reproduktado ĉe ĉiuj specoj en la variaj regnoj de la Naturo.

### **La solidiĝo de la materio**

En la granda oficino, tiam okazas la diferencigo de la peza materio, originiganta la hidrogenon.

La atmosferaj vastaĵoj estas ampleksa tenejo da elektraĵ energioj kaj vaporoj, modifantaj la torturitajn substancojn de la terglobo. Sed la malvarmo en la spaco agas sur tiun laboratorion de inkandeskaj energioj kaj la plidensiĝo de la metaloj aperas kun la apenaŭ perceptebla formiĝo de la solida terkrusto.

Tio estas la unua ĉeso de la tumultaj geologiaj skuiĝoj de la terglobo. Formiĝas la primitivaj oceanoj,

kies varmeta akvo suferas premon malfacile priskrib-eblan. La atmosfero estas ŝarĝita per akvaj vaporoj kaj la grandaj tempestoj furiozas en ĉiuj direktoj, sur la supraĵo de nia planedo, sed sur la Tero la ĥaoso estas kontrolita, kvazaŭ per sorĉo. La pejzaĝoj heliĝas, fiksante la sunlumon, kiu sin ĵetas sur tiun novan teatron de evoluado kaj vivo.

Tiam la manoj de Jesuo ripozis post longa periodo da konfuzo de la fizikaj elementoj de nia planeda organizaĵo.

### **La Dia Skulptisto**

Efektive Li estis venkinta ĉiujn teruraĵojn de la elĉenigitaj energioj; kun siaj legioj da diaj laborantoj Li aplikis la ĉizilon de sia favorkoreco al la bloko de senforma materio, kiun la Saĝeco de la Patro delokis de la Suno en liajn respektigindajn kaj kompatemajn manojn. Li ellaboris la geologian skulptaĵon de la terglobo, tajlante la benatan kaj grandiozan lernejon, en kiu lia koro devos disvastigi amon, lumon kaj justecon. Kune kun siaj armeoj el sindonaj servantoj Li estigis la regulecon de la fizikaj fenomenoj de la Tero, organizante ilian estontan ekvilibron sur bazo de simplaj korpoj el materio, kies substancan unuecon la surteraj spektroskopoj povis konstati ĉie, en la galaksia universo. Li organizis la scenejon de la vivo, kreante, sub la okuloj de Dio, tion nepre necesan por la ekzistado de la estaĵoj de la estonteco. Li faris la atmosferan premon adekvatan al la homo, antaŭ ties naskiĝo en la mondo, en la sinsekv-oj de la jarmiloj; starigis la fortocentrojn de la jonosfero kaj de la stratosfero, kie harmonias la elektraĵ fenomenoj de la Tero kaj konstruis la uzinojn de ozono sur la alteco de 40 kaj 60 kilometroj, ke ili konvene filtru la sunradiojn, regulante ilian kombinadon necesan al la subteno de la organa vivo sur la terglobo. Li determinis la direktojn de la progreso de la estonta homaro, kreante la harmonion de ĉiuj fizikaj fortoj, direktantaj la ciklon de la teraj aktivecoj.



## **La Vorto ĉe la kreado de la Tero**

La scienco de la mondo ne vidis liajn respektigindajn kaj saĝajn manojn ĉe la intimeco de la energioj, vivigantaj la tergloban organismon. Oni anstataŭigis lian providencon per la termino “naturu”, en ĉiuj esploroj kaj analizoj de la ekzistaĵaro, sed lia amo estis la Vorto de la kreado de la komenco, same kiel ĝi estas kaj estos la glora krono de ĉiuj surteraj estaĵoj en la senfina senmorteco. Kiam la elementoj de la naskiĝanta mondo sereniĝis, kiam la lumo de la Suno silente kisadis la malgajan belecon de la kontinentoj kaj de la primitivaj maroj, tiam Jesuo kunigis en la Supro la diajn interpretantojn de sia penso. Tiam vidiĝis malsupreniri sur la Teron, el la vastaĵoj de la senlimaj spacoj, ia nubo da kosmaj fortoj, kiu envolvis la ripozanta grandegan teran laboratorion.

Post kelka tempo, kiel sur la solidiĝinta krusto de nia planedo, tiel en la fundo de la oceanoj, oni povis observi la ekzistadon de ia viskoza substanco kovranta la tutan Teron.

Estis do faritaj la unuaj paŝoj sur la vojo de la organa vivo. El tiu gelateneca maso naskiĝis sur la Tero la protoplasmo kaj per ĝi Jesuo ĵetis sur la supraĵon de la mondo la sanktan ĝermon de la unuaj homoj.

## II

### LA ORGANA VIVO

#### **La ĉelaj konstruaĵoj**

Sub la favorkora kaj saĝa gvidado de la Kristo, funkciis sur la Tero multenombraj grupoj da spiritaj laboristoj.

Kiel la moderna inĝenierarto, konstruanta domon, antaŭvidas la plej malgrandajn postulojn de ĝia celo, tiel la artistoj el la spiritaro starigis la ĉelan mondon, komencante en la pratempo la konstruadon de la organaj inteligentaj formoj de la venontaj jarcentoj.

La idealo pri beleco estis ilia zorgo ekde la unuaj momentoj, rilate la ĉelkonstruojn de la originoj.

Tial, en ĉiuj tempoj, la beleco ĉe la ordo estas unu el la neforviŝeblaj trajtoj de la tuta kreitaĵaro.

La formoj en ĉiuj regnoj de la tera naturo estis esploritaj kaj antaŭviditaj. La fluidaĵoj de la vivo estis

manipulitaj, ke ili adaptiĝu al la fizikaj kondiĉoj de nia planedo, kaj la ĉelaj konstruaĵoj ensceniĝis laŭ la eblaĵoj de la tera medio, ĉio konforma al ia plano antaŭstarigita de la favorkora saĝeco de la Kristo kaj al la leĝoj de la komenco kaj de la ĝenerala elvolviĝo.

### **La unuaj loĝantoj de la Tero**

Ni diris, ke ia tavolo da gelateneca materio envolvis la terglobon laŭ ties plej internaj konturoj. Tiu senforma kaj viskoza materio estis la sankta provizejo de la semoj de la vivo. La protoplasmo estis la embrio de ĉiuj organismoj de la terglobo, kaj, se tiu materio sen difinita formo kovris la solidiĝintan kruston de nia planedo, baldaŭ la plidensiĝo de la maso originigis la aperon de la nukleo, kaj komenciĝas la unuaj manifestoj de la vivantaj estaĵoj.

La unuaj loĝantoj de la Tero, sur la materia kampo, estas la albumenoidaj ĉeloj, la amebaj kaj ĉiuj unuĉelaj organismoj, izolaj kaj liberaj, kiuj mirinde multobliĝas en la varmeta temperaturo de la oceanoj.

Kun la senĉesa fluado de la tempo, tiuj primitivaj estaĵoj moviĝas laŭlonge de la akvoj, kie ili trovas la oksigenon necesan al la subtenado de la vivo, elementon, kiun la firma tero ankoraŭ ne posedis en proporcioj teni la animalan ekzistadon iam antaŭ la grandaj vegetaĵaroj; tiuj simplaj estaĵoj montris nur unu sentumon, nome la palpado, kiu originis ĉiujn aliajn por perfektigo de la superaj organismoj.

### **La pacienca ellaborado de la formoj**

Post multe da jaroj, jen la primitivaj amebaj grupiĝas por la komuna ĉela vivo, kaj formiĝas kolonioj da infuzorioj, da poliparoj, laŭ la planoj de la definitiva konstruado de la estonteco, preparitaj en la spirita mondo, kie ĉiu progreso de la Tero havas sian genezon.

La vegetala kaj animala regnoj ŝajnas konfuzitaj en la profundoj de la oceanoj. Ne ekzistas difinitaj

formoj nek individua karaktero en tiuj socioj da infuzorioj; sed el tiuj simplaj socioj formiĝas provoj de vivo, kiuj jam prezentas karakterojn kaj rudimentojn de la superaj organismoj.

Miloj da jaroj estis necesaj al la helpantoj de Jesuo, por la servoj de pacienca ellaborado de la formoj.

Komence kunordiĝas la elementoj de nutrado kaj konservado de la ekzistado. Koro kaj bronkoj estas konkeritaj kaj poste formiĝas la ĉelaj rudimentoj de la nerva sistemo kaj de la seksorganoj, kiuj perfektiĝas kaj difiniĝas ĉe la estaĵoj.

### **La interaj formoj de la Naturo**

La atmosfero ankoraŭ estas saturita per malsekeco kaj vaporoj, kaj la solida tero estas kovrita per ŝlimo kaj neimageblaj marĉoj.

Sed la lastaj internaj skuoj de la terglobo lokalizas la centrajn varmojn de nia planedo, limigante la zonon de tiuj teraj influoj necesaj al la subtenado de la animala vivo.

Tiuj geologiaj fenomenoj starigas la geografiajn konturojn de la terglobo, difinante la kontinentojn kaj fiksante la pozicion de la oceanoj, kaj tiel aperas la grandaj vastaĵoj el firma tero, kapablaj ricevi la re-produktantajn semojn de la vivo.

La unuaj surteraj krustacoj estas ia evoluiĝo de la maraj krustacoj. Poste aperas la batrakoj, kiuj ŝanĝas la akvojn por la ŝlimecaj kaj firmaj regionoj.

En tiu evolua fazo de nia planeco, la tuta terglobo sin vestas per mirinda kaj luksa vegetaĵaro, de kies abundaj kaj senmezuraj arbaroj la nuntempaj karbomineroj estas ŝtoniĝintaj vestiĝoj.

### **La timegigaj provaĵoj**

En tiu tempo la artistoj de la kreitaĵaro inaŭguras novajn evoluajn periodojn rilate la formojn.

La naturo fariĝas granda oficino por monstraj provaĵoj. Post la rampuloj aperas la hororaj bestoj de la primitivaj eraoj.

La servantoj de la Kristo, same kiel la alĥimiistoj studentaj la kombinon de substancoj en la retorto de zorgaj observoj, ankaŭ esploras la mirandan kombinon de la ĉelaj kompleksoj, kies formiĝon ili mem planis, realigante per siaj spertoj justan taksadon de valoroj, antaŭvidante ĉiujn eblojn kaj bezonojn de la estonteco.

Ĉiuj malfacilaĵoj estis forigitaj. Malhelpaĵoj glatiĝis kaj novaj konkeroj realiĝis. La ĉela maŝino estis perfektigita, en la limo de ebleco, pro la fizikaj leĝoj de la terglobo. La tipoj adekvataj al la Tero estis elfinitaj en ĉiuj regnoj de la naturo, kaj la teratogenaj kaj strangaj fruktoj foriĝas el la laboratorio de konstantaj eksperimentoj. La pruvo pri la interveno de la spiritaj fortoj en tiu vasta kampo de agado estas la fakto, ke, dum la skorpio, ĝemelo de la maraj krustacoj, ĝis hodiaŭ tenas entute la primitivan formon, la monstraj bestoj de la foraj epokoj, kiuj venis post ĝi, malaperis por ĉiam el la surtera faŭno, kaj la muzeoj de la mondo konservas tiujn interesajn ekzemplerajn de iliaj turmentaj formoj.

### **La prahomoj**

La animala regno suferas la plej strangajn transiĝojn dum la terciaro, sub la influoj de la medio kaj pro la potenco de la leĝo pri selektado.

Sed nia sciama rezondado serĉas la efektivajn antaŭulojn de la homo en tiu grandega vastaĵo de la proscenio de la anima evoluado.

Kie estas Adamo defalinta de la paradizo? Niaj afliktitaj okuloj vane serĉas tiujn legendajn figurojn, kun celo lokalizi ilin en la Spaco kaj en la Tempo. Ni fine komprenas, ke Adamo kaj Eva estas rememoro pri la Spiritoj ekzilitaj sur la malluman pejzaĝon de la Tero, same kiel Kaino kaj Habelo estas du simboloj por la personeco de la kreitoj.

Sed ekzamenante la aferon laŭ ĝiaj realaj elvolvigoj, ni vidas la unuajn prahomojn suferantajn la perfektigajn procedojn de la naturo. En la terciaro, pri kiu ni parolas, sub la gvidado de la spiritaj rondoj vidiĝas kelkaj rasoj el antropoidoj en la malsupera Plioceno. Tiuj antropoidoj, antaŭuloj de la homo, kaj tiuj prapatroj de la simioj, kiuj ankoraŭ ekzistas en la mondo, ekevoluis de konverĝaj punktoj, kaj el tio venas la sera parenceco inter la moderna homa organismo kaj tiu de la nuna ĉimpanzo.

Sed rememorante la eminentajn naturalistojn de la lastaj tempoj, detale esplorintajn la transcendajn demandojn pri la evoluismo, ni devas klarigi, ke ne okazis ĝustadire ia “malsupreniro de sur la arbo”, en la komenco de la homa evoluo.

La spiritaj fortoj, kiuj direktas la terajn fenomenojn, sub la gvidado de la Kristo, starigis en la epoko de la granda adaptebleco de la materiaj elementoj, ian definitivan genealogion por ĉiuj specoj, en kiuj la spirita principo trovas la proceson de sia pliperfektigo, direkte al racieco.

La fiŝoj, la rampuloj, la mamuloj havis siajn fiksojn geneologiojn de disvolviĝo kaj la homo ne estos escepto al tiu ĝenerala regulo.

### **La granda transiĝo**

La antropoidoj el la kavernoj tiam grupe disiris tra la surfaco de la terglobo, en la malrapida paso de la jarcentoj, suferante la influojn de la medio kaj formante la praulojn de la estontaj rasoj laŭ ties diversaj tipoj; tamen estas realaĵo, ke la spiritaj estuloj helpis la homon de la siliko, donante al li novajn biologiajn karakterojn. Eksterordinaraj eksperimentoj estis realigitaj de la senditoj el la nevideblo. La ĵusaj esploroj de la scienco pri la tipo Neandertalo, rekonante ĝin, kiel specon de bestiginta homo, kaj aliaj interesaj eltrovoj de la Paleontologio, rilate la fosilian homon, estas pruvo pri la biologiaj eksperimentoj, kiujn faris la senditoj de

Jesuo ĝis tiam, kiam fiksiĝis ĉe la “primato” la proksimaj karakteroj de la estonta homo.

La jarcentoj tiris sian vualon de penigaj eksperimentoj sur la frunton de tiuj estaĵoj kun longaj brakoj kaj densaj haroj, sed iam la legioj el la nevideblo faris definitivan transiĝon ĉe la antaŭekzistanta perispirita korpo de la primitivaj homoj, en la astraj regionoj kaj en certaj intertempoj de iliaj reenkarnejoj.

Aperas la unuaj sovaĝuloj kun plibonigita kompleksio, alkliniĝanta al la eleganteco de la estontaj tempoj.

La profunda transformiĝo okazas ĉe la strukturo de la antaŭuloj de la homaj rasoj.

Kiel povis okazi tia transiĝo? demandos via scienca kriterio.

Tre laŭnature.

Ankaŭ la infanoj havas la malperfektaĵojn de la infanaĝo korektataj de siaj gepatroj, kiuj ilin preparas por la vivo, kaj ili ne memoras pri tio, en sia plenaĝo.

### III

#### LA RASOJ DE ADAMO

##### **Sistemo de Kapelo**

En la zodiakaj mapoj, kiujn la surteraj astronomoj foliumas en siaj studoj, oni vidas grandan stelon desegnititan en la konstelacio de Koçero, ricevintan sur la Tero la nomon Kaprino aŭ Kapelo <sup>(\*)</sup>. Grandioza suno inter la astroj, kiuj estas al ni plej najbaraj, ĝi en sia irado tra la Senfino ankaŭ estas akompanata de sia familio el mondoj, prikantantaj la diajn glorojn de la Eternulo. Ĝia lumo konsumas ĉirkaŭe 42 jarojn por atingi la surfacon de la Tero, konsidere la regulan distancon, ekzistantan inter Kapelo kaj nia planedo, ĉar la lumo trakuras la spacon, kun la ĉirkaŭa rapido de 300.000 kilometroj en sekundo.

---

<sup>(\*)</sup> Unuagrandeca stelo de la konstelacio de Koçero. – **La Trad.**



Preskaŭ ĉiuj mondoj dependantaj de ĝi jam puriĝis materie kaj morale, kompare kun la kondiĉoj de la malpli progresinta moralo de la Tero, kie la homo satigas sin per la visceroj de siaj malsuperaj fratoj, tiel same, kiel en la antaŭhistoriaj eraoj de sia ekzistado marŝas unuj kontraŭ la aliaj, ĉe la sono de la militaj himnoj, ne sciante la plej ordinarajn principojn de frateco kaj realigante malmulton por estingo de siaj egoismo, vantamo, malfeliĉa fiero.

### **Iu mondo en transiĝoj**

Antaŭ multe da jarmiloj, unu el la planedoj de Kapelo, kiu havas multe da similaĵoj kun la terglobo, atingis la kulminon de unu el siaj eksterordinaraj evoluaj cikloj.

La finaj luktoj de longdaŭra perfektigado estis komenciĝantaj tiel same, kiel nun okazas ĉe vi, rilate la atendatajn transiĝojn de la XX jarcento, en ĉi tiu civilizacia krepusko.

Sur la vojo de la ĝenerala evoluo ekzistis tie kelke da milionoj da ribelintaj Spirioj, malfaciligantaj la plifirmigon de la penigaj konkeroj de tiuj popoloj plenaj de kompatoj kaj virtoj, sed ia ĝenerala puriga ago forĵetos ilin el tiu homaro, kiu rajtis la ĉiaman konkordon, por efektivigo de siaj altaj laboroj.

La grandaj spiritaj kolektivoj, direktantaj la Kosmon, tiam decidis loki tiujn estulojn, fariĝintajn obstinajn en la krimo, ĉi tien, sur la malproksiman Teron, kie ili lernos realigi, en la doloro kaj en la peniga laboro de sia medio, la grandajn konkerojn de la koro, samtempe impulsante la progreson de siaj malsuperaj fratoj.

### **Spiritoj ekzilitaj sur la Teron**

Tial Jesuo akceptis en la lumon de sia regno de amo kaj justeco tiun amason da suferantaj kaj malfeliĉaj estuloj.

Per sia saĝa kaj kompatema parolo, li admonis tiujn malfeliĉajn animojn al la edifado de ilia konscienco per la plenumado de la devoj de solidareco kaj amo, en la klopodo regeneranta ilin mem. Li montris al ili la grandegajn kampojn de lukto, etendiĝantajn sur la Tero, envolvante ilin en la benata haloo de siaj senlimaj favorkoreco kaj karitato. Li benis iliajn sanktigajn larmojn kaj faris ilin kompreni la sanktajn triumfojn de la estonteco, promesante al ili sian ĉiutagan kunlaboron kaj iam poste sian alvenon.

Tiuj angoraj kaj afliktitaj estuloj, kiuj lasis post si tutan mondon da amatoj, malgraŭ siaj koroj ŝtoniĝintaj en la praktikado de malbono, estos ekzilitaj sur la malluman surfacon de la Tero; restos forlasitaj en la nokto de jarmiloj da resopiro kaj amareco; reenkarniĝos inter la nesciaj kaj primitivaj rasoj, rememorante la perditan paradizon en la foraj firmamentoj. Dum multe da jarcentoj ili ne vidos la mildan lumon de Kapelo, sed laboros sur la Tero, karesataj de Jesuo kaj konsolataj de ties grandega favorkoreco.

### **Fiksado de la rasaj karakteroj**

Kun la helpo de tiuj ekzilitaj Spiritoj, en tiuj tre foraj eraoj, la falangoj de la Kristo realigis ankoraŭ la lastajn eksperimentojn pri la renovigaj fluidaĵoj de la vivo, perfektigante la biologiajn karakterojn de la homaj rasoj. La naturo estis plu por la laboristoj el la spirita mondo, ia vasta kampo de senfinaj eksperimentoj; tio estas des pli vera, ĉar, se la observoj de la mendelismo estus faritaj en tiuj distancaj jarmiloj, oni trovus nenian definitivan solvon en siaj biologiaj studoj. La moderna genetiko ne povus fiksi tiel same, kiel hodiaŭ, la karakterojn de la genoj, pro tio, ke en la laboratorio de la nevideblaj fortoj la ĉeloj ankoraŭ suferadis longajn procedojn de rafinado, kaj ricevadis astrecajn elementojn, kiuj plifirmigis ĝiajn definitivajn karakterojn, por la organismoj de la tempo venonta.

Se la genezo de nia planeco procesis en la daŭro de la jarmiloj, la genezo de la homaj rasoj postulis la kontribuon de la tempo, ĝis estis forlasita la peniga kaj longa tasko de ilia fiksado.

### **Origino de la blankaj rasoj**

Tiuj afliktitaj kaj turmentataj animoj laŭproportie reenkarigiĝis en la plej gravaj regionoj, kie jam lokiĝis la primitivaj triboj kaj familioj, devenantaj de la “primatoj”, al kiuj ni aludis en antaŭaj linioj. Ilia reenkarigo sur la Tero estigis la definitivajn faktorojn de la etnologia historio de la estaĵoj.

La granda okazaĵo fariĝis sur nia planedo.

Jen tiuj estuloj naskiĝis sur nia planedo, kiel la prahomoj de la blankaj rasoj.

Ili, en sia plejmulto, ekloĝis en Azio, de kie ili transiris la istmon de Suezio en Afrikon, en la regionon de Egiptujo, irante ankaŭ en la malproksiman Atlantidon, pri kiu pluraj regionoj de Ameriko havas grandajn vestiĝojn.

Malgraŭ la lecionoj ricevitaj el la saĝa kaj dolĉa parolo de la Kristo, la blankaj homoj forgesis siajn sanktajn devojn.

Granda nombro el tiuj ribelintaj Spiritoj, krom multe da esceptoj, povis reveni en la landon de lumo kaj vero nur post multe da jarcentoj da elaĉetaj suferoj; sed aliaj, malfeliĉaj kaj neprogresemaj, ankoraŭ restas sur la Tero, en la fluantaj tagoj, kontraŭante la ĝeneralan regulon pro sia granda pasivo da kriantaj debetoj.

### **Kvar grandaj popoloj**

Teksante la saktan himnon de siaj rememoroj, la rasoj de Adamo havis neprecizan ideon pri sia antaŭa situacio.

La tradicioj pri la perdita paradizo iris de generacioj al generacioj, ĝis ili restis skribitaj sur la paĝoj de la Biblio.

Tiuj defalintaj kaj ekzilitaj estaĵoj, laŭ la maniero de siaj pasintaj vivoj en la distanca mondo de Kapelo, dum la sinsekvo de la jaroj, kuniĝis en kvar grandajn grupojn, kiuj poste fiksiĝis inter la plej antikvaj popoloj, laŭ la similaĵoj de sento kaj lingvo, kiuj asociis ilin en la konstelacio de Koĉero.

Ree kunigite en la daŭro de la Tempo, ili tiel formis la grupon da Arjoj, la civilizacion de Egiptujo, la popolon de Izraelo kaj la kastojn de Hindujo.

De la Arjoj devenas la plimulto de la blankaj popoloj de la hind-eŭropa familio; sed al tiu devenintaro estas necese alkalkuli la Latinojn, la Keltojn, la Grekojn, krom ankaŭ la Germanoj kaj la Slavoj.

La kvar grandaj amasoj da ekzilitoj estis la antaŭuloj de la tuta organizo de la estontaj civilizacioj, alportante multe da bonoj en la sinon de la flava kaj nigra rasoj, jam ekzistantaj.

Estas tre interesa la studo de ilia konduto tra la Historio. Per tiu studo estas eble ekzameniĝi la eraroj kaj virtoj, kiujn ili alportis el sia malproksima paradizo, kaj ankaŭ la antagonismoj kaj idiosinkrazioj propraj al ĉiu el ili.

### **La promesoj de la Kristo**

Aŭdinte la parolon de la Dia Majstro, antaŭ ol ekloĝi en la mondo, la rasoj de Adamo, en siaj izolitaj grupoj, konservadis memoron pri la promesoj de la Kristo, kiu siavice plifirmigis ilin ĉe la amasoj, sendante al ĉi tiuj, de tempo al tempo, siajn misiistojn kaj kurierojn.

Jen tial, ĉar la epopeoj de la Evangelio estis antaŭviditaj kaj laŭditaj kelke da jarmiloj antaŭ la alveno de la Plejalta Sendito.

La senditoj de la Senfino predikis en la multemiljara Ĉinujo, pri la ĉiela figuro de la Savanto, multe da jarcentoj antaŭ la alveno de Jesuo. La incitoj en Egiptujo atendadis Lin, kun siaj profetaĵoj. En Persujo oni idealigis lian mision, antaŭvidante liajn paŝojn sur

la vojoj de la tempo venonta; en la veda Hindujo estis konata preskaŭ la tuta evangelia historio, kiun la suno de la estontaj jarmiloj prilumos en la malglata regiono de Palestino, kaj la popolo de Izraelo, dum multe da jarcentoj, laŭdis liajn diajn glorojn pri la altigo de la amo kaj rezignacio, de la kompato kaj sufero, per la parolo de siaj plej eminentaj profetoj.

Ia kaŝita intuicio prilumis la diveneman spiriton de la popolaj amasoj.

Ĉiuj popoloj Lin atendadis en sia akceptema medio; ĉiuj Lin volis, lokalizante en siaj vojoj lian noblecan kaj dian mienon. Sed, malgraŭ tio, ke Li iun tagon aperis en la mondo, kiel Ĝojo al ĉiuj malgajuloj kaj Providenco al ĉiuj malfeliĉuloj, en la ombro de la trono de Jiŝaj, la Filo de Dio en ĉiuj cirkonstancoj estos la Vorto de Lumo kaj Amo de la Komenco, kies geneologio perdiĝas en la polvo de la sunoj, rulantaj en la Senfino. (\*)

(\*) Inter la supraj konsideroj kaj tiuj el la antaŭa ĉapitro, ni devas taksu la intertempon de multe da jarcentoj. Cetere, pri la historieco de la rasoj de Adamo estas juste profunde mediti pri la fiksado de la rasaj karakteroj. Prezertante mian humilan penson, mi penis montri la grandajn eksperimentojn, kiuj la servantoj el la Nevidebla Mondo faris ĉe la ĉelaj kompleksoj, asertante la neeblecon de la mendelista penso en tiu epoko de nia planeda evoluo. Nekalkulebla tempo kostis al la misiistoj de Jesuo por fiksi la homan tipon.

Tiel do dirinte pri la ekzilo de la elmigrintoj el “Capella”, mi devas klarigi, ke en tiu tempo, la “primata hominis” jam formis multenombrajn tribojn. Post la grandaj eksperimentoj, tiam la migrantaroj de Pamiro disiris tra la terglobo, laŭ la sanktaj itineroj planitaj en la Supro.

Koncerne la fakton, ke okazis reenkarneigo de Spiritoj tiel progresintaj pri scioj, en korpojn de primitivaj rasoj, tio ne devas kaŭzi abomenon al nia kompreno. Ni memoru, ke pura metalo, kia la oro ekzemple, ne aliĝas pro la cirkonstanco, ke ĝi troviĝas en malpura aŭ misforma vaso. Ĉia okazo realigi bonon estas sankta. Cetere, kion fari kun la senatenta laboristo, kiu dispecigas en malbono ĉiujn perfektajn ilojn al li konfiditajn? Lia rajto al aparatoj pli multekostaj suferos rompon de la kontinueco. La nobla kaj justa edukado ordonos loki liajn klopodojn ĉe neperfekta maŝinaro, ĝis kiam li scios taksu valorajn ĉemane. En ĉiu tempo maŝino devas esti laŭ la servemo de laboristo, ke la plenumita devo estu malfermita vojo al pliaj rajtoj.

---

Inter la nigra kaj flava rasoj, kaj ankaŭ inter la grandaj primitivaj grupoj de Lemurio, de Atlantido kaj de aliaj regionoj neprecize restintaj en la amaso da scioj de la popoloj, tiuj ekzilitoj el “Capella” utile laboris, akirante provizon da amo por siaj sekaj konsciencoj. Kiel vidite, ne okazis malprogreso, sed ĝusta providenco de administrado, laŭ la merito de ĉiu, sur la kampo de laboro kaj sufero por la saviĝo. – (**Noto de Emanuelo.**)

## IV

### LA EGIPTA CIVILIZACIO

#### **La egiptoj**

El la Spiritoj ekzilitaj sur la Teron, tiuj, kiuj konsistigas la egiptan civilizacion, estis la plej multe distingiĝintaj en la praktikado de la Bono kaj en la kulto por la Vero.

Cetere estas necese konsideri, ke ili estis tiuj, kiuj malpli da ŝuldoj posedis antaŭ la tribunalo de la dia justeco. Pro siaj grandaj moralaj kapitaloj, ili konservis en sia interno ian pli vivan rememoron pri siaj spertoj, en sia malproksima patrujo. Unu sola deziro ilin regis, nome diligente labori por iun tagon reveni en siajn brilegajn penatojn. Ia torturanta resopiro pri la ĉielo estis la bazo de ĉiuj iliaj religiaj organizoj. En nenia civilizacio de la Tero la kulto por la morto estis tiel alte elvolviĝinta. En ĉiuj koroj loĝis la dezirego reveni al la fora planedo, al kiu ili sentis sin ligitaj per la plej

sankta amo. Tiu estis la motivo, kial, reprezentante unu el la plej progresintaj civilizacioj de ĉiuj tempoj, la valoroj de la antikva Egiptujo malaperis por ĉiam de sur nia tuŝebla planedo. Post kiam ili ĉiamigis per la Piramidoj siajn modernajn konojn, ĉiuj Spiritoj de tiu afrika regiono revenis sur sian astran patrujon.

### **La sekreta scienco**

Pro la menciitaj cirkonstancoj, la egiptoj portis kun si ian sciencon, kiun la evoluo de tiu epoko ne komprenadis.

La grandaj majstroj el la antikveco tiam estis devigitaj ricevi la amason de iliaj tradicioj kaj rememoroj en la privata apartaĵo de la temploj, kontraŭ la plej teruraj promesoj de la inicitoj pri iliaj misteroj. La profundaj scioj restis konataj nur de la plej altrangaj sacerdotoj de tiu epoko, laŭ la plej granda zorgo rilate la inicadon.

Grekujo mem, kiu prenis de ili la spiriton de iliaj konceptoj plenaj de poezio kaj beleco per iniciativo de siaj plej eminentaj filoj, en fora pasinteco, ne ricevis la tutan veron pri la misteraj sciencoj. Tio estas des pli vera, ĉar la inicadoj en Egiptujo kuntrenis terurajn provojn por la kandidato al la scienco de la vivo kaj de la morto – faktoj, kiuj inter la grekoj estis motivo por neforgeseblaj festoj.

La egiptaj saĝuloj bone konis la neoportunecon pri la grandaj spiritaj revelacioj en tiu fazo de la surtera progreso; veninte de iu mondo, pri kies luktoj, en la laborejo de perfektigo, ili konservis la plej vivajn rememorojn, la plej eminentaj sacerdotoj konis la vojon irotan de la surtera homaro. El tio venas la misteroj de inicado kaj la speciala graveco al ili atribuita de la rondo da saĝuloj de tiu tempo.

### **La simbola politeismo**

En la esoterismaj rondoj, kie aŭdiĝis la saĝa parolo de la tiamaj grandaj majstroj, oni sciis pri la ekzisto



de Dio Unika kaj Absoluta, Patro de ĉiuj homoj kaj Providenco de ĉiuj estaĵoj, sed la sacerdotoj ankaŭ konis la funkcion de la Spiritoj senditaj de Jesuo por la plenumado de ĉiuj fizikaj kaj sociaj leĝoj de nia planedo, pro siaj antaŭaj spertoj.

El tiu kaŝita kunvenejo por sekretaj instruoj, tiam venis la politeisma ideo pri nombraj dioj, kiuj estus mastroj de la Tero kaj de la ĉielo, de la homo kaj de la Naturo.

La homamasoj postulis tiun simbolan politeismon por la grandaj eksteraj festoj de la religio.

La tiamaj sacerdotoj jam konis tiun malfortaĵon de la junaj animoj de ĉiuj tempoj, kontentigante ilin per la ekzoteraj esprimoj de siaj plej altaj lecionoj.

El tiu penso honori la nevideblajn fortojn, kiuj kontrolas la naturajn fenomenojn, naskiĝis la mitologio de Grekujo ĉe la aromo de la arboj kaj ĉe la sono de la fluto de la paŝtistoj en konstanta kontakto kun la Naturo, nomante ilin dioj por la spirito de la homamasoj.

### **La kulto por la morto kaj la metempsikozo**

Unu el la ĉefaj trajtoj de tiu granda popolo estis ĝia insista kaj konstanta zorgo pri la Morto. Ĝia vivo estis nur ia klopodo por bone morti. Ĝiaj papirusoj kaj freskoj estas plenaj de konsolantaj misteroj pri la transtombo.

Tio estas komprenebla. Tiu granda popolo de la faraonoj konservis la rememoron pri sia dolora ekzilo sur la malluman surfacon de nia tera mondo. Kaj tia humiligo tiom doloris ĝin, ke el la rememoro pri sia pasinteco ĝi kreis la teorion pri la metempsikozo, kredante, ke la animo de homo povas reveni en la korpon de ia senraciulo, laŭ puna ordono de la dioj. La metempsikozo estis frukto de ĝia amara impresoj pri la al ĝi trudita peniga ekzilo sur la teran medion.

Tial oni elpensis ian serion da ritoj kaj ceremonioj por soleni la revenon de siaj fratoj al la spirita patrujo.

La misteroj de Izisa kaj Oziriso estis nenio alia, ol simboloj pri la spiritaĵaj fortoj direktantaj la fenomenojn de la morto.

### **La egiptoj kaj la psikaj sciencoj**

La psikaj sciencoj de la nuneco jam estis familiaraj al la grandaj sacerdotoj en la temploj.

La destino kaj la komunikiĝado de la mortintoj kaj la plureco de la ekzistadoj kaj de la mondoj estis problemoj solvitaj kaj konataj de ili. La studo pri iliaj pentraĵoj certigas la verecon de niaj asertoj.

En granda nombro da freskoj la surtera homo prezentas sin akompanata de dia spirita duoblaĵo. La papirusoj montras al ni iliajn progresintajn konojn en tiu rilato, kaj per ili la modernaj egiptologoj povas rekoni, ke la inicitoj sciis pri la ekzisto de la spirita antaŭekzistanta korpo, kiu organizas la mondon da aferoj kaj formoj. Iliaj konoj pri la sunaj energioj rilate la homan magnetismon estis multe pli superaj, ol tiuj de la nuneco. El tiuj konoj naskiĝis la procedoj por mumiigo de korpoj, kies receptoj perdiĝis en la indiferecenteco kaj en la malkvietiĝo de aliaj popoloj.

Iliaj reĝoj estis altigitaj al la plej alta grado de inicado, tenante en siaj manoj ĉiujn spiritaĵajn povojn kaj ĉiujn sanktajn konojn. Tial ilia elkarniĝo kaŭzis la magian koncentriĝon de ĉiuj volo, por ĉirkaŭigi ilian tombon per adorado kaj plej alta respekto. Tiu amo ne montriĝis nur en la solenaj agoj de la mumiigo. Ankaŭ la loko de la tomboj estis sanktigita de stranga magnetismo. La grandaj direktantoj de tiu raso, rajtantaj tiajn adoradojn, estis konsiderataj indaj je la tuta paco en la silento de la morto.

En tiuj magnetismaj saturadoj, ankoraŭ defiantaj la jarmilojn, kuŝas la motivoj de la amara tragedio de Lordo Carnavon kaj de kelke el liaj kunuloj, kiuj la unuaj penetris en la funebran ĉambron de Tut-Ankh-Amon, kaj ankoraŭ tial multfoje en la nunaj tempoj la anglaj aviadistoj rimarkis nefunkcion

de siaj radiofoniaj aparatoj, kiam iliaj maŝinoj transflugas la limigitan atmosferon de la santa valo.

### **La piramidoj**

La ama helpado de la Kristo ne mankis ĉe la marŝo de tiu popolo plena de morala nobleco. Li sendis al ĝi helpantojn kaj kurierojn, kiuj inspiris al ĝi tiujn realigajojn, kiuj transpasis ĉiujn tempojn kaj kaŭzas miron kaj respekton de la posteuloj en ĉiuj jarcentoj.

Tiuj ekzilitaj animoj, kiuj distingiĝis per la plej interesaj spiritaĵoj, ĝustatempe eksciis, ke ilia ekzilo venis al la fino. Impulsite de la fortoj de la Supro, tiu rondo da inicitoj sugestiis la konstruadon de la grandaj piramidoj, kiuj restis kvazaŭ eterna mesaĝo por la estontaj civilizacioj de la terĝlobo. Tiuj grandiozaj monumentoj havas samtempe duoblan celon: ili prezentos la plej sanktajn templojn de studo kaj inicado kaj ankaŭ ili estos por la posteularo ia libro de la pasinteco, kun siaj ne vulgaraj profetaĵoj antaŭ la obskuroj de la estonteco.

Tial stariĝis la grandaj konstruaĵoj, mirigantaj la inĝenierarton de ĉiuj tempoj. Sed ne estas tiu koloso el milionoj da tunoj da ŝtonoj nek tiu herculesa klopodo de la laboro por ilia kunmeto, kio ravas kaj impresas ĉiujn, kiuj rigardadas tiujn monumentojn. La piramidoj montras la plej eksterordinarajn konojn de tiu grupo da Spiritoj, lernantaj la verojn de la vivo. Krom tiuj konoj tie troviĝas ankaŭ la estontaj gvidiloj de la surtera homaro. Ĉiu mezuro havas sian simbolan esprimon rilate la kosmogonian sistemon de nia planedo kaj ties pozicion en la suna sistemo. Tie troviĝas la ideala meridiano, trapasanta pli da kontinentoj kaj malpli da oceanoj, per kiu oni povas taksu la longecon de la loĝeblaj teroj, la proksimuman distancon inter la Suno kaj la Tero, la longitudon, kiun trakuras la terĝlobo sur sia orbito en la daŭro de unu tago, la precesion de la ekvinoksoj kaj multajn aliajn sciencajn konkerojn, kiuj nur nun estas konfirmataj de la moderna astronomio.

## Saviĝo

Post tiu eksterordinara edifado, la grandaj incitoj el Egiptujo revenas en la spiritan mondon, en la senĉesa kuro de la jarcentoj.

Pro ilia reveno en la feliĉajn mondojn de Kapelo, malaperadas la sanktaj konoj de la tebj temploj, kiujn siavice ricevis la grandaj sacerdotoj el Memfiso.

Post la misteroj de Izisa kaj de Oriziso sekvis tiuj de Eleŭziso kompreneble aliiĝintaj en la inicadoj de la antikva Grekujo.

Post centoj da jaroj ree kolektiĝis, en la spiritaj mondoj, la iamaj ekzilitoj kun la beno de la Kristo, ilia patrono kaj savanto. La plimulto da ili tiam revenas al la sistemo de Kapelo, kie la koroj konsoliĝas ĉe la sanktaj renkontiĝoj kun iliaj plej puraj kaj sanktaj amatoj, sed granda nombro de tiuj Spiritoj, studemaj kaj abnegaciaj, restas en la armeo de Jesuo, plenumante la sanktajn devojn de la sento kaj, sub lia dia influo, ili multfoje reenarniĝis sur la Tero, por efektivigo de noblaj kaj benataj misioj.

## V

### HINDUJO

#### **La hinda organizo**

El la Spiritoj ekzilitaj sur la medion de la Tero, tiuj, kiuj grupiĝis sur la bordoj de Gango, formis la unuaj ian organizitan societon, kies kernoj reprezentos grandan nombron da gvidantoj ĉe la estontaj kolektivoj.

La hindaj organizaĵoj origine estas pli malnovaj ol la propra egipta civilizacio kaj tre longe antaŭiĝas al la izraelidaj grupoj, el kiuj pli malfrue venis rimarkindaj personoj, kiaj tiuj de Abrahamo kaj Moseo.

La animoj ekzilitaj sur tiun parton de Oriento multon da bono ricevis de la favorkoreco de la Kristo, pri kies ama parolo kaj luma figuro ili konservis kortsantajn rememorojn esprimatajn en la beleco de la Vedo kaj de la Upaniŝadoj. Ili estas la unuaj voĉoj de la filozofio kaj de la religio sur la Tero, kvazaŭ devenantaj de ia raso el profetoj, majstroj kaj iniciatoj, el kies

tradicioj la estontaj homoj kaj popoloj ĉerpos la veron, kaj ankaŭ iliaj famaj skoloj de penso konservis la misterojn de la iniciatoj, kun la plej sankta tradicia respekto.

### **La arjoj puraj**

En la tiama Hindujo kolektiĝis la arjoj puraj, inter kiuj ankaŭ estis kulturataj la legendoj pri iu perdita mondo, en kiu la hinda popolo lokis la fontojn de sia nobla origino. Nemultaj kredis, ke ĝi estis la antikva kontinento Lemurio, detruita de la Pacifika kaj India Oceanoj, el kies teroj ankoraŭ ekzistas restaĵoj, kiel Aŭstralio.

Sed la realo, kian ni vidis, estas, ke, same kiel la egiptoj, la hindo formis unu el la branĉoj de la forpelitaj el Kapelo, ekzilitaj sur nian planedon. De ili devenas ĉiuj arjaj popoloj, florintaj en Eŭropo kaj hodiaŭ atingantaj unu el la plej akutaj transiĝaj periodoj en sia evolua marŝo. La moderna penso estas tiu sama de tiu granda raso el pensuloj, kiu sin organizis sur la bordoj de Gango, ekde la komenco de la teraj tempoj, des pli, ĉar ĉiuj lingvoj de la blankaj rasoj havis la plej grandajn similaĵojn kun sanskrito, de ilia formado, kaj kiu estis rememoraĵo de ilia antaŭa ekzistado, en aliaj mondoj.

### **Ekspansiismo de la arjoj**

Multe da jarcentoj antaŭ ia ajn signo de surtera civilizacio, la arjoj disvastiĝis tra la hindaj ebenaĵoj, superregante la aŭtoktonojn, devenantajn de la “primatoj”, kiuj posedis malhelan haŭton, kaj diferencis de ili per siaj plej elstaraj fizikaj kaj psikaj karakteroj. Poste tiu ekspansiema amaso penis loki sin laŭlonge de la landoj de la estonta Eŭropo, starigante la unuajn fundamentojn de tiu okcidenta civilizacio en la arbaroj de Grekujo, sur la marbordoj de Italujo kaj Francujo, ankaŭ sur la alia flanko de Rejno, kie la fortoj de la ĝermana saĝeco estis provontaj siajn unuajn paŝojn.

La celstangoj de la societo de la grekoj, de la latin-oj, de la keltoj kaj de la ĝermanoj estas enplantitaj.

Ĉiu branĉo de la arja raso asimilas la renkontitajn elementojn, starigante la komencojn de la eŭropa civilizacio; ĉiu el ili sin helpis per la milita potenco por la necesa firmiĝo kaj tre frue komenciĝis en la Malnova Mondo la luktoj inter iliaj familioj kaj triboj.

### **La mahatmoj**

De sur la sankta regiono de Gango ekiris la homoj nealkonformiĝintaj al humiliga situacio, kiun la ekzilo sur la Teron trudis al ili. La riskoplenaj aventuroj donis senton de nova vivo kaj tiuj ribelintaj estaĵoj supozis trovi forgeson pri sia pozicio en la variaj pejzaĝoj de la vojoj; tie nur restis la rezignaciemaj animoj, kredantaj la spiritajn povojn, kiuj ilin ree kondukus al la grandiozeco de iliaj perditaj kaj foraj paradizoj.

La himnoj de la Vedoĵ estas ja glorigo de la fido kaj espero antaŭ la Plejalta Majesteco de la Sinjoro de la Universo. La kapablo toleri kaj esperi vidiĝis ĉe la ĝenerala sento de la homamasoj, kiuj heroece eltenis ĉiujn dolorojn kaj atendis la feliĉegan momenton de la saviĝo. Tiuj mahatmoj kreis etoson el tia spirita grandeco por sia popolo, ke ankoraŭ hodiaŭ ĉiu fremdulo, vizitanta la sanktan landon de Hindujo revenas el tie, kun la plej profunda impreso de ĝia psika atmosfero. Ili postlasis al la mondo siajn mesaĝojn de amo, espero kaj rezignacia stoikeco, kaj ni elstarigas la fakton, ke ĉiuj grandaj figuroj de la homa pasinteco, aŭtoroj de la nuntempa penso, kernis de ili la plej belajn lecionojn.

### **La kastoj**

La hinda popolo, malgraŭ sia alta grado da progreso en la spiritaj sciencoj, entute ne sufiĉe profitis sian abundon da sanktaj spertoj.

Ĝiaj kondukantoj konis la altajn celojn de la vivo. Ili neprecize rememoris la promesojn de la Sinjoro, antaŭ

ol sia reenkarriĝo ĉe la laboroj en la peniga ekzilejo. La pruvo pri tio estas, ke ili akceptis ĉiujn grandajn misiistojn de la pasinteco, vidante en ili la avatarojn de sia Savanto. Viaso estis ilo de la lecionoj de la Kristo, ses mil jarojn antaŭ la Evangelio, kies epopeo, en siaj plej malgrandaj detaloj, estis antaŭvidita de la hindaj inicitoj, kelkajn miljarojn antaŭ la organizado de Palestino. Kriŝno, Budho kaj aliaj granduloj senditaj de Jesuo al la fizika mondo, por eldirado de liaj savantaj veraĵoj, estis komprenataj de la granda popolo, sur kies frunton la Sinjoro, en ĉiuj tempoj, direktis la diajn helecojn de sia sindona kaj kompatema amo. Sed kvazaŭ la afero estus determinita de dolora psika atavismo, la hinda popolo, malgraŭ siaj spiritecaj tradicioj, lasis kreski en sia koro la dornon de fiero, kiu ja kaŭzis ĝian ekzilon sur la Teron.

Baldaŭ la organizado de kastoj apartigis la hindajn kolektivojn por ĉiam. Tiuj kastoj stariĝis ne nur kun hierarkia senco, sed ankaŭ kun signifo de ia fera kaj absoluta supereco. La profundaj radikoj de ia potenca vanteco dividas la homojn sur la socia kaj religia kampo. La efektivaj idoj de la lando sin nomas arjoj, origina nomo de ilia primitiva raso, kaj ilia religia sistemo entute nomiĝas “Arja-Darmo”, kiun, laŭ sia aserto, ili alportis el sia malproksima origino, kie ne ekzistas specialaj kolektivoj aŭ centra aŭtoritatulo, sed profunda kaj mirinda libereco je sento.

### **La raĝoj kaj la parioj**

Tiuj altaj sistemoj pri religio kaj filozofio rememorigas la progreson de la raso en ĝia origina mondo, el kiu ĝi estis ĵetita sur la Teron pro sia senmezura kaj malfeliĉa fiero.

La arjoj el Hindujo tamen ne kompatis la malpli progresintajn rasojn, kiujn ili trovis sur sia vojo kaj kies evoluo devus esti al ili motivo de reboniga laboro sur la Tero; la aborigenoj estis konsiderataj parioj de la



socio, al kies membroj ili ne povis proksimiĝi, ne ricevante gravajn punojn kaj severajn turmentojn.

Ankoraŭ hodiaŭ la iluminita spirito de Gandhi, devigita agi en la sfero de la plej atenta psikologio pri siaj samrasaj fratoj, ne sukcesis forigi el la sino de la granda popolo el inicitoj kaj profetoj tiujn sociajn absurdaĵojn. La parioj estas la skorio de ĉiuj estaĵoj kaj estas devigitaj fari alarman signalon, kiam ili iras sur la vojo, ke la feliĉuloj foriĝu de ilia malbonfara kontaĝo.

Sed estas realaĵo, ke la suverenaj raĝoj, sub la favorkora influo de la Kristo, revenas al la samaj vojoj sur kiuj ili iris sur la dorso de elefantoj ornamitaj per multekostaj ŝtonoj, kiel malfeliĉaj almozuloj, elpagante la pasintecon per amaraj kaj elaĉetaj provoj. La humiligintoj de la malfeliĉuloj, de sur la alto de siaj brilantaj palacoj revenas sur la samajn vojojn, kovrite per kanceraj vundoj, montrante siajn mizeron kaj malriĉecon.

Estas mirinde, ke nenia popolo sur la Tero havas pli da scioj pri la reenkarniĝo, ol la hinda, konscianta pri tiu sankta veraĵo, ekde la komenco de sia organizo en tiu ĉi mondo.

### **Antaŭ Jesuo**

Post la kulisoj de la civilizacion ni devas rekoni, ke Hindujo estis la lulilo de ĉiuj filozofioj kaj religioj de la homaro, inkluzive materialismon, kiu tie naskiĝis el la skolo de la ĉarvako.<sup>(\*)</sup>

Ia dankosento ekposedas nian animon, kiam ni ekzamenas la spiritan grandecon de tiu popolo kaj ties misterajn belaĵojn, sed super ĝiajn joganojn kaj mahatmojn ni devas loki la luman figuron de Tiu, kiu estas la lumo de la mondo, kaj kies veno sur la Teron okazis por alporti la palmon de konkordo kaj de frateco, por

---

<sup>(\*)</sup> Ĉarvako, disĉiploj de Ĉarvako, materialisma hinda filozofo, kiuj malakceptas la fundamentajn principojn de la hinda teologio, nome la senmortecon de la animo, la leĝojn de karmo, la religiajn ritojn ktp. Laŭ ili materio estas la sola realaĵo. – **La Trad.**

ĉiuj koroj kaj ĉiuj popoloj, detruante la limon, kiu apartigas la spiritojn, kaj forigante la ferajn katenojn de la sociaj kastoĵoj, ke la amo de la animoj anstataŭu la rasan antaŭjuĝon, en lia senfina regado.

## VI

### LA HIND-EŬROPA FAMILIO

#### **La sinsekvaj migradoj**

Se la hinda kaj egiptaj civilizacioj difiniĝis en la mondo, en nemultaj jarcentoj, tio sama ne okazis al la arja civilizacio, komenconta en Eŭropo siajn evoluajn movadojn.

Nur post multe da jarcentoj fariĝis regulaj ĝiaj sinsekvaj migradoj sur la ebenaĵoj de Persujo. El Irano eliris preskaŭ ĉiuj fluoj de blanka raso, kiuj poste estos la genealogiaj trunkoj de la hind-eŭropa familio.

Kiel ni asertis, la arjoj, kiuj serĉadis novajn emociojn de ia nekonata lando, estis en sia plejmulto spiritoj ribelintaj kontraŭ la kondiĉoj de sia ekzilejo; nemulte inklinitaj al la religiaj laboroj, kiuj pro forto de la cirkonstancoj altrudis ian disciplinon je rezignacio kaj humileco, ili ne zorgis pri la konservado de sia tradi-

ciismo, sopirante konkeri ian novan paradizon kaj tiel serenigi siajn angorajn afliktiĝojn.

### **La neekzisto de historiaj sciigoj**

En tio kuŝas la motivo, kial la historiistoj havis malmulte da sciigoj pri la primitivaj arjoj, kiuj plantis la celstangojn de la eŭropa civilizacio.

Kvazaŭ vojirantoj al nekonataĵo, ili erarvagis sur la senhomaj ebenaĵoj kaj montoj ne tiel, kiel la hebrea popolo, fide konservanta la dian parolon, sed senkonsilaj kaj sen espero, nur kalkulante je siaj propraj fortoj, pro sia libera kaj ribelema karaktero.

Iliaj invadoj en sovaĝajn tribojn de Eŭropo datiĝas de pli-malpli dek mil jaroj antaŭ la veno de la Kristo, malgraŭ tio, ke la homaro lokalizas ilian marŝon nur kvar mil jarojn antaŭ la granda okazaĵo en Judujo. Vere, pro sia psikologia situacio, la primitivaj arjoj de la Malvona Mondo ne postlasis spurojn sur la kampo de la fido, sola vojo en tiuj tempoj, sur kiu ia raso povus signi sian restadon sur la Tero. Ili ne konservadis la buŝan historion de ia religio, ĉar ili ĝin ne posedis. Pli ribelemaj kaj malmolkoraj ol ĉiuj ceteraj kunloĝantoj ekzilitaj sur la terglobon, iliaj rememoroj pri la antaŭa vivo en la pli superaj mondoj, kia tiu de ili spertita en la sistemo de Kapelo, turnis sin en internan, amaran kaj doloran ribelon kontraŭ la diaj decidoj. Nur tre malfrue, en la daŭro de la jarmiloj, la Keltoj revenis al la dia kulto, respektante la fortojn de la Naturo, ĉe la sanktaj kverkoj, kaj la Germanoj komencis siajn devotaĵojn ĉe la fajro, kiu personigis en ilia okuloj la potencon, kiu kreas la estulojn kaj aĵojn, dum aliaj popoloj ekoferis viktimojn kaj objektojn al siaj multenombraj dioj.

### **La granda virto de la eŭropaj arjoj**

Sed la favorkoreco de la Kristo neniam ĉesis akompani tiun grandan popolon en ĝia aflikta ekzilejo. Sub la influo de liaj senditoj la migrantaj fluoj el Azio di-

vidiĝis en plurajn grupojn, kiuj penetris en Eŭropon, ekde Peleponezo ĝis la vastaj regionoj de Rusujo, kie troviĝas la antaŭuloj de la Grekoj, Latinoj, Samnianoj, Umbrianoj, Galloj, Scitoj, Iberoj, Romanoj, Saksoj, Ĝermanoj, Slavoj. Tiuj triboj asimilis ĉiujn renkontitajn elementojn en siaj vojoj, akcelante iliajn paŝojn direkte al progreso kaj perfektigo. Dum la Semidoj kaj Hindoj perdiĝis en la kristaliĝo de sia religia fiero, la arjaj familioj de Eŭropo, kvankam ribelintaj kaj malmolkoraj, kunfratiĝis kun la sovaĝulo kaj en tio kuŝas ilia plej granda virto. Asimilinte la aboriganojn, ili kreis la premisojn de ĉiu progreso de la estontaj civilizacioj. En tiu movado por starigo de ia nova “habitat” (\*), ili organizis la unuajn politikajn nociojn pri kolektiva vivo, kaj ĉiu tribo elektis estron por la direktado de sia vivo en komuneco. La agrikulturo, la paŝtistaj aktivecoj ricevis de ili la unuajn impulsojn sur la necertaj vojoj de tiuj, kiuj devenis de la eŭropa “primato”. Per la ekonomiaj organizoj, originantaj el la rekta trakto kun la grundo, ili vidigis la rememoron pri siaj luktoj en la antikva mondo, kiun ili forlasis. Sufiĉis, ke oni inaŭguris sur la Tero la rajton de proprieto, por ke la ĝermo de aparteco kaj ĵaluzo, de ambicio kaj egoismo detruis iliajn bonfarajn klopodojn...

La konkuroj inter la triboj en la komuna vivo pelis ilin al la unuaj fratomurdaj bataloj.

### **Mediterraneo kaj la Norda Maro**

En tiu epoko aliaj geologiaj fenomenoj skuas la vivon de la terglobo.

Jesuo bezonis starigi la definitivajn trajtojn de la granda civilizacio, kies komencoj jam estis vidataj; kaj el tiuj fizikaj skuoj de la terglobo venas renoviĝoj, difinantaj Mediteraneon kaj la Nordan Maron, kiuj limigis la agon de tiuj amasoj da laborantoj por la kolektiva evolado.

---

(\*) Latina vorto kun la senco de loko aŭ natura medio propra al elvolviĝo de kreskaĵo, besto ktp. – **La Trad.**

La Kristo povosciis valorigi la aktivecon de la hind-eŭropa familio, kiu, se ĝi estis la plej ribelinta kontraŭ la planoj de la Supro, ankaŭ estis la sola, kiu kunfratiĝis kun la sovaĝulo, perfektigante liajn rasajn karakterojn, ne laciĝante en la ago konstrui la laborejojn de la estonteco. Dum jarmiloj Li faciligis ĝiajn ĉagrenojn sur la vojo superplena de luktoj kaj obstinaj doloroj. Tial Li sendis al ĝi kurierojn, en ĉiuj cirkonstancoj, kontentigante la kaŝitajn petojn de ĝia koro, dum la eduka laboro de la primitivaj triboj de la kontinento. Li mildigis ĝiajn afliktojn kaj amarecon, helpante rekonstrui la templon de la fido en la sinsekvo de la generacioj. En la arbaroj de Armoriko la antikvaj Keltoj starigis la altarojn de la kredo inter la sanktaj arboj de la Naturo. Dolĉaj spiritaj revelacioj falas en la animon de tiu mistika kaj laborema popolo, kiu tre longe antaŭ la saksoj loĝatigis la regionojn de Britujo.

La reenkarniĝo de multenombraj helpantoj de la Majstro, ĉe liaj diaj laboroj, okazigas novan fazon da evoluo en la sino de la hind-eŭropa familio, jam karakterizita per la plej diversaj rasaj mienoj. Dum la Ĝermanoj kreas novajn aspektojn de progreso, Latio stariĝas en la Centra Italujo, inter Etruskujo kaj Kampanio; Grekujo fariĝas loĝata de majstroj kaj kantistoj kaj la tuta orienta Mediteraneo elvolviĝas per la uzo de la skribo akirita ĉe la najbareco al la civilizacioj pli progresintaj.

### **La nordanoj kaj la mediteraneoj**

Sed la fenomeno de la interŝanĝoj kaj la unuaj komercaj impulsoj starigis longan serion da baroj inter la rilatoj de tiuj popoloj. Sur unu flanko estis la nordanoj kaj sur la dua restadis la mediteraneoj, en akra kaj konstanta batalo. La konkuro ekbruligas al tiuj homgrupoj la fajron de milito, sub la trankvila ĉielo de la Malnova Mondo. Unuj kaj duaj prenas la primitivajn armilojn por la batalo de ekstermado kaj detruado de la malamikaj grupoj, kaj la landlima linio de la diskut-

antoj logiĝas ĝuste sur la loko, kie hodiaŭ estas la limoj de la nuntempaj Francujo kaj Germanujo.

Tiel estas klarigata tiu intenseco de la rasa malamo inter du nacioj, konsiderataj la plej progresintaj kaj laboremaj sur nia planedo. Tia psikologia situacio inter ili ambaŭ devos turni sin en historian fatalon, devenantan de la kolizioj inter la Ĝermanaro kaj la Latineco, en la primitivaj epokoj. Sed kio ne estas pravigebla, tio estas la ĉiamigo de tiuj malamoj en la daŭro de la tempo, tial sin trudas, kiel nepran konstantan neceson, la koncentriĝo de ĉiuj pensoj, celantaj la ĝeneralan fratecon.

### **Origino de la racionalismo**

Kiel klarigite, la arjoj de Eŭropo ne posedis grandajn religiajn valorojn dum sia primitiva formado, pro la praktika sento, kiu karakterizis ilin, en la unuaj tempoj de ilia organizado.

La racionalismo de iliaj konceptoj, la inklino al la pozitivaj sciencoj kaj la amo al la hegemonio kaj libereco estas tiamaniere klarigitaj de la esploro de iliaj komencoj. Rilate religion preskaŭ ĉiuj iliaj paŝoj estis direktataj de la semidaj kaj hindaj popoloj, sed pro la kulturo de la racio ili povis perfektigi la sciencon ĝis la kulminoj de la modernaj konkeroj.

La mondo, se ĝi multfoje estis malhelpata de iliaj maltrankviloj kaj de iliaj renovigaj bataloj, multon ŝuldas al ili pro ilia decida kaj sincera kunlaborado sur la kampo de penso, en ĉiuj epokoj kaj evoluaj periodoj.

### **La admonoj de la Kristo**

Ilia kunfratiĝo kun la primaraj teranoj renkontitaj sur ilia vojo estas sankta ŝuldo de la homaro al iliaj surteraj laboroj.

La Sinjoro de la semado kaj de la kultivejo konas tiun ilian grandan virton kaj tial la ĉiaspecaj admonoj estas senditaj de Li en la Supro, en la fluantaj tempoj, al la eŭropaj nacioj, ke ĉi tiuj sin gardu de ekstermado

kaj tera detruado, tirante ilin el la primitiveco ĝis pli alta nivelo de perfektigo pri la grandaj laboroj, konstruantaj la ĝeneralan evoluadon; se ili multe eraris, ili ankaŭ estis tre sinceraj, ĉar ilia maltrankvilo celis starigian novan paradizon al si mem kaj al la surteraj homoj, kun kies familioj ili kunfratiĝis de la komenco. Mankis al ili spiritaj valoroj por perfekta religia bazo, situacio, kiun ili sendube kreis al la profitado de la libera volo; sed la Kristo, en la doloraj transiĝoj de ĉi tiu jarcento, devos subteni iliajn agojn plej indajn kaj purajn, sur la spirita kampo, kaj en la psikologia momento de la grandaj transformiĝoj la frukto de iliaj fekundaj laboroj estos profitita, kiel nova semo por la estonta civilizacio.



## VII

### LA POPOLO DE IZRAELO

#### **Izraelo**

El la Spiritoj ekzilitaj sur la Teron, la hebreoj estis tiuj, kiuj konsistigis la plej fortan kaj plej homogenan rason, tenante senŝanĝaj siajn karakterojn dum ĉiuj aliiĝoj.

Ekzamenante tiun admirindan popolon, en ĝia fora pasinteco, ni rekonos, ke, se granda estis ĝia certeco pri la ekzisto de Dio, ankaŭ tre granda estis ĝia fiero, rilate ĝiajn konceptojn pri la vero kaj la vivo.

Konsciante la superecon de siaj valoroj, ĝi neniam preterlasis la okazon montri sian vantan spiritan aristokratecon kaj tenis sin malmulte inklina al perfekta kunevivado kun la aliaj rasoj de la terglobo. Sed honore al la vero, ni estas devigataj rekoni, ke Izraelo en evidenta paradokso, antaŭirante la konkerojn de la ceteraj popoloj, instruis de ĉiuj tempoj fratecon, kun neskuebla

kaj senmorta fido. Sen patrujo kaj sen hejmo, tiu heroeca popolo povoscias vivi en ĉiuj sociaj kaj politikaj klimatoj, praktikante la homan solidarecon, en siaj plej bonaj tradicioj de laboro; tamen ĝia historia ekzistado estas dolora leciono pri la pereigaj sekvoj de fiero kaj ekskluzivemo.

### **Moseo**

La legendoj pri la Babelturo ne estas mito en la antikvaj paĝoj de la Malnova Testamento, ĉar la ekzilo sur la Teron ne tiom pezis sur aliaj ekzilitaj rasoj, kiom sur la fiera animo de la hebreoj, neadaptitaj kaj ribelintaj en mondo, kiu ilin ne komprenis.

Ne serĉante ĝiajn praulojn antaŭ ol Moseo, ni renkontos tiun grandan leĝiston saturiĝantan per ĉiuj konoj pri inicado, en la antikva Egiptujo, kie lia spirito ricevis zorgan edukadon, sub la influa presiĝo de Termutisa, kies frateca karitato lin akceptis.

Kiel sendito de la Dia Majstro, Moseo tiam penas koncentri sian popolon por la granda eliro, por serĉado de la Promesita Lando. Neordinara mediumo, li realigas grandajn farojn antaŭ siaj ravitaj fratoj kaj kunuloj. Tiam li sur Sinajo ricevas de la senditoj de la Kristo la dek ordonojn, kiuj estas ĝis nun la bazo de la tuta justeco de la mondo.

Antaŭ ol forlasi la luktojn sur la Tero, en sia ekstaza vido pri la Promesita Lando, Moseo donas al la posteularo siajn tradiciojn en la Pentateŭko, komencante la konstruadon de la plej alta religia scienco de ĉiuj tempoj, por la estontaj kolektivoj.

### **Judismo kaj Kristanismo**

Studante la historion de la izraelida popolo, oni rimarkas, ke la Malnova Testamento estas ia sekreta sciaro de la inicitoj de la juda popolo, kaj ke nur la grandaj majstroj de tiu raso povis fidele interpreti ĝin, en la foraj epokoj.

Eminentaj francaj spiritualistoj, en ĉi tiuj lastaj tempoj, penis penetri en ĝiajn mallumajn sekretojn kaj tamen proksimiĝinte al la realeco rilate la interpretojn, ne estis eble al ili solvi la multajn problemojn, kiujn naskas ĝiaj esprimoj.

Tiuj libroj de la izraelidaj profetoj estas saturitaj de enigmaj kaj simbolaj vortoj, prezentante monumenton parte deĉifrita de la sekreta scienco de la hebreoj. Sed, malgraŭ ĝia sfinksa mieno, ĝi en sia tuto estas poemo de eternaj lumoj. Kun tiu sama nedetruenda ĉarmo je kredo kaj beleco ĝiaj himnoj de amo kaj espero venkis ĉiujn tempojn. Ĝuste tial, flanke de la Evangelio, la Malnova Testamento enhavas senmortajn lumojn por la spirita vidkapablo de ĉiuj koroj. Iu perfekta ligilo kunigas la du Leĝojn, kiuj estas du malsamaj stadioj de la homa progreso. Moseo, per la kruda esprimo de sia primitiva parolo, ricevas el la spirita mondo la bazajn leĝojn de Sinajo, konstruante tiamaniere la grandan fundamenton de la morala perfektigo de la mondo; kaj Jesuo sur Taboro instruas la homaron ellasi el la ombroj sur la Tero sian dian flugon en la lumojn de la ĉielo.

### **Monoteismo**

Sed kio pli mirigas ĉe tiuj migrantaj kaj senprotektaj triboj, tio estas la spirita forteco, kiu nutris ilian fidon sur iliaj plej kuraĝaj kaj dornoplenaj vojoj.

Dum la egipta civilizacio kaj la hindaj inicitoj kreis la politeismon por kontentigi la postulojn de la epoko, tratolerante la nekonstantecon de la homamasoj, la popolo de Izraelo nur kredis al la ekzistado de la Ĉiopova Dio, por kies amo ĝi lernis suferi ĉiujn ofendojn kaj elteni ĉiujn turmentojn.

Kvardek jaroj sur la dezerto estis por tiu popolo kvazaŭ ia kurso pri firmigo de ĝia komunikiĝanta kaj arda fido.

Jesuo sekvis ĉiujn ĝiajn paŝojn, helpante ĝin en ĉiuj malfacilaj okazoj de ĝia vivo, kaj ankoraŭ estis sub

lia alta protektado, ke la regnoj de Izraelo kaj de Jehudo organiziĝis en Palestino.

Ĉiuj rasoj de la Tero ŝuldas al la Judoj tiun sanktan bonon, kiu estas la revelacio de Dio unika, Patro de ĉiuj homoj kaj Providenco de ĉiuj estaĵoj.

La granda leĝisto de la hebreoj alportis la ordonon de Jesuo por simpligi la formulojn de inicado, por la ĝenerala komprenado de la popolo; la misio de Moseo estis fari kompreneblaj por la popola sento la grandajn lecionojn, kiujn la ceteraj inicitoj devis teni kaŝitaj. Kaj fakte, el inter la grandaj personoj el la antikveco, distingiĝas lia figuro, kiel la unua disŝirinta la kurtenon pezantan antaŭ la plej altaj konoj, ebligante la lumon de la religia vero al la simpla kaj nobla animo de la popolo.

### Elekto de Izraelo

En la regno de Izraelo sekvis unu alian la triboj kaj la senditoj de la Sinjoro. Ĉiuj iliaj vojoj en la mondo estas plenaj de profetaj kaj konsolaj voĉoj pri Tiu, kiu venos en la mondon por esti glorata kiel la Ŝafido de Dio.

En tiu jarcento renoviĝas la profetaĵoj kaj ĉiu templo atendas la ordonparolon de la ĉieloj, pere de la Savonto de la Mondo. La leĝistoj en la templo de Jerusalemo respekte interparolas pri la Dia Misiisto; ili en sia fiera vantamo atendas Lin en lia venka ĉaro, ke Li anoncu al ĉiuj homoj la superecon de Izraelo kaj realigu ĉiujn miraklojn kaj mirindaĵojn.

Kaj rememorante tiujn notojn de la historio, ni kompreneble devas demandi pri la kialo de tiu prefero de Jesuo por la genealogia arbo de Davido, por doni al la homaro siajn diajn lecionojn; sed la logiko mem faras nin rekoni, ke el ĉiuj tiamaj popoloj Izraelo estis la plej kredema kaj ankaŭ la plej suferanta, pro sia ekskluzivema kaj fiera vantamo. “Kaj al kiu multo estas donita, el tiu estos multo postulata”<sup>(\*)</sup>, kaj la izraelidoj multon

---

<sup>(\*)</sup> Luko, 12:47,48. – **La Trad.**

ricevis de la Supro rilate fidon, kaj estis juste, ke oni postulis de ili la saman gradon de kompreno rilate humilecon kaj amon.

### **La nekomprenado de la judismo**

Sed estas vero, ke Jesuo, alveninte en la mondon, ne estis absolute komprenata de la juda popolo. La sacerdotoj ne atendis, ke la Redemptoro uzos la plej malluman noktan horon por aperi sur la Tero. Laŭ ilia vidpunkto, la Sinjoro devos alveni en la pompa ĉaro de siaj diaj gloroj, kondukataj de sia legio da Tronoj kaj Anĝeloj, de el la Ĉielo sur la Teron; devos humiligi ĉiujn reĝojn en la mondo, donante al Izraelo la plej altan reĝan potencon por direktado de ĉiuj popoloj sur nia planedo; devos fari ĉiujn mirindaĵojn, nebuligante la gloron de la Cezaroj. Kaj tamen la Kristo aperis inter la humilaj brutoj ĉe la staltrigo; Li montriĝis kiel filo de iu ĉarpentisto kaj, en la plenumado de sia misio de amo kaj humileco, Li protektis la malĉastistinojn, miksiĝis kun la malriĉuloj kaj humiligitoj, vizitis suspektajn domojn por el tie elpreni siajn helpantojn kaj sekvantojn; liaj preferindaj kunuloj estis la malkleraj kaj humilaj fiŝkaptistoj, el kiuj Li faris apostolojn tre amatajn. Forlasinte la templojn de la Leĝo, Li ofte estis renkontata laŭlonge de Tiberiado, sur kies bordoj Li predikadis al la simpluloj fratecon kaj amon, saĝecon kaj humilecon. La judismo saturita de fiero ne sukcesis kompreni la agadon de la ĉiela sendito. Malgraŭ sia fervora kaj sincera kredo, Izraelo ne sciis, ke la tuta savo devas komenciĝi en la interno de ĉiu homo, kaj plenuminte la profetaĵojn de siaj propraj idoj, ĝi kondukis la dian Ŝafidon al la turmentegoj sur la kruco.

### **En la estonteco**

La organizoj de la leĝistoj daŭris plu dum la senĉesa kuro de la tempoj. Ili vane atendis alian Kriston, en ĉi tiuj du jarmiloj nun finiĝantaj. La realaĵo estas, ke ia

nubo da amaraĵoj pli forte pezis sur la destinoj de tiu raso, de post la abomeninda vespero de la Kalvario. La simbolaj ombroj, falintaj sur la Templon de Jerusalemo, ankaŭ akompanis en ĉiuj direktoj, sur la longaj vojoj de la mondo, la elektitan popolon kun ampleksaj influoj en la nuntempa mondo.

Izraelo kultas plu la Ĉiopovan Dion de siaj profetoj, ĝiaj ritoj fariĝas pli en foraj lokoj de la tuta terglobo.

Ĝi eble estas la plej libera, plej internacia, plej frateca raso, inter si, sed ankaŭ la plej fiera kaj ekskluzivema en la mondo.

Malgraŭ tio ke ĝi ne havas ian patrujon (\*) kaj malgraŭ ĉiuj persekutoj kaj kriantaj maljustaĵoj spertitaj sur sia vojo de sufero, Izraelo faras sian marŝon tra la tumultaj urboj, atendante la Mesion de sia saviĝo kaj de sia libereco.

Jesuo akompanas ĝian doloran marŝon dum jarcentoj da elaĉetaj kaj rebonigaj luktoj.

Novaj konoj fluas el la Ĉielo en la koron de ĝiaj patriarkoj kaj ne malfrue venos la tempo, kiam ni vidos la judojn tute komprenantajn la superbelaĵon de la vera Kristanismo kaj aliĝantajn al ĉiuj popoloj de la Tero por la savanta irado, por la konstruado de iu pli bona mondo.

---

(\*) Ĉi tiu libro estis skribita en 1938, dek jarojn antaŭ ol oni fondis Izraelion en Palestino. – **La Eldonistoj.**

## VIII

### LA MULTEMILJARA ĈINUJO

#### Ĉinujo

Post niaj konsideroj pri la blanka raso, kiu konsistis el la antikvaj arjoj sur la regionoj de la Tero, estas oportune ekzameni la plej malnovan popolon el la surteraj civilizacioj, ke ni observu la ameman kaj konstantan helpon de la Dia Majstro al ĉiuj kreitaĵoj de Dio.

Sendube la plej malnova fokuso de ĉiuj progresoj de la terglobo estas la multemiljara Ĉinujo kun ĝia nobla kaj rezignaciema spirito, sed sen difinita celo sur la vojoj de la ĝenerala edifado.

Kiam okazis la alveno de la animoj elpelitaj el la sistemo de Kapelo, en tre malproksimaj epokoj, la ĉina ekzistado jam havis ian regulan organizon el la plej homogenaj kaj selektitaj tipoj de nia planedo, kompare kun la ceteraj primitivaj homoj. Ĝiaj tradicioj jam iris de generacio al generacio, konstruante la verkojn de la

estonteco. El tio venas, ke efektive la historio de Ĉinujo komenciĝas en tre malproksimaj epokoj, en ĝia multemiljara pasinteco, kaj tiu popolo, kiu nun duonmontras certan stagnon de siaj progresemaĵoj valoroj, ankaŭ ĉiam estis akompanata, en sia marŝo, de tiu senfina favorokoreco, kiu el la Ĉielo, envolvas ĉiujn korojn batantajjn sur la Tero.

### **Kristaliĝo de la ĉinaj pensoj**

La kristaliĝo de la ĉinaj pensoj venas tute simple el tiu memvola izoliĝo, kiu en la samaj cirkonstancoj malutilis al la spirito de Hindujo, malgraŭ la alloga beleco de ties tradicioj kaj instruoj.

Tiel estas, ĉar civilizacio kaj progreso, kaj ankaŭ la vivo mem dependas de senĉesaj interŝanĝoj. La Universo, en sia mirinda konsisto, ne kreis nek sankciis leĝojn de izoliĝo en la eterna komuneco de la mondoj kaj estaĵoj. La ekzistado estas longa ŝtuparo, sur kiu ĉiuj animoj devas doni la manojn unuj al aliaj, por la suprenirado al la kono kaj al Dio. Dum la hind-eŭropa familio vagadis tra nekonataj regionoj, asimilante la esprimojn de la renkontitaj triboj – en longaj iniciativoj de konstruado kaj laboro –, la arĵoj el Hindujo haltis ĉe ripozo de siaj tradicioj, kaj elvolviĝis en la daŭro de la tempo la plej altvaloraj lecionoj de sperto por la animo de la popoloj. Kaj nun, kiam la izraelidoj estas vokitaj de la potencaj fortoj por delokiĝo en la sinon de la nacioj, por pli profunde lerni la dolĉan lecionon pri frateco kaj universala amo, renovigante la fibron de sia fido, sur vojo al la perfekta komprenado de la Kristo, Ĉinujo ankaŭ estas vokita de la transformiĝoj de la jarcento, al la granda leciono de interligiĝo de la loĝantaro de nia planedo, por instrui siajn virtojn kaj lerni la virtojn de la aliaj popoloj.

Sed pro ĝia obstina rezistado la ĉina penso stagnis en la daŭro de la tempo, kvankam en ĉi tiuj senpretendaj rimarkoj ni estas la unuaj konstatantaj la grandecon de ĝiaj altaj spiritaj esprimoj.



## Fo-Hi

Jesuo, en sia protektado kaj favorkoreco, de la malproksimaj tempoj sendis misiistojn al tiuj grupoj da kreitoj, kiuj sin organizadis ekonomie kaj politike, inter la primaraj kolektivoj de la Tero.

La rasoj de Adamo ankoraŭ ne estis venintaj sur la terglobo kaj inter tiuj popoloj jam aŭdiĝis instruoj el la spirita mondo, de grandega intereso por la direktado kaj solvo de ĉiuj problemoj de la vivo.

La Historio ne parolas al vi pri aliaj misiistoj antaŭ ol la granda Fo-Hi, kiu, per siaj duoblaj trilionoj, estis la kompilinto de iliaj religiaj sciencoj, kiuj venis el tre fora pasinteco ĝis la studoj de la posteularo.

Fo-Hi aludas en sia “Y-King” al la grandaj saĝuloj, antaŭirintaj lin sur la malglata vojo de akirado de spirita kono. Liaj simboloj estas la karakterizaĵoj de ia scienco treege evoluinta, prezentante instruojn de granda pureco kaj de plej progresinta metafiziko.

Post tiu granda misiisto de la ĉina popolo, la Dia Majstro sendas al ĝi la parolon de Konfuceo aŭ Kong-Fo-Ce, kvin jarcentojn antaŭ sia alveno, preparante la vojojn de la Evangelio en la mondo, kaj tion Li ankaŭ faris en Grekujo, Romo kaj en aliaj progresintaj regionoj de nia planedo, sendante altrangajn Spiritojn de la scienco, de la religio kaj de la filozofio, kelke da tempo antaŭ sia mirinda parolo, ke la homaro estu preparita por ricevi liajn instruojn.

## Konfuceo kaj Lao-Ce

Kiel misiisto de la Kristo, Konfuceo devis satoriĝi per ĉiuj ĉinaj tradicioj, akcepti la gravajn cirkonstancojn de la medio, por esti utila al sia lando, laŭ la ebleco de ties kompreno. Li reaperigis la instruojn de Lao-Ce, kiu siavice estis supera sendito de la Sinjoro por la flavaj rasoj. Liaj lecionoj estas plenaj de parfumo de plej alta morala saĝeco. En “Kan-Ing” de Lao-Ce, jen kelkaj el liaj asertoj tiel valoraj, kiel viaj konoj kaj

klarigoj pri la moderna religia penso: “La Sinjoro de la Ĉieloj estas bona kaj malavara, kaj la saĝa homo estas iom da liaj manifestiĝoj. Sur la vojo de inspiro ili iras duope kaj la saĝulo ricevas liajn pensojn, kiuj plenigas la vivon per ĝojo kaj benoj.”

Lao-Ce, el kies instruoj Konfuceo nepre volis formi la bazon de siaj principoj, vivis en la sesa jarcento antaŭ la alveno de la Sinjoro, kaj antaŭ tia religia filozofio, progresinta kaj supera, ni devas rekoni la grandecon de la favorkoreco de Jesuo, sendinta siajn reprezentantojn sur ĉiujn lokojn de la Tero, celante elvolvi en la spirito de la homamasoj la plej bonan komprenon de sia Evangelio de Vero kaj Amo, kiun tamen la mondo ankoraŭ ne komprenis, malgraŭ ĉiuj liaj sinoferoj.

### **La Nirvano**

Por sufiĉe pravigi nian opinion rilate la stagnon de la ĉina spirito, ni ankoraŭ ekzameni ĝiajn interesajn kaj altajn religiajn konceptojn.

Entute la kulto al la antaŭuloj estas la principo de ĝia fido. Tiu ĉiutaga kaj persista kulto estas la bazo de ĝia kredo al la senmortuloj, ĉar de ties manifestiĝoj venas la pruvoj pri ilia postvivado. Tiuj interrilatoj kun la nevidebla mondo estas ordinara fenomeno en la ekzistado de la plej simpla homo. La penso pri bezono de spirita perfektigo estas latentita en ĉiuj koroj, sed la devio de la kompreno pri la Nirvano estas tie, kiel ĉe multenombraj adeptoj de budhismo, ia baro al la ĝenerala progreso.

La Nirvano laŭ siaj plej profundaj esprimoj, devas esti komprenata kiel la ĉiama kuneco de la animo kun Dio, celo de ĉiuj evoluantaj vojoj; sed neniam kiel sinonimo de ĉiama kvieteco aŭ beateca realigo de la “ne-esto”. La vivo estas la harmonio de la movoj, rezultanta el la senĉesaj interŝanĝoj en la sino de la naturoj videbla kaj nevidebla. Ĝi dependas de la aktiveco de ĉiuj mondoj kaj de ĉiuj estaĵoj. Ĉiu individuo tiel en provado, kiel en saviĝo aŭ en la dia gloro, havas difinitan funkcion

en laboro kaj altigo de siaj propraj valoroj. Kiuj lernis la bonojn de la vivo kaj ilin instruas kun amo, tiuj multigas sur la Tero kaj en la Ĉieloĵ la senfinajn donojn de Dio.

### La nuna Ĉinujo

La malĝusta interpretado de la Nirvano embarasis la altajn kreantajn eblecojn de la ĉina spirito, kristaligis ties vidpunktojn kaj haltigis ties marŝon al la grandaj konkerroj.

Vere tiuj konkerroj ne konsistas el mitraloj kaj el obusoj de la civilizacio de Okcidento, plena de variaj komfortaĵoj, sed ĉi tie mi aludas al la ĝenerala nekompreneado pri la superbela leciono de la Kristo kaj de liaj senditoj.

Ĉinujo kaj ankaŭ la aliaj popoloj en la mondo devas en ĉi tiu jarcento kalkuli je siaj valoroj akiritaj en sia longa kaj peniga irado.

El ĉi tiuj vortoj ni ne konkludu, ke la japana invado en sia nekredebla agreso estas tuŝita de dia sankcio. Japanujo povos realigi, en la granda respubliko, ĉiujn materiajn konkerrojn; uzante la psikologion de la konkerintoj, ĝi povos plibonigi la sanigajn kondiĉojn de la popolo, malfermi ŝoseojn kaj multigi lernejojn; sed ĝi ne estingos la persisteman energion de la ĉina popolo, brava kaj rezignema, kiu povos eĉ cedi la regadon de sia lando al tiu, plenigante ĝin per riĉeco, lukso kaj honorajoj, ne senprestiĝante sian propran valoron, ĉar la multemiljara Ĉinujo scias, ke rabeno facile ebriiĝas per la sangovino de la triumfo, kaj ke, tuj kiam la lukso moligos ĝiajn fibrojn de malespero, tiam ĉiuj venkoj aŭtomate revenos al medito, rezono, kulturo kaj inteligento.

Kio estas necese ekzameni, tio estas la stagnostato de ĉina animo en ĉi tiuj lastaj jarcentoj, ke ni konkludu el tio, ke ĝi havas urĝan bezonon partopreni en la bankedo de frateco de la aliaj popoloj.

## La edifado de la Evangelio

Estas vero, ke la rekta parolo de la Kristo prezentata en lia Evangelio ankoraŭ ne atingis entute tiun popolon, heligante la vojon de ĉiuj koroj, sed ia blovo de vivo disbato la jarmilajn ombrojn, kiuj falis sur la ĉinan respublikon, kie milionoj da animoj neprave ripozas en la falsa kompreno pri la Nirvano kaj la Absoluto. Noblaj manoj starigos la evangelian monumenton en tiu mondo kun doloraj antikvaĵoj, kaj ia nova tago brilos por la granda nacio, kiu fariĝis simbolo de pacienco kaj konstanteco, por la aliaj popoloj.

Ni atendu la providencon de Tiu, kiu tenas en siaj respektigindaj kaj favorkoraj manoj la direktadon de la mondo.

“Feliĉaj la humilaj, la plorantaj kaj la malriĉaj.”

Kaj liaj mildaj kaj amemaj paroloj memorigas al ni la multemukjaran Ĉinujon, kiu, amante la pacon, nun suferas la insulton de la mallumaj fortoj de ambicio, maljusteco kaj malbonagoj.

## IX

### LA GRANDAJ RELIGIOJ DE LA PASINTECO

#### **La unuaj religiaj organizoj**

La unuaj religiaj organizoj sur la Tero memkompreneble originis de inter la primitivaj popoloj el Oriento, al kiuj Jesuo de tempo al tempo sendis siajn kurierojn kaj misiulojn.

Pro manko de skribo en tiuj foraj tempoj ĉiuj tradicioj transiris de generacio al generacio per la meĥanismo de la paroloj. Sed pro la kunhelpado de la ekzilitoj el la sistemo de Kapelo, la rudimentoj de la grafiko ricevis la unuajn impulsojn kaj ia nova erao de la spirita kono ekfloris sur la kampo de la religiaj vidpunktoj.

La Vedoĵ aĝantaj pli ol ses mil jarojn jam parolas al ni pri la saĝeco de la “Sastroj” aŭ grandaj majstroj de la hindaj sciencoj, kiuj antaŭiris ilin sur la bordoj de la sanktaj riveroj de Hinduĵo, antaŭ pli-malpli du jarmiloj. Oni do vidas, ke la religia penso naskiĝis kun

la homaro mem kaj estas la bazo de ĉiuj ĝiaj klopodoj kaj realigoj sur la terglobo.

### **Ankoraŭ la rasoj de Adamo**

Sed ni ne forgesu, ke Jesuo kolektis en la senfinaj spacoj la forpelitajn estulojn, ekzilitajn sur la Teron, antaŭ ilia ĝenerala reenkarriĝo en regiono najbara al la ebenaĵoj de Irano kaj Pamiro.

Obeante al la superaj ordonoj de la spirita mondo, ili neniam povis forgesi la savantan parolon de la Mesio kaj liajn diajn promesojn. La belaĵoj en la spaco kune kun la mirinda pejzaĝo de la mondo, kiun ili estis devigitaj forlasi, estis la kerno de iliaj plej karaj rememoroj. La konsolaj admonoj de la Kristo, en la antaŭtempo de lia dolora eniĝo en la pezajn fluidaĵojn de nia planedo, kantis en ilia animo la plej belajn himnojn de ĝojo kaj espero. Tiel estis, ĉar tiuj malnovaj civilizacioj posedis pli da fido, lokante la dian intuicion super la pure homan racion. La kredo, kvazaŭ interna kaj sankta akiro de iliaj animoj, estis la forto kaŭzanta ĉiujn realigojn, kaj ĉiuj ekzilitoj kun la plej sanktaj entuziasmoj de sia koro parolis pri Li kaj pri lia senfina favorkoreco. Iliaj voĉoj plenigas da tutan medion de la civilizacioj forpasintaj en la daŭro de la senfinaj jarcentoj kaj prezentita per mil nomoj, laŭ la pluraj epokoj, la Ŝafido de Dio estis gardata de la kompreno kaj memoro de la mondo, kun ĉiuj siaj diaj aspektoj aŭ, por pli ĝuste diri, kvazaŭ Dio mem, laŭ la plureco de la religiaj misteroj.

### **La genezo de la religiaj kredoj**

La genezo de ĉiuj religioj de la homaro havas siajn originojn en lia respektinda kaj kompatema koro. Ni ne deziras per niaj klarigoj dogme diigi la luman figuron de la Kristo, sed vere montri lian gloran superecon ĉe la direktado de la terglobo, pro tio, ke ĉiu mondo, same kiel ĉiu familio, havas superan estron antaŭ la justeco kaj la saĝeco de la Kreanto.

Estus granda eraro juĝi barbaroj kaj paganoj la surterajn popolojn, kiuj ankoraŭ ne rekte konas la belegajn lecionojn de lia savanta Evangelio, ĉar lia vigla helpado akompanis, kiel akompanas en ĉiu tempo, la evoluon de la homoj en ĉiuj regionoj de la terglobo. La historio de Ĉinujo, de Persujo, de Egiptujo, de Hindujo, de la araboj, de la izraelidoj, de la keltoj, de la grekoj kaj de la romanoj estas heligita de la lumo de liaj potencaj senditoj. Kaj multaj el ili estis tiel kompetentaj pri la plenumado de siaj grandaj kaj benataj devoj, ke ili estis rigardataj, kiel Li mem, en sinsekvaj kaj periodaj reen-karniĝoj de lia dia amo. En la Manava-Darmo ni trovas la lecionon de la Kristo; en Ĉinujo estas renkontataj Fo-Hi, Lao-Ce, Konfuceo; en la kredoj de Tibeto estas la personeco de Budho kaj ni trovas Moseon en la Pentateŭko; en la Korano ni vidas Mahometon. Ĉiu raso ricevis siajn instruantojn, kvazaŭ ĉi tiuj estus Li mem, alvenanta el la brilego de sia dia gloro.

Konante intuicie la enhavon de la profetaĵoj, ĉiuj rasoj gardis la historion de liaj senditoj, en la formo de lia estonta alveno, pro la latentaj rememoroj, kiujn ili konservis en sia koro, pri lia parolo en la spaco, tuŝita de lumo kaj amo.

### **La esenca unueco de la religioj**

Estas vero, ke ĉiuj religiaj libroj kaj tradicioj el la antikveco havas inter si la plej striktan esencan unuecon. La revelacioj evoluas en grada sfero de kono. Ili ĉiuj aludas al la nepersonigebla Dio, kiu estas la esenco de la vivo de la tuta Universo, kaj en la tradiciismo de ili ĉiuj estas la superega figuro de la Kristo, atendata sur ĉiuj lokoj de la terglobo.

Ni asertas, ke la pluraj popoloj de la mondo konservas de longe liajn instruojn kaj esperojn, ne parolante pri la grandaj kolektivoj, florintaj en Sud-Ameriko, tiam preskaŭ ligita al Ĉinujo per la etendaĵoj de Lemurio kaj de Nord-Ameriko, kiu estis ligita al Atlantido. Sed ne estas nia intenco studi ĉi tie aliajn demandojn, ne

rilatantaj al la supereco de la Kristo kaj al la superbeleco de lia Evangelio, en ĉi tiuj senpretendaj notoj. Tamen citinte ĉiujn malnovajn popolojn de nia planedo, ni ankaŭ estas devigitaj rememori la grandajn antaŭ-historiajn civilizaciojn, disvolviĝintajn kaj malaperintajn sur la amerika kontinento, el kies kataklismoj kaj ruinoj restas ankoraŭ la interesaj esprimoj de la Inkaoj kaj de la Aztekoj, kiuj, same kiel ĉiuj aliaj homgrupoj en la mondo, ankaŭ ricevis la nerektan parolon de la Sinjoro, en sia kolektiva marŝo sur la sanktaj vojoj.

### **La gradaj revelacioj**

Ĝis la simpla kaj pura parolo de la Kristo, la surtera homaro travivis gradajn stadiojn de kono kaj de eblecoj sur la vojo de la spiritaĵaj revelacioj.

La jarmiloj kun siaj sinsekvaj kaj doloraj spertoj preparis la vojojn de Tiu, kiu venos ne nur kun sia parolo, sed precipe kun sia savanta ekzemplado. Ĉiu sendito alportis unu el la aspektoj de la granda leciono donita sur la humila regiono de Galileo.

Tial multe da aziaj kolektivoj ne konas la rektan lecionon de la Majstro, sed scias la enhavon de lia parolo pro la revelacioj mem en sia medio, kaj se la Bona-Novaĵo ne disvastiĝis en la daŭro de la tempoj, sur la vojoj de la popoloj, estas pro tio, ke la supozitaj misiuloj de la Kristo, en la jarcentoj post liaj instruoj, ne sciis kultivi la floron de la vivo kaj de la vero, de la amo kaj de la espero, kiun liaj ekzemploj plantis en la mondo: – sufokinte ĝin en la tempoj de ia falsa religio aŭ enferminte ĝin en la silento de la klostroj, la mirinda plantaĵo de la Evangelio estis malhelpata je sia disvolviĝo kaj kritikata je siaj plej aŭtentikaj celoj.

### **Preparado por la Kristanismo**

Tial, laborplena kaj longa preparado en la kuro de la jarmiloj antaŭiris la lecionojn en Palestino.



La sacerdotoj de ĉiuj grandaj religioj el la pasinteco supozis, ke iliaj majstroj kaj iliaj plej altaj incitoj estis la persono de la Sinjoro, sed ni devas konvinkiĝi, ke Jesuo estis senkonfuza.

Laŭ la signifa lumo de la historio, ni multfoje vidas en liaj helpantoj aŭ homaj instrumentoj la karakterizaĵojn de la surteraj vulgaruloj. Nemultaj estis diktatoroj de konsciencoj, energiaj kaj nalhumanaj por teni kaj disvolvi la fidon; aliaj, perfidite de siaj fortoj kaj malŝatante sanktajn devojn al la Savanto, anstataŭ esti perantoj de la Dia Majstro, misuzis sian propran liberon, elaŭdante la renversigajn fortojn de la Mallumo, malhelpante la ĝeneralan harmonion.

### La senkonfuza Kristo

Sed Jesuo markas sian restadon sur la Tero per la konstanta esprimo de siaj plej pura karitato kaj plej abnegacia amo. Liaj paraboloj kaj admonoj estas sorbigitaj de la parfumo de la eternaj kaj gloraj veraĵoj. La staltrogo kaj la kalvario estas mirindaj lecionoj, kies heleco prilumas la multemiljarajn vojojn de la tuta homaro, kaj super ĉio liaj ekzemploj estas gvidilo por ĉiuj grandiozaj celoj, en la pliperfektigado de la surtera vivo. Per tiuj elementoj Li faris spiritan revolucion, estantan sur la terglobo de antaŭ du jarmiloj. Respektante la leĝojn de la mondo, aludante al la bildo de Cezaro, Li instruis la homojn altiĝi al Dio, per alta kompreno pri la plej sanktaj veraĵoj de la vivo. Li reformulis ĉiujn vidpunktojn pri la socia vivo, praktikante la plej puran fratecon. Plenumante la Malnovan Leĝon, Li plenigis ĝian organizon per toleremo, kompatemo kaj amo, per siaj lecionoj donitaj sur publika placo, antaŭ maldecaj kaj malfeliĉaj homoj, kaj nur Li instruis tiun ordonon “Amu unu alian” <sup>(\*)</sup>, travivante la situacion de tiu, kiu scias ĝin plenumi.

---

<sup>(\*)</sup> Joh., 13:34 kaj 15:17. – **La Trad.**

La spiritoj nekapablaj Lin kompreni povas diri, ke liaj buŝaj formuloj estas malnovaj kaj konataj; sed neniu povas nei, ke lia ekzemplado estis unika ĝis nun, sur la surfaco de la Tero.

La plimulto de la religiaj misiuloj el la pasinteco konsistis el princoj, saĝuloj aŭ grandaj incitoj, elirintaj el la interno de palacoj kaj temploj; sed la Sinjoro de la semado kaj de la kultivejo estis la personiĝo de la tuta saĝeco, de la tuta amo, kaj lia sola palaco estis la modesta kabano de iu ĉarpentisto, kie Li nepre volis instrui al la posteularo, ke la efektiva aristokrateco estas tiu de la laboro, prezentante tiun sanktan formulon, difinita de la moderna penso, kiel kolektivismo de la manoj, ligitan al la individuismo de la koroj – socia sistemo, al kiu iras la kolektivoj de la pasantaj tempoj – kaj malŝatante ĉiujn konvenciojn kaj surterajn honorafiĝojn, Li preferis ne posedi ŝtonon, kie Li kuŝigos sian doloran penson, ke liaj fratoj lernu la neforgeseblan lecionon de la “Vojo, la Vero kaj la Vivo”. (\*)

---

(\*) Joh., 14:6. – **La Trad.**

## X

### GREKUJO KAJ LA MISIO DE SOKRATO

#### **En la antaŭtempoj de la plenaĝeco de la Tero**

Ekzameninte la spiritan plenaĝecon de la homoj, la Kristo sendis al ili, antaŭ sia veno en la mondon, multenombran kohorton da saĝaj kaj bonvolemaj Spiritoj kapablaj definitive plifirmigi tiun maturecon de la surtera penso.

La loĝantoplenaj urboj de la terglobo tiam pleniĝas de kleraj kaj noblaj homoj, de filozofoj kaj artistoj, kiuj renovigas plibonigante la inklinojn de la homaro.

Grandaj majstroj je la cerbo kaj je la koro formas multenombrajn skolojn en Grekujo, kiu prenis la intelektan direktadon de la tuta Tero. Predikante la veron al la homamasoj, la plimulto de tiuj pensuloj, kiuj estis senditoj de la Kristo al la surteraj kolektivoj, alportas sur la publikajn placojn, el la malvasta kaj izoliginta medio de la tempoj, la instruojn de la grandaj inicitoj.

Kiel la organismo de la fizika homo postulis plej multajn eksperimentojn de la naturo, antaŭ ol definitive fiksiĝis ĝiaj biologiaj karakteroj, tiel ankaŭ la plej multaj eksperimentoj sur la socia kampo devis antaŭiri la lecionon de Jesuo, kiu prezentas sekuran gvidilon por la edifado de la spirita homo.

Tial ni rimarkas en tiuj kvin jarcentoj antaŭ la veno de la Ŝafido ian amason da sennombraj politikaj, religiaj kaj filozofiaj skoloj kun plej diversaj nuancoj, sur ĉiuj lokoj de la mondo.

### **Ateno kaj Sparto**

Multaj sciencaj teorioj, kiuj en viaj tagoj kaŭzas sensacion, kvazaŭ supermodernaj novaĵoj, estis konataj de Grekujo, kies majstroj estis iliaj efektivaj elpensintoj.

Sur la kampo de la sociaj doktrinoj, grandaj provoj estis realigitaj, kaj oni diskonigis la plej abundan rikolton de instruoj; kaj kiam ni primeditas la modernan konflikton inter la totalismaj, faŝistaj aŭ komunistaj Ŝtatoj kaj la demokratiaj respublikoj, tiam ni devas turni niajn rigardojn al la pasinteco, revidante Atenon kaj Sparton, kiel du politikajn simbolojn, kiuj igas nin pensi pri la plena aktualeco de la malnova Grekujo.

Ĉu la spartanoj, sub la reĝimo atribuita al Likurgo, nomo, kiu simbolas la tiamajn generaloj, travivante la absolutan ekzistadon de la Ŝtato, ne esprimis la saman fizionomion de la nunaj Germanujo kaj Rusujo? La leĝaro de Sparto malpermesis komercon, kondamnis kulturon; malhelpante la personan guston pri la ĉarmaj bagateloj de la vivo kaj de la sento, dekretis rimedojn de izolo, mistraktante la fremdulojn; starigis unuformecon de vestoj, prenis sur sin la edukadon de infanoj per la organoj de la Ŝtato, sed ne kulturis la intelektan parton, skuante la tutan sanktan familian institucion kaj multfoje kreante emon al ŝtelo kaj denunco, malprofite por la plej noblaj celoj de la vivo.

Tial Sparto eniris en la historion, kiel ia simpla popolo el soldatoj, dissemantaj detruon kaj turmentojn de milito, sen ia konstrua signifo por la homaro.

Kontraŭe Ateno estas la lulilo de la vera demokratio. Popolo profunde amanta liberecon, ĝia sindono al kulturo kaj artoj incisis la aliajn naciojn en la kulton al vivo, al kreitaĵaro kaj la beleco. Ĝiaj leĝodonantoj, kiuj, simile al Solono, estis filozofoj kaj poetoj, reformis la ĝis tiam konatajn sociajn sistemojn, protektante la malriĉajn kaj senhelpajn klasojn, starigante harmonian logikon inter ĉiuj departementoj de la socio, akceptante fremdulojn, protektante laboron, prosperigante komercon, industriojn, agrikulturon.

Tie komenciĝis la vera reĝimo de konsulto al la popola volo, kiu decidis per multenombraj asembleoj ĉiujn problemojn de la respektinda urbo. Estas facile tie rekoni la komencon de la modernaj demokratioj, nun sin organizantaj en la transiĝoj de la XX jarcento, por forfini ĉiujn pereigajn doktrinojn de milito kaj perforto.

### **Necesaj provoj**

Tiaj provoj sur la sociologia kampo estis stimultaj kaj de proksime akompanataj de la senditoj de Jesuo, respektantaj la grandajn leĝojn de la individua kaj kolektiva liberecoj.

La mondo bezonis koni la bonan kaj malbonan semojn, en la grandaj transformiĝoj de sia ekzistado. La ekzemplado de la Kristo bezonis altan komprenon en la sino de la kulturo kaj de la sperto de ĉiuj forpasintaj jarcentoj kaj malgraŭ la renovigaj luktoj, kiuj antaŭiris ĝin sur la terglobo, la Evangelio de la Majstro atendas de du jarmiloj la floradon de la perfekta interkonsento inter la homoj.

### **Grekujo**

Sub la influo de la kompatema koro de la Kristo la tuta Grekujo fariĝas loĝata de artistoj kaj eminentaj pensuloj, en la kadro de la filozofioj kaj sciencoj. Tie ni renkontas la Italan kaj Elajan skolojn, kiuj prenas la fervorajn idealojn de Pitagoro kaj Ksenofono, ankaŭ ne

fororgesante la Ionian kaj Atomisman skolojn kun Taleso kaj Demokrito, esprimantaj la plej altan materialismon.

La jarcento de Periklo, atinganta ian apogeon de beleco kaj kulturo per la altaj principoj ricevitaj el la egipta civilizacio, disradias la plej superbajn spiritajn lumojn sur la horizontojn de la Tero. Malmultaj fazoj de la eŭropa evoluado alproksimiĝis al tiu mirinda jarcento.

La Savanto rigardas de la Supro tiun epokon de altaj moralaj konkerroj, plena de amo kaj espero. Kiam nia planedo proksimiĝis al sia spirita plenaĝeco, tiam Li povis ĵeti en la homan koron la benatajn semojn de sia parolo. Li tiam sendas al la societoj sur la terglobo la klopodon de siaj bravaj helpantoj, en la persono de Eskilo, Eŭripido, Herodoto kaj Tucido, kaj fine tiun de la neordinara persono de Sokrato, celante realigi la kroniĝon de la decida klopodo de tiom da senditoj.

### **Sokrato**

Tial, el ĉiuj grandaj figuroj en tiuj foraj tempoj, ni estas devigitaj elstarigi tiun grandiozan figuron de Sokrato, en la malnova Ateno.

Supera ol Anaksagoro, lia majstro, ankaŭ same neperfekte komprenata de siaj tri plej famaj disĉiploj, la granda filozofo estas aŭreolita per la plej diaj spiritaj helecoj, en la daŭro de ĉiuj jarcentoj. Lia ekzistado, en kelkaj cirkonstancoj, proksimiĝas al la ekzemplado de la Kristo mem. Lia parolo konfuzas ĉiujn malŝatindajn spiritojn en tiu epoko kaj malfermigis novajn florojn de sento kaj kulturo en la soifanta animo de la junularo. Sur publikaj placoj li instruas al la infanaro kaj al la junularo la belan idealon de frateco kaj farado de bono, ĵetante la benatajn semojn de frateco de la posteularo.

Sed Ateno, kvazaŭ cerbo de la mondo, malgraŭ sia granda progreso, ne sukcesas kompreni la altan lecionon de la eminenta sendito de Jesuo.

Sokrato estas akuzita pri malvirtigo de la atenaj junuloj kaj inokulo de la veneno de libereco en iliaj koroj.

Arestita kaj humiligita, tamen lia nobla spirito ne malkuraĝiĝis antaŭ la krudaj provoj, transbordantaj el lia kaliko da amaraĵoj. Koscia pri la misio, kiun li alportis, li evitis forkuri el la karcero, kies pordoj sekrete al li estis malfermitaj de la grandanimeco de kelkaj juĝistoj.

La senditoj el la nevidebla mondo ĉirkaŭas lian noblan kaj kompreneman koron, en la horoj plej krudaj kaj doloraj de lia provado; kaj kiam lia edzino Ksantipa montriĝas ĉe la kradoj de la malliberejo por komuniki al li tiun abomenindan kondamnon al la morto per cikuto, jen ŝi ekkrias en la apogeo de siaj angoro kaj malespero:

– “Sokrato, Sokrato, la juĝistoj vin kondamnis al morto...”

– “Kion do tio signifas? – rezignacie respondis la filozofo – ili ankaŭ estas kondamnitaj de la Naturo.”

– “Sed tia kondamno estas maljusta...” – ankoraŭ singultante diris la konsternita edzino.

Kaj li kun pacienca kaj amema rigardo demandas:

– “Ĉu vi volus, ke ĝi estu justa?”

Posedante bravan kaj rezignacian heroecon, Sokrato forlasas la Teron, ree altiĝante al la konstelacia firmamento, kie lin atendis la beno de Jesuo.

### La disĉiploj

La granda filozofo, kiu instruis al Grekujo la plej belajn virtojn, kiel antaŭinto al la kristanaj principoj, postlasis plurajn disĉiplojn, el kiuj distingiĝis Antisteno, Ksenofonto kaj Platono. Ni parolos nur pri tiu lasta, por klarigi, ke neniu el ili povis perfekte asimili la moralan strukturon de la neforgesebla majstro. La Historio laŭdas la paroladojn de Platono, sed ĝi ne ĉiam komprenis, ke li miksis la puran filozofion kun la gango de la surteraj pasioj, kaj multfoje li iris komplikitajn politikajn vojojn. Li ne povis, kiel ankaŭ multaj el liaj kunuloj, teni sin ĉe alta spirita supereco, kaj li eĉ prav-

igis la tiranan rajton de la sinjoroj sur iliajn sklavojn, sen ia ampleksa vido je la interhoma frateco kaj universala familio.

Li tamen ne detenis sin kulturi kelke da kristanaj principoj postlasitaj de la granda mentoro, antaŭinte la apostolojn de la Evangelio, antaŭ ol transdoni sian doktrinan taskon al Aristotelo, ankaŭ laboronta por la alveno de la Kristanismo.

### **Kolektiva provado de Grekujo**

La kondamno de Sokrato estis unu el tiuj transcendentaj kaŭzoj de doloraj amaraj kolektivaj provoj por ĉiuj spiritoj, kiuj partoprenis en ĝi, laŭ la ĝusta mezuro de la personaj prirespondecoj inter si.

Kaj tial ni poste vidas la noblan kaj kleran popolon de Ateno liverantan altvalorajn kaj saĝajn sklavojn al la agresemaj kaj energiaj spiritoj de Romo. Ili veturis sur luksaj galeroj, humiligitaj kaj premataj, malgraŭ siaj altaj komprenoj pri vivo, amo, libereco kaj justeco.

Vere ili estis markontaj novan periodon de spirita progreso por la romaj kolektivoj, per siaj lumaj instruoj, sed la evolua proceso povus preni aliajn vojojn, for de hommortigo kaj sklaveco. Tamen, sur la frunto de multaj kleraj grekoj kuŝis la sanga makulo de tiu maljusta kondamno, abomeninda makulo, kiun Grekujo devos forlavi per doloraj larmoj de pento kaj sklaveco.



## XI

### ROMO

#### **La etruska popolo**

Konstatinte la sindonojn al laboro, montratajn de ĉiuj Spiritoj sin lokintaj sur la primitivan Italujon, tiam dividitan en du gravajn partojn, kiuj estis la Cisalpa Gallujo kaj la Granda Grekujo, norde kaj sude de la duoninsulo, la senditoj kaj helpantoj de Jesuo planis la fondon de Romo, rapide stariĝinta, kronita per multenombraj legendoj, por plenumi tiel grandan rolon ĉe la evoluado de la Mondo.

En tiu tempo la Valo de Pado estis loĝata de la Etruskoj, kiuj sentis sin humiligitaj de la konstantaj invadoj de la Galloj. El ĉiuj elementoj, konsistigintaj la praloĝantojn de la moderna Italujo, ili estis la plej klopodemaj, laboremaj kaj inteligentaj. Sur la regionoj de Toskanujo ili posedis grandajn industriojn de metalo, notindan mararmeon, elstaran progreson pri plugado kaj

precipe evoluintajn sentojn, kiuj ilin diferencigis de la plej proksimaj kolektivoj. Ili kredis la postvivadon kaj faris oferdonojn al la animoj de mortintoj, respektigante la diojn, kies ĉiutagajn disponojn ili supozis koni laŭ la ordinaraj fenomenoj de la Naturo. Turmentitaj kaj ĉagrenitaj de la konstantaj luktoj kun la Galloj, la Etruskoj decidis provi novan vivon kaj, nerekte gviditaj de la senditoj el la nevidebla mondo grandnombre ekloĝis en la Romo de la estonteco, kiu tiam estis nenio alia ol modesta kaj senprotekta kabanaro.

### Unuaj tempoj de Romo

Nature defendita de la konstanta popola densiĝo, tiu urbo dronigis siajn originojn en profundan riveron da kuriozaj kaj mirindaj historioj, en kiuj la personoj de Eneo, Rhea Silvia, Romulo kaj Remo prenas elstaran kaj tre strangan rolon.

Sed la vero estas, ke la Etruskoj plejparte starigis siajn unuajn urbajn organizojn, fondante laborlernejojn, tien transportante la plej altvalorajn spertojn de aliaj popoloj, kreante ian novan landon per sia energia kaj decida klopodo. Tie ili renkontis la latinajn tribojn de Ramnanoj, Titanoj kaj Luceranoj (\*), unuigintajn por komuna laboro, kiujn ili longe estris, konstruante la bazojn de la estontaj realigoj.

Kiam Romulo alvenis, tiam liaj okuloj rigardis ian prosperan kaj laboreman urbon, al kiu li trudis sian energian inteligenton, sed al la posteularo ne mankis imagpovo por teksti al li legendan fantazioplenan kronon, eĉ asertante, ke lia persono estis forkaptita en la ĉaron de la dioj, direkte al la ĉielo.

### Decidigaj unfluo

Nenece estas fari la nekropsion de la Historio je ĝiaj punktoj pli disvastigitaj kaj konataj, ĉar nia sola

---

(\*) Latine “Rhamnenses”, “Titienses” kaj “Lucerenses”. –

intenco estas faciligi la komprenon de la leganto, rilate la direktadon de nia planedo, efektive sidantan en la spirita mondo, kie la Kristo senĉese zorgas pri la terглоbo kaj ĝiaj destinoj. Sed por fundamenti nian aserton pri la etruskaj influoj en la unuaj tempoj de Romo, ni estas devigataj rememori la figuron de Tarkvinio Prisko, ido de Etruskujo, kiu alportis al tiu urbo grandajn reformojn kaj multenombrajn novaĵojn en ĉiujn departementojn de ĝiaj solidigo kaj progreso, citante, inter liaj novaĵoj, la verkojn Kloako Maksimuma kaj Kapitolo. Lia posteulo Servio Tulio ankaŭ estis el lia familio. Ĉi tiu dividis la tutan popolon de tiu urbo en klasojn kaj centuriojn, laŭ la financaj situacioj de ĉiu homo, ĉagrenante la patriciojn, jam organiziĝintajn en tiu tempo, pro tio, ke tiu reformo sin prezentis laŭ liberalaj aspektoj, malgraŭ siaj militaj celoj.

Sed la etruskaj influoj sur la romanajn organizojn pli evidentiĝis ĉe la popola animo, sindoninta al genioj, al dioj kaj al ĉiaspecaj superstiĉoj, kiuj multiĝis pro ĝia kontakto kun Grekujo. Ĉiu familio, same kiel ĉiu hejmo, posedis sian nevideblan kaj amikan genion, kaj en la socio disvastiĝis la religiaj anaroj, kulminante per la kolegio de la Pontifikoj, kies fondo okazis en la fora pasinteco de tiu urbo. Tiu Kolegio poste estis anstataŭita de la Plejalta Pontifiko, superega estro de la religiaj anaroj, de kiu la romaj episkopoj pli malfrue eliris la Vatikanon kaj la Papismon de la nunaj tempoj.

La romanoj, kontraŭe al la atenanaj, ne zorgis pri multaj transcendaj demandoj pri religio kaj filozofio, atentante nur la problemojn pri ekstera kulto, sen multaj argumentoj kun la logikeco, kaj sekve de tio, pro la evoluo de tiu urbo, la Panteono, ilia plej aristokrateca templo, eĉ posedis pli ol tridek mil diojn...

### **Patricioj kaj plebanoj**

Post la lastaj Tarkvinioj, penintaj intensigi la militajn potencojn de la reĝeco, estis proklamita la Respubliko, kiu restas regata de du patriciaj konsuloj,

helpataj de la Senato. Grandaj planoj estas plenumataj por solidigi la roman superregadon, sed la malriĉaj klasoj, premataj de la plej riĉaj, ĝuantaj ĉiujn rajtojn, ribelis antaŭ tia peniga situacio, en kiun lokis ilin la ebloj de la diktaturo rekomendata de la senatanoj kun, en specialaj okazoj, ampleksaj suverenaj povoj super ĉiuj demandoj de vivo kaj morto de ĉiu homo.

Inspiritaj de la spiritaj fortoj ilin helpantaj, la plebanoj amase forlasis la urbon, irante sur la Sanktan Monton, sed la patricioj, esplorante la gravecon de tiu ekstrema ago, venigis al ili Menenion Agripion, kiu feliĉe plenumis la komision, kiun li ricevis, rakontante al la ribelintoj la apologon pri la gamboj kaj la stomako, konsistigantaj, en la meĥanismo de sia harmonio, ian perfektan korpan organismon. La plebo konsentas reveni al la urbo, sed altrudante kondiĉojn preskaŭ tute akceptitaj. La tribunusoj de la plebo tiam inaŭguras periodon de belaj konkeroj de la homaj rajtoj, atingante la kulminon per la Kanuleja Leĝo, konsentanta geedziĝon inter patricioj kaj plebanoj kaj per la Ogulnia Leĝo, donanta al ĉi tiuj lastaj la sacerdotaĵn funkcion mem.

### **La romana familio**

Multe ni povus komentarii ekster la Historio, sed niaj celoj estas aliaj, konsiderante nian devon ĉi tie reliefigi la romanajn virtojn, en la starigo de la familia grupo, pri multaj cirkonstancoj supera ol tiu de Grekujo plena de saĝo kaj beleco.

La romana familio, laŭ siaj gloraj tradicioj, estas bazita sur la plej alta respekto al la heroecaj virtoj de virino kaj sur la perfekta kompreno de la homaj rajtoj, antaŭ siaj posteuloj kaj antaŭuloj.

Kiam ni rememoras Romon en ĝia ora laborperiodo, niaj okuloj pleniĝas de amaraj larmoj... Kia malbeninda genio enmiksiĝis en tiun organizon respektindan je ĝiaj plej internaj fundamentoj, formanĝante ĝiajn plej noblajn esperojn, koruptante ĝiajn sentojn, malstreĉante ĝiajn energiojn? Kia pereiga forto faligis ĉiujn ĝiajn

glorajn statuojn de virto? La kompatema mano de Jesuo vane malleviĝis sur ĝian frunton, levante ĝin de teruraj faloj, antaŭ la spektakloj de ĝia desruiniĝo. La misuzoj de povo kaj libereco de ĝiaj loĝantoj faris el la nesto de amo kaj laboro ian amason da ruinoj, kaj dronigis ĝin en ian maron da sanga ŝlimo.

### **Militoj kaj la tera plenaĝeco**

Sed baldaŭ la romana familio, plena de tradicioj de granda beleco, estis disŝirita de la militaj genioj kaj de la militemaj spiritoj.

La senĉesa progreso de la urbo kreis ĝeneralan inklinton al ekspansio en ĉiujn regionojn.

Tamen la rudimentoj de la Romana Juro kaj la organizado de la familio signis la periodon de la tera plenaĝeco. La homo kun tiaj konkeroj estis flugonta en plej altajn spiritajn sferojn.

La grandanimaj legioj de la Kristo pretiĝas por la lastaj preparoj de siaj gloraj vojoj sur la supraĵo de la mondo. La Evangelio devos alveni, kiel eterna mesaĝo de amo, lumo kaj vero por ĉiuj estuloj.

Sed la persona kaj kolektiva libereco estas respektata de la nevidebla mondo, kaj Romo ne sin montras inda je la multenombraj ricevitaj donoj. Anstataŭ etendi siajn ligilojn de edukado kaj konkordo, ĝi lasas sin kateni de legio da agresemaj kaj ambiciaj spiritoj, larĝigante sian influon en la mondo per la balistoj kaj katapultoj de siaj militistoj. Post konkero de la Duoninsulo, ĝi entreprenas la konkeron de la mondo, per la punikaj militoj, eĉ submetante la tutan Orienton, kie ankaŭ troviĝis la elĉerpita kaj venkita Grekujo.

La senditoj de la Kristo harmoniigas tiujn terurajn movadojn en la institucio por la provoj necesaj al la individuoj kaj al ties grupoj; sed la realo estas, ke Romo ankaŭ prenis sur sin la plej pezajn respondeciojn kaj la plej penigajn ŝuldojn, antaŭ la dia justeco. Ĝiaj venkantaj agloj tiam krozas sur ĉiuj maroj; Mediteraneo estas ĝia propraĵo kaj la Roma Imperio estas la Imperio

de la homo, kaj la direktanta voĉo de nur unu homo aŭdiĝas por preskaŭ ĉiuj loĝatigataj regionoj de la Tero.

### **En la antaŭtagoj de la Sinjoro**

Sed la fortoj el la nevidebla mondo ne ripozis. Multe da larmoj estis elverŝitaj en la Supro, antaŭ tiaj pereigaj okazaĵoj.

La Kristo vokas al kunveno ĉiujn grupojn de siaj senditoj. La Tero ne povas perdi sian spiritan pozicion, post la konkeroj de la atena saĝeco kaj de la roma familio.

Tiam, jen la anĝelecaj estuloj de la sistemo moviĝas sur la ĉirkaŭaĵojn de la Tero, kun disponoj de vasta kaj ĝusta graveco. La leciono de la Kristo nun devos brilegi por la homoj, kontrolante ilian liberecon per perfekta praktikado de amo. Ĉiuj planoj efektivigas. Estas elektitaj la instruantoj, la senperaj antaŭuloj, la diaj helpantoj. Tiam ia unika aktiveco estas rimarkata en la sferoj pli proksimaj al nia planedo, kaj kiam Aŭgusto estris en la sidejo de la regado de la mondo, tiam estis vidata ia nokto plena de lumoj kaj mirindaj steloj. Diaj harmonioj kantis himnon de plej dolĉaj esperoj en la koro de la homoj kaj de la Naturo. La stalo estas la teatro de ĉiuj glorigoj de la lumo kaj de la humileco, kaj dum komenciĝis ia nova erao por la terglobo, neniam plu oni forgesos Kristnaskon, la “nokton silentan, nokton sanktan”.

## XII

### LA ALVENO DE JESUO

#### **La staltrogo**

La staltrogo signis la komencan punkton de la savanta leciono de la Kristo, kvazaŭ dirante, ke humileco estas la ŝlosilo de ĉiuj virtoj.

Tiam komenciĝas la definitiva erao de la spirita plenaĝeco de la surtera Homaro, ĉar Jesuo, per sia dia ekzemplado, transdonos al ĉiuj koroj sian kodon de frateco kaj amo.

Vane la materialismaj verkistoj de ĉiuj tempoj diskonigis la grandan okazaĵon, priironante la altajn mediumajn fenomenojn, kiuj antaŭiris ĝin. La figuroj de Simeono, Anna, Elizabeta, Johano la Baptisto, Jozefo kaj ankaŭ la plej pura persono de Maria multfoje estas objekto de maljustaj kaj malicaj kritikoj; sed vere estas, ke nur per helpo de tiuj kurieroj de la Bona Novaĵo, portantaj la kontribuajon de fervoro, kredo kaj

vivo, Jesuo povis ĵeti sur la Teron la fundamentojn de la neskuebla vero.

### **La Kristo kaj la esenoj**

Multajn jarcentojn post lia nekomprenata ekzemplado ekzistas iu, kiu vidas lin inter la esenoj, lernantan iliajn doktrinojn, antaŭ lia mesiado de amo kaj savo. La sferoj mem proksimaj al la Tero, kiuj, pro forto de la cirkonstancoj, pli interesiĝas pri la homaj diskutoj, ol pri la sincera lernado de la spiritoj studemaj kaj malligitaj je la terglobo, spegulas la interkontraŭajn opiniojn de la Homaro pri la Savanto de ĉiuj kreitoj.

Sed la Majstro, malgraŭ la alta kulturo de la esenaj skoloj, ne bezonis ilian kontribuadon. Ekde siaj unuaj tagoj sur la Tero, Li montris sin tia, kia Li estis kun sia supereco, kiun nia planedo ekkonis de la foraj tempoj de la komenco.

### **Plenumo de la profetaĵoj de Izraelo**

Pri lia dia apostoleco ni diros nenion aldone al la tradicioj, kiujn la evangelia kulturo prezentis en ĉiuj jarcentoj post lia veno sur la Teron, sed ni reasertu, ke lia leciono de amo kaj humileco estas unika en ĉiuj tempoj de la Homaro.

Pri Li kategorie diris la profetoj el Izraelo multe da tempo antaŭ la staltrogo kaj Kalvario: – “Li elkreskis antaŭ Li kiel juna branĉo kaj kiel radiko en tero senakva... kaj kiel iganta deturni de li la vizaĝon, li estis malestimata, kaj li havis por ni nenian valoron. Li estis malestimata kaj evitata de homoj. Vere, niajn malsanojn li portis sur si, kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis. Sed ni opiniis lin plagita, frapita de Dio, tamen li estis vundita pro niaj pekoj kaj per lia vundo ni saniĝis. Ni ĉiuj erarvadis kiel ŝafoj, sed por reunuigi nin sur la vojo al la Eternulo, li suferis la kulpon de ni ĉiuj. Li estis turmentata, tamen li humiliĝis, kiel ŝafido



kondukata al buĉo, li ne malfermis sian buŝon. Inter malbonuloj oni donis al li tombon, inter riĉuloj post lia morto, kvankam li ne faris maljustaĵon. Kiam lia animo estos preninta sur sin elaĉetan punon, li vidos idaron, kaj la intencon de la Eternulo sukcesos per lia mano.”

### **La granda leciono**

Vere la mondo estis grandega grego erarvaganta. Ĉiu popolo faris el la religio ian novan fonton de vantaĵoj, kaj ni atentigas, ke multe da religiaj kultoj el Oriento iris sur la liberan terenon de diboĉo kaj senmoralco; sed la Kristo estis kunportanta en la mondon la eternajn fundamentojn de la vero kaj de la amo. Lia milda kaj sankta vorto kolektis ĉiujn malfeliĉulojn kaj pekulojn. Li preferis tiujn plej malriĉajn kaj plej simplajn mediojn por intense travivi siajn superbelaĵajn lecionojn, montrante al la homoj, ke la vero por esti aŭdata en sia mistera beleco ne bezonas la luksan scenejon de aeropagoj, forumoj kaj temploj. Liaj predikoj sur publika placo okazis por tiuj plej senprotektaj kaj forlasitaj homoj, kvazaŭ vidigante, ke lia parolo estas unuiganta ĉiujn kreitojn en la sama vibro de frateco kaj sur la sama luma vojo de amo. Li pace kontraŭbatalis ĉiujn oficialajn perfortojn de la judismo, renovigante la Malnovan Leĝon per la doktrino de klarigo, toleremo kaj pardono. Li diskonigis la plej klarajn vidojn pri la senmorta vivo, instruante al la surteraj homoj, ke ekzistas io supera ol la patrujoj, la standardoj, la sango kaj la homaj leĝoj. Lia profunda, energia kaj favorkora parolo refandis ĉiujn filozofiojn, prilumis la vojon de la sciencoj kaj jam estus kunfratiginta ĉiujn religiojn de la Tero, se la krueleco de la homoj ne estus metinta la pezilon de maljusteco sur la pesilon de savo.

### **La dia parolo**

Ni ne devas doni ian novan interpreton de la eternaj vortoj de la Kristo en la Evangelioj. Tia interpreto estas

farita de preskaŭ ĉiuj religiaj skoloj en la mondo, tamen iliaj societoj kaj adeptoj devas efektiviĝi lian senmortan instruon, aplikante ĝin al si mem, en la meĥanismo de la interrilata vivo, por realigi la komunan renoviĝon per noblaj ekzemploj, ĉar, se la staltrigo kaj la kruco estas neforgesebla instruoj, por ni multe pli valoras la ekzempl-oj de la Dia Majstro ĉe la sortovicoj de la surtera vivo.

Por ĉiuj departementoj de la surtera ekzistado, liaj neforgeseblaj lecionoj havas sekvojn, kiuj celas renovigi la sociajn kaj politikajn instituciojn de la Homaro, per la morala transformado de la homoj en ia nova epoko de ekonomia justeco kaj universala harmonio.

Povas ŝajni al ni, ke la venkoj de la vera Kristanismo ankoraŭ estas tre malproksimaj, kaŭze de la materialismaj doktrinoj de la estanteco, sed ni devas konfesi, ke du mil jaroj jam forpasis ekde la dia parolo. Du mil jaroj, en kiuj la homoj disŝiris sin en lia nomo, elpensante standardojn de aparteco kaj detruo. Ili faris bruligon kaj buĉon en nomo de liaj instruoj de pardono kaj amo, kruele estingante esperon en ĉiuj koroj. Tamen la forpasanta jarcento devas signi ian tutan transformiĝon de la departementoj de la vivo. La doloro kompletigos tiujn bonfarajn verkojn de la kristana vero, ĉar la homoj forpelis la amon el siaj pensoj pri progreso.

### **Krepusko de ia civilizacio**

La nubo de fumo de longe formiĝas sur la horizontoj de la Tero plena de industrioj de morto kaj detruado. Ĉiuj landoj estas kunvokitaj ekzameni la valorojn de la spirita matureco de la Homaro, okazinta antaŭ du mil jaroj. La scienca progreso de la popoloj kaj iliaj plej noblaj kaj belaj konkeroj estas postulataj de la bankedo de hombuĉado kaj ambicio, kaj dum la politiko de la mondo sentas sin manligita antaŭ la doloraj fenomenoj de la jarcento, en la spacoj vidiĝas novaj movoj de laboro, ĉar la direktado de la Tero estas en la favorkoraj kaj respektindaj manoj de la Kristo.

## La ekzemplo de la Kristo

Sed ne parolante pri la problemoj de la pasema politiko de la mondo, ni ankoraŭ diru, ke la leciono de la Kristo restis por ĉiam sur la Tero, kiel trezoro por ĉiuj malfeliĉaj kaj por ĉiuj senprotektaj. Lia parolo konstruis la fidon en la animoj, kaj faris ilin duonvidi siajn glorajn destinojn. En okazo de bezono ni ree vidus la kredon kaj la esperon kuniĝantajn en novaj romaj katakomboj por restarigi la kristanan senton de la Homaro.

Ĝuste, en la humilaj kaj afliktitaj koroj ni multfoje renkontas la dian parolon kantantan la mirindan himnon de la feliĉaj.

Kaj por fermi ĉi tiun ĉapitron, pensante pri la influo de la Dia Majstro sur ĉiujn suferantajn korojn sur la Tero, ni rememoru la epizodon pri la monaĥo el Manilo, kiu, akuzita, ke li konspiras kontraŭ la jugo de la hispanoj, por restarigi la liberecon de sia patrolando, estis kondamnita al morto kaj kondukita sur la eŝafodon.

En la momento de la puno, senespere singultas la mizera kondamnito: – “Kiel do estas eble, ke oni mortigu min tiel senkulpa? Ĉu ne ekzistas justico? Kion do mi faris por suferi tiel abomenan punon?”

Sed iu kamarado kuras al li kaj flustras en lian orelon: – “Jesuo ankaŭ estis senkulpa!...”

Tiam ia lumo de mistera beleco preterpasas la okulojn de la viktimo. La larmoj forviŝiĝas kaj la sereneco revenas al lia suferanta vizaĝo, kaj kiam la ekzekutisto petas de li pardonon, antaŭ ol li streĉis la fatalan ŝraŭbon, tiam la monaĥo rezignacie respondas: – “Mia infano, mi ne nur vin pardonas, sed ankoraŭ petas vin, ke vi plenumu vian devon.”

## XIII

### LA ROMANA IMPERIO KAJ TIES DEVIJOJ

#### **La romanaj devioj**

Parolante ankoraŭ pri la romanaj konkeroj, antaŭ la alveno de la Sinjoro por la unuaj floradoj de la Kristanismo, ni devas memori la klopodon faritan de la spiritaj estuloj ĉe la aŭtoritatoj, organizantaj kaj subtenantaj la Respublikon, ke la komuna laboro turniĝu en grandan movadon de frateco kaj de unuiĝo de ĉiuj popoloj de nia planedo.

La pensuloj hodiaŭ revantaj pri kreado de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Mondo, sen tiuj abomenaj movadoj de fratmurdaĵoj militoj, povas sondi la planojn de la nevidebla mondo en tiu tempo. Grekujo laŭeble estis esplorinta ĉiujn transcendajn problemojn de la vivo. En siaj elaĉetaj luktoj, ĝi transdonis siajn spertojn kaj sciojn al la romana familio, tiam kapabla por la grandaj taskoj de la Ŝtato. Ĉi tiu lasta, per potenco de edukado

kaj amo, povus unuigi la standardojn de la terglobo, kreante novan vojon al la kolektiva evoluado kaj strekante la paralelajn liniojn de la fizika kaj morala progreso de la surtera Homaro. Tiurilate ĉiuj klopodoj estas faritaj de la senditoj de la nevidebla mondo, kaj la pruvo de tiu granda unueca laboro estas la Romana Imperio, verko el la plej belaj rilate al edukado, celanta la organizadon de la modernaj nacioj. Eĉ la domokrateca instinkto de Anglujo kaj Francujo, kaj ankaŭ iliaj altaj socialigaj verkoj estas fruktoj de la eduka misio de la Imperio ĉe la Homaro.

La vojo de la romanoj restis plena de semoj kaj lumoj por la estonteco.

Vere estas, ke, kvankam la senditoj de la Kristo sukcesis realigi multe da noblaj planoj ĉe la tiama kolektivo, ili tamen ne povis enmiksiĝi en la unuopan liberecon de la granda plimulto de ĝiaj membroj.

### **La misuzoj de la aŭtoritato kaj de la povo**

Baldaŭ la misuzoj de la aŭtoritato kaj de la povo ebruiĝis la bravan urbon. La tuta sidejo de la regado ŝajnis invadita de lavango da revoluciaj fortoj el la plej malaltaj sferoj de la nevideblaj mondoj.

La romana familio, kies spirita brilo sukcesis transpasi ĉiujn tempojn, prilumante la nunajn homgrupojn, ŝajnis turmentata de plej persistaj kaŝitaj malamikoj, kiuj iom post iom subfosis ĝiajn plej solidajn bazojn, dronigante ĝin en korupton kaj ekstermadon de si mem, pro manko de antaŭzorgo de ĝiaj plej antaŭantaj gardostarantoj. Densa nebulo malklarigis ĉiujn konsciojn, kaj la socio gaja kaj honesta, riĉa je nobligaj sentoj, estis paŝtejo de humiligaj krimoj, nigraj tragedioj kaj bedaŭrindaj murdoj. La riĉaj klasoj profitis la pov-eksceson kaj instalas sin en la premanta ĉaro, kiu lasadis post si la fumantan spuron de ribelo kaj sango. La Grakkoj, filoj de la respektinda Kornelia, estas preskaŭ la lastaj signoj de ia epoko karakterizita de energia

administrado, sed senpartia, plena de honesteco, de saĝeco kaj de justeco.

### **La estroj de Romo**

Post Kajo, murdita sur Aventino, kvankam oni supozigis tion memmortigo, definitive instaligis iu reĝimo de kompleta likvido de la grandaj realigitaj moralaj konkerroj.

Mario surtroniĝis post la venkoj super Jugurto kaj super la Germanoj, kiuj siavice estis invadintaj la landon de la Galloj. Sed la sociaj antagonismoj kondukas al estreco Sullon, kiu komencas sangajn batalojn, nigrajn antaŭsignojn de sangaj malvenkoj. Poste venas Pompeo kaj la revolucio de Katilino, kaj multe sukcesis la prudento de Cicerono favore por la sekureco de la urbo. Tuj poste fondiĝis la unua triumviraro laŭ la afableca politiko de Kajo Julio Cezaro, kiu aliĝis al Pompeo kaj Kraso por la plej altaj devoj de reganto.

Historiaj citaĵoj tamen deturnus nin de la objektoj, kiujn ni celas. Ni intencas montri, ke la determinismo de la spirita mondo estas tiu de amo, frateco kaj bono, sed la homoj mem, en la relativa sfero de sia libereco, alligis tiun superan determinismon, en la senhalta kuro de la civilizacio.

La romanaj generaloj povis per fero kaj fajro fari konkerrojn, deklinante sin de la plej sanktaj celoj de siaj devoj kaj ŝuldiĝoj, kunportante al aliaj popoloj, per forto de siaj armiloj, la ligilojn, kiujn ili devus utiligi per kulturo kaj sperto pri la vivo; sed iliaj agoj originigis la plej amarajn fruktojn de provado kaj sufero por la surtera Homaro, kaj tial preskaŭ ĉiuj el ili eniris en la spiritan mondon proksime sekvataj de siaj multenombraj viktimoj, inter malamaj voĉoj de plej akraj akuzoj. Multaj el ili, post jardekoj da senfinaj elaĉetaj suferegoj, povis esti vidataj sen siaj elegantaj armaĵoj, trenante sin kvazaŭ vermoj, laŭlonge de Tibero, aŭ etdante siajn naŭzajn manojn, kiel malŝatataj almozuloj de Eskvilino.

## La jarcento de Aŭgusto

Post la triumviraroj, jen estis plenumiĝonta la misio de la Kristo, post kiam instaligis la unuaj Cezaroj de la Romana Imperio.

La alproksimiĝo kaj la konsola ĉeesto de la Dia Majstro en la mondo estis motivo, ke ĉiuj koroj sentis ian novan vivon, kvankam ili ne sciis pri la dia fonto de tiuj vigligaj vibroj. Pro tio, la regado de Aŭgusto trankvile fluis por Romo kaj por la aliaj organizitaj socioj de nia planedo. Gigantaj edifaj aŭ rekonstruaj klopodoj realiĝis. Belaj monumentoj estis starigitaj. La artisma kaj filantropia spirito de Ateno reviviĝas en la persono de Mecenaso, konfidenculo de la Imperiestro, kies nobleco donas la plej karesan atenton al la lernemaj kaj superaj inteligentoj de tiu tempo, kiaj estas Horacio kaj Vergilio, kiuj, per siaj multenombraj verkoj, signis ĉe aliaj intelektuloj de tiu tempo la pasantan jarcenton, alnomitan “jarcento de Aŭgusto”.

## Transiĝo de ia epoko

Post Aŭgusto aperas sur la margeno de la Historio la hipokriteca kaj kruela persono de Tiberio, lia adopta filo, kiu vidas finiĝi tiun eraon de paco, laboro kaj konkordo, post reveno de la Ŝafido al la plej altaj regionoj de Lumo.

En lia regado Judujo efektivas la tragedion de Golgoto, nigre realigante la plej malnovajn profetaĵojn.

Malgraŭ sia kompatema kaj sindona amo, la Dia Majstro estis submetita al turmentegoj sur la kruco, pro trudo de la judismo, kiu ne komprenis liajn amon kaj humilecon. Romo kunkulpis pri tiu dolora okazaĵo, pro la malvarma indiferenteco de Poncio Pilato, kiu reiris al siaj festenoj kaj plezuroj, kvazaŭ li ne konus la plej noblajn celojn de la vivo.

Irinte la saman malluman vojdon de Tiberio, Kaligulo inaŭguras longan periodon da ombroj, hombuĉadoj, bruloj, ruinigo kaj sango.

## **Kolektivaj provoj de la judoj kaj de la romanoj**

La humilaj sekvantoj de la Nazaretano iniciatis en la regionoj de Palestino siajn predikojn kaj instruojn. Malmultaj apostoloj sciis pri la superbela misio de tiu sankta doktrino, kiu ordonis fari bonon por malbono kaj starigis pardonon al niaj malamikoj. De proksime sekvas ilian laboron la diligentaj senditoj de la Sinjoro, preparantaj la vojojn de la ideologia revolucio de la Evangelio. Tiuj senditoj de la Supro same kaj nerekte komencis la klopodon por helpi la Imperion ĉe ĝiaj doloraj kolektivaj provoj.

Iu perfekta laboro de selektado okazis en la spirita medio de la romanaj kolektivoj. Pluvis inspiroj el la Supro, antaŭvenantaj al la doloroj de Jerusalemo kaj la amaraĵoj de la imperia urbo. Nigraj antaŭdiroj pezas sur ĉiuj ribelemaj kaj kulpaj spiritoj, kaj estas vere, ke post la siĝo de Jerusalemo, kiam Tito detruis la urbon kaj ĝian faman Templon kaj dispelis por ĉiam la izraelidojn, la vantama venkinto vidis la sinsekvon de doloroj translokiĝi en la imperian socion, turmentatan de la tempestoj de fajro kaj cindro, kiuj malaperigis Stabion, Herkulanon kaj Pompejon, detruante milojn da florantaj vivoj kaj por ĉiam malekvilibrigante la roman-an ekzistadon.

## **Fino de la homa vantamo**

La Romana Imperio, kiu povus efektiviĝi la fondon de unu sola Ŝtato sur la supraĵo de la mondo, pro la mirinda unueco, kiun ĝi atingis, kaj danke la klopodon kaj protekton de la Supro, malaperis en maro da ruinoj, post siaj militoj, devioj kaj cirkoj plenaj de sovaĝaj bestoj kaj gladiatoroj.

La grandega organismo putriĝis de ulceroj, kiujn al ĝi kaŭzis la malzorgo kaj malico de ĝiaj idoj, kaj kiam ne estis plu ebla la paliativo de la favorkoreco de la abnegaciaj kaj kompatemaj spiritoj, pro la inklino de



ĉiuj sentoj al la larĝa tablo da ekscesoj kaj surteraj plezuroj, tiam la doloro estis vokita por la restarigo de la fundamento de la vero en la animoj.

El la fiero urbo de la imperiestroj restis nenio alia ol ŝtonoj sur ŝtonoj. Sub la vipado de la elaĉeto kaj sufero la kulpaj spiritoj ŝanĝis sian vestaĵon por la evoluo kaj elpago en la senfina scenejo de la vivo, kaj dum multaj el ili ankoraŭ ploras de la savantaj suferoj, super la ruinoj de la Koloseo de Vespaziano ĝemas la malgajaj kaj lamentaj ventoj de la nokto.

## XIV

### LA KRISTANA EDIFADO

#### **La unuaj kristanoj**

Atinginte ian periodon de nova kompreno, koncernanta la plej gravajn problemojn de la vivo, la tiutempa socio intime sentis la nesufiĉecon de la konataj filozofiaj skoloj, por solvi la grandajn demandojn. La penso pri ia pli perfekta justeco por la premataj klasoj fariĝis obsedanta temo de la sennomaj kaj suferantaj homamasoj.

Pro siaj superbelaj principoj de frateco, la leciono de la Kristo estis rifuĝejo de ĉiuj malesperaj kaj de ĉiuj malĝojaj. La amasoj da afliktitoj kvazaŭ aŭdis tiun favorkoran admonon: – “Venu al mi ĉiuj, kiuj suferas kaj soifas justecon, kaj mi vin helpos” – kaj de la kruco ankoraŭ venas al ili ia blovo de nekonata espero.

La ekzemplojn de la Majstro rememoris ne nur la popoloj de Judujo, rekte aŭdintaj liajn senmortajn instru-

ojn. Multenombraj centestroj kaj romaj civitanoj persone konis la kulminantajn faktojn de la predikoj de la Savinto. En la tuta Malgrand-Azio, en Grekujo, en Afriko kaj eĉ en Gallujo kaj en Romo, oni parolis pri Li, pri lia nova filozofio, reunuiganta ĉiujn malfeliĉajn, plena de la sanktaj lumoj de la regno de Dio kaj de ties justeco. Lia doktrino de pardono kaj amo alportis novan lumon al la koroj kaj liaj sekvantoj distingiĝis en tiutempa korupta medio, pro sia pureco de moroj kaj pro sia nobla kaj ekzempla konduto.

Komence, la aŭtoritatuloj de la Imperio ne donis pli grandan gravecon al la naskiĝanta doktrino, sed la Apostoloj instruis, ke laŭ Jesuo Kristo ne povos ekzisti diferenco inter liberaj kaj sklavaj, inter patricioj kaj plebanoj, ĉar ĉiuj estas fratoj, filoj de tiu sama Dio. La patriciaro ne povis aprobe vidi tiajn doktrinojn. La kristanoj estis akuzitaj kiel sorĉitoj kaj herezuloj, kaj la martirlibro komenciĝis per la unuaj ediktoj de ekzilo. La Ŝtato ne permesis la funkciadon de aliaj sendependaj societoj, krom tiuj konsiderataj kiel funebraj kooperativoj kaj uzante tiun escepton, la sekvantoj de la Krucumito komencis la famajn movadojn en la katakomboj.

### **La diskonigo de la Kristanismo**

Tiam, en Judujo kreskas la nombron da prozelitoj de la nova kredo. La esperhimno de la staltrogo disportis al la animoj ian mildan kaj eternan parfumon. Tiam, jen la Apostoloj, kies taskon la Kristo benis per sia favorkoreco, ĉie disverŝas la lumojn de la Bona-Novajo, disdonante la miraklan panon de la fido al ĉiuj malsatantaj je la koro.

La doktrino de la Krucumito diskoniĝas en palpebruma daŭro.

Oni parolas pri ĝi tiel en Romo, kiel en Gallujo kaj en nordo de Afriko. Aperas advokatoj kaj maljustaj akuzantoj. La plej eminentaj prozelitoj penas prediki, dissemante ideojn kaj interpretojn. La unuaj eklezioj

fondiĝas ĉe ĉiu apostolo aŭ ĉe ĉiu pli distingiĝa kaj studema disĉiplo.

La centralizo kaj unueco de la Romana Imperio faciligis la delokiĝon de la aliaj misiistoj, kiuj povis prediki en la plej senfamaj lokoj de la terglobo, sen tiuj postuloj kaj malhelpoj de landlimoj.

Nenia doktrino atingis en la mondo tian pozicion rilate la preferon de la amasoj. Tiel estas, ĉar la Dia Majstro sigelis per ekzemploj la parolojn de siaj senmortaj lecionoj.

La plej granda revoluciulo de ĉiuj tempoj, Li ne uzis alian armilon, krom tiuj signifantaj amon, toleremon, edukadon kaj klarigon. Li kondamnis ĉiujn hipokritaĵojn, kontraŭstaris al ĉiuj oficialigitaj perfortoj, samtempe instruante al siaj disĉiploj senkondiĉan amon al la ordo, laboro kaj konstrua paco. Tial la Evangelioj fariĝis la libro plej preferata de la Homaro. Ĝiaj simpleco kaj sincereco sin montras en la traduko en ĉiujn lingvojn de la Tero, katenante la animon de la homoj inter la lumoj de la ĉielo, ĉe la milda sorĉo de ĝiaj rakontoj.

### **La redaktado de la definitivaj tekstoj**

En tiu tempo, kiam la supermezura milito de kritiko penis subfosi la senmortan konstruaĵon de la nova doktrino, la senditoj de la Kristo, celante la estontecon, direktas la definitivan redaktadon de la tekstoj, ne nur ĉe la Apostoloj kaj liaj disĉiploj, sed ankaŭ ĉe la nukleoj de la tradicioj. La plej distingiĝaj kristanoj ŝanĝas inter si leterojn de alta doktrina valoro por la pluraj eklezioj. Ili estas mesaĝoj pri frateco kaj amo, kiujn la posteularo multfoje ne povis aŭ ne volis kompreni.

Multe da literaturaj skoloj fondiĝis en ĉi tiuj lastaj jarcentoj, meze de la historia kritiko, por esploro kaj klarigo de tiuj dokumentoj. La vorto “apokrifa” kvazaŭa birdotimigilo ĝeneraliĝis en la tuta mondo. Multaj historioj estis verkitaj. Sennombraj hipotezoj estis prezentitaj, sed la materialismaj saĝuloj, dum la studo de la religiaj pensoj, ne povis senti, ke la intuicio staras super

la racio, kaj plian fojon ili plejmulte eraris pri siaj elvolvado de principoj kaj prezentado de la grandaj personoj de la Kristanismo.

La grandeco de la doktrino ne kuŝas en tiu cirkonstanco, ke la Evangelio estas de Marko aŭ de Mateo, de Luko aŭ de Johano; ĝi kuŝas en la senmorta beleco, disradianta de ĝiaj diaj lecionoj, venkantaj la tempojn kaj altirantaj ĉiujn korojn. Ne venas utilo el la longaj diskutoj pri aŭtentikeco de ia letero de Ignaco el Antioĥio aŭ de Paŭlo el Tarso, se la absoluta rezonado ne posedas elementojn por konkludiga kaj necesa pruvo. La ĝenerala opinio gravitas ĉirkaŭ la plej eminenta kritikulo, laŭ la konvencioj. Sed literaturisto ne povos prezenti la matematikan ekvacion de tiu afero. Tiel estas, ĉar interne de la koro nur la esenco devas ĉion superstari por la animoj, kaj rilate al la plej altaj konkeroj de la fido, la intuicio devas paŝi antaŭ la racio, antaŭliverante valorajn kaj definitivajn sciojn.

### **La misio de Paŭlo**

Post la redaktado de la Evangelioj, kiuj sen ia dubo estas la eksterordinara fundamento de la Kristanismo, okazis en tiu tempo iaj malfacilaĵoj, ke oni donu al ili la grandvaloran universalan karakteron.

Ĉiuj apostoloj de la Majstro venis el la humila medio de liaj gloraj instruoj; sed kvankam tiuj bravaj fiŝkaptistoj estis altaj Spiritoj-misiistoj, ni tamen devas konsideri, ke ili estis tre malsuperaj ol la spiriteca situacio de la Majstro, suferante la influojn de la medio, kie ili troviĝis. Tuj post la reveno de la Ŝafido en la regionojn de Lumo, la kristana societo entute eksuferis la influon de la judismo, kaj preskaŭ ĉiuj grupoj organizitaj por la doktrino intencis tenadi aristokratecan mienon, antaŭ la aliaj eklezioj kaj societoj, fondiĝintaj en la plej multaj lokoj de la mondo.

Tiam Jesuo decidis voki la luman kaj energian spiriton de Paŭlo el Tarso al sia servado. Tiu decido estis unu el la plej signifoplenaj okazaĵoj en la historio

de la Kristanismo. La agoj kaj epistoloj de Paŭlo fariĝis potenca instrumento de universaligo de la doktrino. De urbo al urbo, de eklezio al eklezio, la konvertito apud Damasko, per sia grandega prestiĝo, parolas pri la Majstro, entuziasmigante ĉiujn korojn. Komence, inter li kaj la aliaj Apostoloj ekestis peniga situacio de nekomprenebleco, sed lia amema influo nepre celis eviti ian nepravigeblan aristokratecon de la kristana societo, en ĝiaj neforgeseblaj tempoj de simpleco kaj pureco.

### **La Apokalipso de Johano**

Kelkajn jarojn antaŭ ol finiĝi la unua jarcento, post la alveno de la nova doktrino, la spiritaĵoj jam faras ekzamenon pri la amara situacio de la mondo, antaŭ la estonteco.

Sub la egido de Jesuo ili starigas novajn planojn de progreso por la civilizacio kaj strekas iliajn unuajn liniojn por la eŭropaj landoj de la modernaj tempoj. Por la nevidebla mondo, Romo tiam jam estas nenio alia ol infekta fokuso, kiun oni devas neniigi aŭ formovi. Ĉiuj donoj de la Supro estis malŝatataj de la imperia urbo, aliiĝinta en vezuvion da pasioj kaj elĉerpiĝoj.

La Dia Majstro vokas al la Spaco la Spiriton de Johano ankoraŭ enkarniĝintan sur la Tero, kaj la Apostolo, mirigita kaj afliktita, legas la simbolan lingvaĵon de la nevidebla mondo.

La Sinjoro petis lin, ke li transdonu liajn instruojn al la planedo, kiel avertojn al ĉiuj nacioj kaj ĉiuj popoloj de la Tero, kaj la maljuna Apostolo el Patmo transdiras al siaj disĉiploj la eksterordinarajn avertojn de la Apokalipso.

Ĉiuj faktoj post la ekzistado de Johano tie estas antaŭviditaj. Estas vero, ke ofte la apostola priskribo penetras en terenon pli obskuran; oni vidas, ke lia homa esprimo ne povas fidele kopii la dian esprimon de liaj vizioj de vivanta intereso por la historio de la homaro. Militoj, estontaj nacioj, venontaj turmentoj, merkantilismo, ideologiaj luktoj de la okcidenta civilizacio tie

estas detale antaŭdiritaj. Kaj la plej dolora figuro tie priskribita, kiu ankoraŭ sin prezentas al la vido de la moderna mondo, estas ja tiu de la deviinta roma eklezio, simboligita per besto vestita per purpuro kaj ebria de la sango de la sanktuloj.

### Identigo de la apokalipsa besto

Laŭ la Apokalipso, la besto povus diri grandaĵojn kaj blasfemojn dum 42 monatoj kaj ĝia numero estas tiu 666 (Apokalipso, 13:5 kaj 18). Esplorante la gravecon de la simboloj en tiu tempo kaj sekvante la vojon de la ĝustaj interpretoj, ni povas preni ĉiun monaton, kvazaŭ konsistantan el 30 jaroj, anstataŭ el 30 tagoj, kaj tiel ni ricevos periodon da 1 260 ordinaraĵoj, ĝuste tiun periodon inter 610 kaj 1870 de nia erao, kiam la Papismo firmiĝis, post sia apero en la regado de la imperiestro Fokko (\*), en 607, kaj la dekreto pri la papa neeraremo en la regado de Pio IX, en 1870, kiu markis la dekadencan kaj mankan de aŭtoritateco de la Vatikano, antaŭ la scienca, filozofia kaj religia evoluoj de la Homaro.

Rilate la numeron 666, ne parolante pri la interpretoj per grekaj numeroj, laŭ iliaj valoroj, ni uzu la romanajn ciferojn, laŭ ties signifo, ĉar ili estas pli disvastigitaj kaj konataj, kaj ni klarigu, ke la Ĉefpontifiko estas tiu, kiu uzas da titolojn “VIKARIVS GENERALIS DEK IN TERRIS”, “VICARIVS FILII DEI” kaj “DVX CLERI”, tio estas “Ĝenerala vikario de Dio sur la Tero”, “Vikario de la Filo de Dio” kaj “Ĉefpastro de la Klerikaro”. Sufiĉos al studemulo iom da pacienco por adicii la romanajn ciferojn troviĝantajn en ĉiu papa titolo kaj li renkontos la saman ekvacion de 666, en ĉiu el ili.

Oni do vidas, ke la Apokalipso de Johano havas neordinaran gravecon por la destinoj de la surtera Homaro.

---

(\*) Greka imperiestro en 602, detronita kaj murdita de Heraklo en 610. – **La Trad.**

### **La gvidilo de lumo kaj amo**

Sed ni revenu al niaj celoj, devante rekoni la Evangeliojn, kiel ian mirindan kaj dian lumon, kiun la senĉesa fluado de la jarcentoj ĝis hodiaŭ nur povis pliintenisgi kaj rebriligi. Tiel estas, ĉar ili resumas ĉiujn verkojn de paco kaj vero por la homa vivo, konsistigante gvidilon de lumo kaj amo, per kiu ĉiuj animoj povas sin levi al la lumplenaj montoj da saĝeco el la ĉieloj.



## XV

### EVOLUADO DE LA KRISTANISMO

#### **Penigaj romanaj kompromisoj**

La spiritaj fortoj senrezulte provis profiti la romanojn ĉe la plej alta direktado de la mondo. Oni neutile malavaris al la imperia urbo ĉiujn eblajn rimedojn. Oni ne forgesis la transportadon de grandegaj materiaj riĉaĵoj, ebligantaj la firmiĝon de unu sola Ŝtato sur nia planedo, samtempe farante tiujn paŝojn necesaj, laŭ morala vidpunkto. Vane oni transplantis en Romon la eksterordinaran atenan saĝecon kaj la amason de ĉiuj spertoj de la konkeritaj popoloj.

La enkarniĝintaj Spiritoj ne sukcesis forigi la malamindajn ligilojn de vantamo kaj ambicio, sentante sin perfiditaj en siaj plej profundaj energioj, farante pezajn ŝuldojn antaŭ la tribunaloj de la dia justeco.

La alveno de la Kristo sur la malluman kunvenejon de nia planedo, alportanta la luman mesaĝon de vero kaj

amo, signis la periodon de spirita plenaĝeco de la Homaro. Tiu plenaĝeco kuntrenis rajtojn, kiuj siavice fariĝis akompanataj de pliigo de respondeco kaj devoj por la solvado de grandaj edukaj problemoj de la koro. Dum malfermiĝis al la fizika homo plej vastaj horizontoj sur la kampo de la materia progreso, la Evangelioj fariĝis por la spirita homo ia gvidilo por aliaj laboroj, konvene edukante lin por la kuraĝaj konkeroj de scienco kaj libereco, celante la estonteco. La ĉefurbo de la mondo devus esti profitinta tiun edukan procedon, laŭ la planoj de la spirita mondo. Tamen pezaj fortoj el Mallumo aliĝis al la plej fortaj inklinoj de la surtera homo, konstante klinita al la ligiloj de malbono, lin katenanta al la Tero, kaj ligita al la plej krudaj instinktoj de sinkonservado, kaj, dum la abnegaciaj Spiritoj en la Alto ploras super la misuzo de libereco de la romanoj, la urbo de la cezaroj pli kaj pli ebriiĝas de la vino de malamo kaj ambicio, farante pezajn ŝuldiĝojn, interligante siajn sentojn kun la malamo de la venkitoj kaj de la humiligitoj, kreante nigrajn perspektivojn por la fora estonteco.

### **Kulpoj kaj doloraj elaĉetoj de la spirita homo**

Al la kompatema koro de Jesuo alvenas la doloraj preĝoj de ĉiuj laboristoj en lia benata kultivejo. Sed lia akravida rigardo penetras en la internon de la animoj kaj ne estis vane, ke Li rekomendis la kreskadon de tritiko kaj lolo sur la samaj kultivejoj, ke sole nur Li faru la apartigon en la tempo de rikolto.

La limigita agolibereco de la individuoj kaj kolektivoj estas plene respektata. Ĉiu respondas pri siaj agoj, ricevante laŭ siaj faroj.

Tial Romo havis oportunan okazon realigi siajn politikajn intencojn kaj planojn; sed la Dia Justeco akompanis ĉiujn ĝiajn paŝojn, ĉe ĝiaj grandegaj devioj, kompromitantaj por ĉiam la estontecon de la spirita homo, kiu nur nun ekkonos ian reĝustigon en la amareg-

aj transiĝoj de la forpasanta jarcento. Iu peza kaj mal-luma ligilo kunigis la konkerantan urbon kun la popoloj, kiujn ĝi humiligis. La malamo de turmentanto kaj de liaj malamikoj fandiĝis dum jarcentoj da provoj kaj elaĉetaj luktoj, por elmontri, ke Jesuo estas la fundamento de la Vero kaj ke nur la amo estas la sankta celo de la vivo. Tial konkeranto kaj konkeritoj, kunigitaj de malamo, kvazaŭ punlaboruloj katenitaj unu al alia en galeroj de sufero, iris de tempo al tempo, en la Spacon, antaŭ la superegan favorkorecon de la Filo de Dio, promesante reciprokajn kompenson kaj pagon en la venontaj jarcentoj, fondante la okcidentan civilizacion, kiel benatan laborejon por siaj novaj taskoj favore por frateco kaj regenerado.

La bonkoreco de la Majstro prosperigis bravajn kaj progresemajn urbojn, klerajn kaj abundoplenajn landojn, kie la defalintaj animoj trovos ĉiujn elementojn de edifado kaj pliboniĝo. La fizika homo daŭrigis la vertikalan linion de sia evoluado rilate konkeritojn kaj eltrovojn, sed ĉu eble la transcenda homo, la nemortema homo, eliris el la oceano da ŝlimo, en kiu li memvole dronis antaŭ du jarmiloj? Respondu al ni la angoraj atendoj de la nuntempo.

### **La martiroj**

Antaŭ ol la movado de diskonigo de la kristanaj pensoj, en la sino de la roma societo, la senditoj de Jesuo jam sin preparadis por helpi la misiulojn de la nova fido, antaŭsciante la reagon de la patricioj kontraŭ la principoj de frateco de la nova doktrino.

La pli riĉaj klasoj ne povis toleri tiajn principojn de egaleco, kiajn ordonis la lecionoj de la Nazaretano, konsideratajn kiel morala kovardeco, neakordigebla kun la fiera filozofio de la imperio, kaj tial ni vidas la kristanojn suferantajn la turmentojn de la persekuto, inicitita en la regado de Nerono el tiel doloraj kiel teruraj rememoroj. Neniun turmentilon oni forlasis ĉe la provado de la fido kaj de la konstanteco de tiuj rezignaciemaj

kaj heroecaj animoj. Skurĝon, krucon, punŝtipon, ungojn el fero, fajron, leonojn en cirko, ĉion oni memoris por pli granda efikeco de la persekutado al la sekvantoj de la Ĉarpentisto el Nazareto. Petro kaj Paŭlo transdonas sian vivon ĉe la gloraj sanktigaj turmentegoj kaj ekde Nerono ĝis Diokleciano ia peza nubo da sango kaj larmoj envolvas la kristanan animon, plene fidantan al la Dia Providenco. Marko-Aŭrelino mem, kies alta spirita staturaro ricevis de la Supro la mision ĉesigi tiajn frenezaĵojn, ne sukcesis bari la fluon da mallumaj fortoj, sed la sango de la kristanoj fariĝis suko de vivo por la diaj semoj de la Ŝafido, kaj iliaj sinoferoj estis ja fruktoj de la amplena vibrado de la instruado de la Kristo, kiu trairis la jarcentojn de la Tero por esti komprenata kaj praktikata en la venontaj jarmiloj.

### **La apologiistoj**

Sed la kristana doktrino trovis en la persekutoj siajn plej bonajn rimedojn de propagando kaj disvastiĝo.

Ĝiaj konsolantaj principoj trovis rifuĝejon en ĉiuj koroj, altirante la konsciencon de ĉiuj studemuloj kun libera kaj sincera animo. Oni rimarkas ĝian influon en la dua jarcento, en preskaŭ ĉiuj kampoj de la intelekta aktiveco, kun grandaj efikoj sur leĝoj kaj moroj. Tertuliano prezentas sian apologion de la Kristanismo, kun ĝeneralaj admiro kaj respekto. Klemento el Aleksandrio kaj Origeno ekaperas kun sia aŭtoritata parolo, defendante la kristanan filozofion kaj kun ili stariĝas efektiva armeo da voĉoj pledantaj por la afero de vero kaj justeco, de revirtiĝo kaj amo.

### **Fasto kaj preĝo**

Sed la kristanoj komence ne havis ian vidon je la laborkampo, kiu montriĝis al ili. Ili ne komprenis, ke kvankam fasto kaj preĝo estas granda virto, tamen ili fariĝas pli alta virto, kiam efektiviĝantaj en la kirlo de la senbridaj pasioj, en la regenerantaj luktoj, por utili

al tiuj, kiuj ilin ekrigardas. Ili ne tuj komprenis, ke tiuj evangeliaj ordonoj super ĉio signifas sinoferon por la proksimulo, persistadon ĉe la revirtiga klopodo, serenecon ĉe la aktiva laboro, kiu samtempe korektas kaj edifas. Enirinte en la monaĥan vivon, ili ekloĝis la dezerton, supozante, ke ili pli rapide revirtiĝus por la Ŝafido.

La dezirego eviti la homplenajn urbojn tiam vibrigis ĉiujn kredantojn kaj kaŭzis la mezepokajn erarojn, kiam la homo supozis trovi en la monaĥejoj la antaŭĉambrojn de la Ĉielo.

Oriento kun ĝiaj nombraj dezertoj kaj sanktaj lokoj ŝajnis la vojo de ĉiuj, kiuj deziris eviti la antrojn de pasio. Nur la granda monto de Nitrio eĉ posedis tridek mil anakoretojn, foririntajn el la mondumo kaj el la pereigaj plezuroj. Sed ekzamenante tiun nekonsilindan decidon en la unuaj tempoj, ni devas memori, ke la kristanoj estis forgesintaj, ke Jesuo ne deziras la morton de la pekulo.

### Konstanteno

La spiritaj fortoj akompanintaj kaj akompanantaj ĉiujn movadojn de la terglobo, sub la egido de Jesuo, penas starigi la bazon de novaj okazaĵoj, kiuj devas prepari la romanan societeton por la elaĉeto kaj provado.

La invado de la popoloj, kiujn oni konsideris barbaroj, tiam estis antaŭvidita.

La forta milita anarkio malfaciligas la solvon de la problemoj de la kolektivo, altigante kaj defaligante imperiestrojn en la daŭro de unu tago. Sentante la alproksimiĝon de grandaj eventoj kaj antaŭvidante la neeblecon teni la imperian unuecon, Diokleciano organizas la tetrarkion, aŭ registaron el kvar suverenoj, kun kvar grandaj ĉefurboj.

Post kiam li retiris sin en Salonon, lackonsumita de regtasko, okazas la milita ribelo, akklamanta imperiestro Konstantenon, filon de Konstancio Kloro, kontraŭante la disponojn de la du Cezaroj, posteuloj de Diokleciano kaj Maksimiano. La batalo okazas kaj

Konstanteno venkas Maksention ĉe la pordoj de Romo kaj penetras en la urbon, ke li estu triumfe akceptita. Ĉe li la Kristanismo altiĝas al la tasko de la Ŝtato per la edikto de Milano.

### **Papismo**

Ekde la deka persekutado, la Kristanismo estis konsiderata en Romo kiel mortinta doktrino, sed la senditoj de la Majstro ne ripozis ĉe sia nobla celo restarigi ĝiajn principojn. La historia fatalo postulis ĝian kunlaboron ĉe la kabinetoj de la politiko de la mondo kaj ankoraŭ unu fojon la nescieco de la homoj ne komprenis la donon de la spirita mondo, ĉar tuj post la venko, la romaj episkopoj petis maljustajn prerogativojn super siaj humilaj kunuloj de episkopeco. Tiu sama spirito de ambicio kaj imperialismo, kiu de longe ruinigadis la organismon de la imperio, ankaŭ ekposedis la eklezion de Romo, kiu aliĝis en suzerenon kaj kritikanton de ĉiuj ceteraj sur nia planedo. Kunlaborante kun la Ŝtato, ĝi sentigas la forton de siaj arbitraj decidoj. Dum tricent jaroj luktis la senditoj de la Kristo, penante subteni ĝin sur la vojo de amo kaj humileco, ĝis kiam ili ĝin lasis iri la vojojn de ombro, por la klopodo de revirtiĝo kaj sperto, kaj tuj kiam ili ĝin forlasis ĉe la peniga laboro perfektigi sin mem, tiam la imperiestro Fokko favoras la kreadon de la Papismo, en 607. Tiu imperia decido donas al la episkopoj de Romo privilegiojn kaj rajtojn ĝis tiam ne pravigitajn. Plian fojon la fiero kaj ambicio de la urbo de la cezaroj surtroniĝas. En 610 Fokko estas vokita al la nevidebla mondo, postlasante sur la terglobo la institucion de Papismo. De tiu dato komenciĝis periodo de 1260 jaroj da amareco kaj perforto por la fondiĝanta civilizacio.

## XVI

### LA EKLEZIO KAJ LA INVADO DE LA BARBAROJ

#### **Venroj de la Kristanismo**

Konstanteno sur sia vojo de realigoj sukcesis efektivi la novan administran organizadon de la Imperio, komenciĝintan en la regado de Diokleciano, dividante ĝin en kvar Prefektujojn, nome tiujn de Oriento, de Ilirio, de Italujo kaj de Gallujo, kiuj siavice estis dividitaj en diocezojn respektive direktatajn de prefektoj kaj episkopoj.

Pro la prestiĝo de la venkinto apud la ponto Mulvio, efektiviĝas la Ekumena Nicea Koncilio por batali kontraŭ la skismo de Ario, pastro el Aleksandrio, neinta la diecon de la Kristo. La unuaj katolikaj dogmoj kun praktika efiko de leĝo eliras el tiu eklezia kunsido en 325.

Post la regado de Konstanteno, ekaperas liaj filoj, ne sekvantaj liajn tradiciojn. Poste Juliano, nevo de la

imperiestro, surtroniĝis, provante restarigi la antikvajn diojn malprofite por la kristana doktrino, kvankam li komprenis la neefikecon de sia provo.

Sed ĉirkaŭ la jaro 381 ekaperis la figuro de Teodozio, deklaranta la Kristanisman oficiala religio de la Ŝtato, samtempe dekretante la forigon de la lastaj signoj de la romana politeismo. Tiam ĉiuj popoloj rekonas la grandan moralan forton de la doktrino de la Krucumito, por kies alveno miloj da homoj donis sian propran vivon sur la kampo de martirigo kaj sinofero, kaj en 390 oni vidis la imperiestron humile genuiĝi ĉe la piedoj de Ambrozio, episkopo de Milano, pentante pri la kruelaĵoj, per kiuj li sufokis la ribelon de la tesalonikanoj.

### **Komenco de la Katolikismo**

Sed la Kristanismo jam ne montriĝadis kun tiu sama humileco de la antaŭaj tempoj. Ĝiaj krucoj kaj kalikoj vidigis kunlaboron de oro kaj multekostaj ŝtonoj, apenaŭ memorigante la krudan lignon de la glora tempo de la apostolaj virtoj.

Ĝiaj koncilioj, kiaj, tiaj de Niceo, Konstantinoplo, Efezo kaj Kalcedono, ne estis kunvenoj, imitantaj tiujn trankvilajn kaj humilajn en Galileo. Ĝia kuniĝo kun la Ŝtato estis motivo por grandaj spektakloj de riĉeco kaj fiera vantamo, kontrastantaj kun la instruoj de Tiu, kiu ne posedis ŝtonon por kuŝigi sian dolorantan kapon.

La ekleziaj aŭtoritatoj komprenas, ke estas necese fanatikigi la popolon, kaj al ĝi altrudi siajn pensojn kaj konceptojn, kaj anstataŭ eduki la animon de la amasoj laŭ la altega leciono de la Nazaretano, ili akordiĝis kun sia prefero al la eksteraj solenoj, por la facila kulto al la ekstera mondo, kio estis tiel laŭ la gusto de la antikvaj romanoj nemulte inklinaj al la transcenda demandoj.

### **La roma eklezio**

La eklezio de Romo, kiu iam antaŭ la oficiala kreado de la Papismo konsideris sin tiu elektita de Jesuo,



prenante la rolon de posedanto de la ordonoj de Petro, ne preterlasis okazon por firmigi sian nepravigeblan superecon antaŭ la eklezioj de Antioĥio, de Aleksandrio kaj de la ceteraj en grandaj urboj de tiu tempo. Heredinte la morojn de la romanoj kaj ties multjarcentajn inklinojn, ĝi penis fari akordon kun la doktrinoj, kiujn la posteularo konsideris paganaj, aliigante la pure kristanajn tradiciojn, adaptante tekstojn, improvizante nepravigeblajn novaĵojn kaj fine organizante la Katolikismon sur la ruinoj de la kripligita doktrino. La episkopoj de Romo, trouzante la facilan interkonsenton kun la politikaj aŭtoritatuloj de la Ŝtato, trudis ĉiujn siajn ennovaĵojn, kontraŭante al la plej altaj celoj de la instruado de Tiu, kiu ordonis humilecon kaj amon, kiel grandajn vojojn al la elaĉeto.

Tial ekaperas novaj dogmoj, novaj doktrinaj formoj, la kulto por idoloj en la preĝejoj, la spektaklecaj festoj por la ekstera kulto, preskaŭ ĉiuj moroj prenitaj al la kontraŭkristana Romo.

### **La detruo de la imperio**

La malforteco kaj obstineco de la homoj ne permesis al ili kompreni, ke la Kristanismo estis vokita al la regtasko sole nur por eduki la sentojn de la regantoj kaj prepari ilin por alporti klarigon kaj fratecon al la aliaj popoloj sur la Tero, kiujn la kulturo de la Imperio tiam konsideris barbaroj.

Malgraŭ ĉiuj kontraŭaj klopodoj de la senditoj de Jesuo, Bonifaco III kreas la Papismon en 607, kontraŭmetante sin kontraŭ ĉiuj disponoj de humileco, kiuj devus regi la vivon de la Eklezio. La fortoj de malbono kun la neglektemo kaj vantamo de la homoj ekhavis relativan kaj paseman triumfon.

Sed la genioj de la Spaco, en la heleco de la suverena favorkoreco de la Sinjoro, kolektiĝas en la Senfino, farante novajn disponojn, koncernantajn la progreson de la homoj.

Ĉiuj rimedoj estis malavare donitaj al Romo, ke la politikaj kaj intelektaj esprimoj etendiĝu sur la terglobon, ampleksante ĉiujn homojn per la sama brakumo de amo kaj unueco; sed ĝia ĝenerala animo estis aliiginta ĉiujn santajn eblecojn de edifo kaj forneinta ĉiujn grandajn instruojn. Pezajn avertojn de la Supro ne mankis al ĝi, kiel la neforegesblaj kaj doloraj okazaĵoj de Vezuvio, en la urboj de Kampanio. Jarcentoj da lukto kaj instruo forfluis, sed la animo de la imperio ne tute komprenis siajn necesajn devojn.

Tiam Jesuo ordonas la transformadon de la organizita kaj potenca imperio. Ĝiaj fieraj agloj jam krozis ĉiujn marojn, Mediteraneo estis ĝia proprieto, ĉiuj popoloj sin klinis antaŭ ĝi por omaĝo kaj obeo, sed ia nevidebla forto forprenis de ĝi ĉiujn diademojn, eltiris el ĝi ĝiajn energiojn kaj reduktis ĝiajn gloriojn al amaso da cindroj.

Ĝis hodiaŭ la spirito esploranta la pasintecon demandas pri la motivo de tiuj nigraj detruoj; sed estas vero, ke ĉiuj fundamentoj sur la Tero kuŝas en Jesuo Kristo.

### **La invado de la barbaroj**

Tiuj ordonoj de la Kristo, post la regado de Konstanteno, estis sekvataj de la unuaj grandaj invadoj kun la Visigotoj, kiuj, forkurinte de la Hunoj, transiras Danubon kaj ekloĝas en la oriento de la Imperio, poste penetrante en Grekujon kaj Italujon, dissemante suferegojn kaj mortojn. Vanaj estas la venkoj de Stilikono, ĉar en 410 ili atingas la pordojn de Romo, kiu estas transdonita al prirabado kaj doloraj humiligoj.

En 405, Radagasio estas tiu, kiu ekiris antaŭ ducent mil soldatoj, direkte al la imperia urbo. Li estis venkita sed prirabis la plej fortajn romanajn ekonomiojn.

La elaĉetaj provoj de la Imperio daŭras plu en ia lavango da amaraj doloroj. Ekaperas la barbaraj fluoj de la Alanoj, de la Vandaloj, de la Suevoj, de la Burgundoj. En 450 la Hunoj komandataj de Atilo atakas Gallujon,

persekutante pacajn kaj sendefendajn homamasojn. La imperia unueco perdas sian tradicion por ĉiam. Per siaj venkoj Klodoveo fondas la monarkion de la Frankoj. La Bretonoj premataj de la invado kaj senigitaj je la helpo de la romanaj armeoj, petas helpon de la Saksoj, kiuj loĝatigas la sudon de Jutlando, poste organizante la Angla-Saksan Heptarkion.

Kion Romo devus fari per konstantaj edukado kaj helpado, tion tiuj krudaj kaj potencaj popoloj venis postuli per si mem.

La granda urbo de la Cezaroj povus esti evitinta la katastrofon de sia dispartiĝo, se ĝi estus portinta sian kulturon al ĉiuj koroj, anstataŭ ke ĝi estis haltinta tiom da jarcentoj ĉe la abunda tablo da plezuroj kaj de la seninterrompaj drinkadoj.

### **Kialoj de la Mezepoko**

La disfalo de la romana Imperio okazigis eksterordinarajn transformiĝojn en la mondo. Multe da heroecaj kaj bravaj animoj, kiuj reboniĝis en purigaj luktoj, malgraŭ tiu ŝlimeca medio de malvirtoj kaj senbridaj pasioj, definitive supreniris al pli altaj spiritaj tavoloj, nur revenante en la atmosferon de nia planedo por plenumado de nobligaj kaj sanktigaj misioj.

La ĝenerala malorganizo kun la revoluciaj movadoj de la aliaj popoloj de la terglobo, kiuj vane atendas la moralan helpon de la imperiestroj, kaŭzis longan stagnon de la evolujaj procesoj. Tiam, en tiu tempo de transiĝoj, kiu nun atingas sian kulminon, ni trovas la kialojn de la Mezepoko aŭ malluma periodo de la historio de la Homaro. Nur tiu mistika forto de la civilizacio povis klarigi la motivaĵon de la feŭdaj organizoj, post tiel grandaj konkeroj de la homa menso, rilate la grandajn problemojn de unueco kaj la politikan mondan centralizon. Tiel estas, ĉar nova ciklo de civilizacio komenciĝis sub la amoplana protektado de la Dia Majstro, kaj la lastaj spiritaj esprimoj de la granda imperio retiriĝis en la silenton de la sanktejoj kaj de la spiritaj izolejoj, por

plori en la soleco de la konventoj, ĉe la kadavro de la granda civilizacio, kiu ne povis viviĝi sian gloran destinton.

### **Intruantoj de amo kaj virto**

Pli altaj kaj bravaj animoj tiam reenkarneĝas sub la egido de Jesuo, por la granda tasko gvidi la politikajn fortojn de la roma eklezio, nun organizita laŭ la maniero de la pasemaj institucioj de la mondo. La Papismo estis kreo de fiero kaj maljusteco; sed la Kristo ne forlasas la plej malfeliĉajn kaj la plej mizerajn, kaj tial aperis en la sino mem de la eklezio kelkaj instruantoj de amo kaj virto, lernigante al la invadintaj popoloj la helan vojon de la evoluado, ilin kondukante en la kristanan penson kaj destinante ilin por la lumaj tempoj de la estonteco.

## XVII

### LA MEZEPOKO

#### **La senditoj de Jesuo**

Dum la tuta VI jarcento, laŭ la decidoj efektiviĝintaj en la nevidebla mondo, aperas grandaj figuroj de saĝeco kaj bonkoreco, kontrastantaj kun la fiera vantamo de la katolikaj episkopoj, kiuj, anstataŭ heredi la trezorojn de humileco kaj amo de la Krucumito, postulis por si la luksan vivon, la honoraĵojn kaj prerogativojn de la imperiestroj. La ekleziaj estroj, altigitaj al la plej supera politika rango, ne memoris la apostolajn malriĉecon kaj simplecon nek la vortojn de la Mesio, kiu asertis, ke lia regno ne estas el ĉi tiu mondo.

Sed sur tiu marĉejo da ambicioj ankaŭ floris la lilioj de la favorkoreco de Jesuo, ĉe la plej altaj realigoj de sinofero kaj bonkoreco. Heroecaj kaj misiistaj spiritoj, kies plimulto ne aldonis siajn nomojn al la surtera historia galerio, funkciis kiel novaj sacerdotoj de la sankta

ideo de la Kristanismo, konservante ĝian dian fajron por la estontaj generacioj de nia planedo. Kvankam subordigitaj al la disciplino de la roma Eklezio, ili aŭdadis en la interno de sia koro la eternan kaj mildan parolon de la Dia Ĝardenisto kaj tial ili sciis, ke ilia misio estis tiu de rezignacio, sinofero kaj humileco. Romo povis negocadi pri la ekleziaj titoloj kun la politiko de la mondo kaj starigi la simonion en la sanktaj temploj, malzorgante pri la plej severaj devoj; sed ili, en siaj ĉifonaj tunikoj, trairos la mondon, predikante la evangeliajn promesojn, konstruos domojn de silento kaj favorkoreco, kie ili gardos la skribitajn tradiciojn de la sankta kulturo por la tagoj de la estonteco.

El tiuj armeoj da abnegaciuloj, sin organizintaj kun Jesuo kaj por Jesuo, en la sino de la Eklezio, ni estas devigitaj elstarigi la misiistojn benediktanojn, kies amoplena kaj pacienca klopodo kondukis grandan nombron da kolektivoj, konsiderataj barbaraj, precipe tiu el Ĝermanoj, en la konsolantan sinon de la ideoj de la Kristanismo.

### **La Bizanca Imperio**

Post la morto de la imperiestro Teodozio, tiam la konata mondo dispartiĝis en du imperiojn – tiun de Okcidento kaj tiun de Oriento – dividitajn inter liaj du filoj, Honorio kaj Arkadio. Pro la alsalto de la Heruloj en 476 malaperis la okcidenta imperio kaj kune kun ĝi, por ĉiam, la signoj de la integreco de la romana imperio, kaj poste, en 493, instaliĝas la ostrogota regno en Italujo, havante Ravenon kiel ĉefurbon.

Konstantinoplo tiam laŭrajte prenas la rolon de la granda imperia urbo. La bizanca imperio fariĝis do la gardanto de la romanaj leĝaro kaj moroj. Ia potenca blovo de latineco vivigas ĝiajn instituciojn. Sed vane la romanaj esprimoj serĉas rifuĝon sur aliaj landoj, celante ian ĉiamiĝon. Energiaj homoj, kia Justiniano, ne sukcesas ilin savi. Kaŝitaj kaj potencaj fortoj estis komisiitaj fari ilian radikalan renovigon, kaj, malgraŭ sia jarmila

rezisto, la bizanca imperio, heredanto de la Cezaroj, estis falonta senforta en 1453, ĉe la alsalto de Mahometo II.

### La Islamismo

Antaŭ la fondo de la Papismo, en 607, la spiritaj fortoj devis fari grandan klopodon ĉe la batalo kontraŭ la ombroj, minacantaj ĉiujn konsciencojn. Multaj senditoj de la Supro enkarnegis inter la katolikaj falangoj, celante rebonigi la kutimojn de la Eklezio. Sed vane ili provis revenigi Romon en la brakojn de la Kristo, nur sukcesante fari plej grandajn klopodojn ĉe la peniga laboro kolekti spertojn por la venontaj generacioj.

Multenombraj Spiritoj reenkarnegis kun la plej altaj komisioj de la nevidebla mondo. Inter tiuj misiistoj venis tiu, nomiĝinta Mahometo, naskiĝinte en Mekko, en 570. Li estis filo de la tribo de la Koraiŝitoj kaj havis la mision reunuigi ĉiujn arabajn tribojn sub la lumon de la kristanaj instruoj, por organizi en Azio fortan movadon por restarigo de la Evangelio de la Kristo, kontraŭ la romanaj trouzoj en Eŭropo. Sed Mahometo, malriĉa kaj humila en la komenco de sia vivo, kiu devus esti el sinofero kaj ekzemplado, fariĝis riĉulo post sia edziĝo kun Khadiĝa kaj li ne rezistis la sieĝon de la Spiritoj de Mallumo, perfidante noblajn spiritajn devojn per siaj malfortaĵoj. Dotite per grandaj mediumaj kapabloj esence propraj al plenumado de siaj kompromisoj, li multfoje estis admonata de siaj mentoroj de la Supro, ĉe la gravaj okazaĵoj de sia ekzistado, sed li ne sukcesis triumfi super siaj homaj malsupraĵoj. Ĝuste tial la misiulo de Islamo montras en siaj instruoj frapantajn kontraŭdirojn. Kun la kristana parfumo elspiranta el ĝiaj lecionoj ekzistas ia milita spirito de perforto kaj altrudo; kun la fatalisma doktrino, kiun la Korano entenas, ekzistas la doktrino pri individua respondeco, kaj en ĉio ĉi travidiĝas ia imagpovo superekscitita de la fortoj de bono kaj malbono, en cerbo deviinta de sia vera vojo. Tial la Islamismo, kiu povus reprezenti grandan movadon por restarigo de la instruo de Jesuo, korektante deviojn de la naskiĝanta

Papismo, signis plian venkon de la Mallumo kontraŭ la Lumo kaj kies radikoj estis necese eltiri.

### **La militoj de la Islamo**

Mahometo en siaj rememoroj pri la ŝuldiĝo, alportinta lin sur la Teron, pensante pri la laboroj, kiujn li devis realigi en Azio, por regeneri la Eklezion por Jesuo, vulgarigis la vorton “malpiulo” inter la pluraj familioj de sia popolo, tiel alnomante la arabojn al ĝi ne submetitaj, dum tiu esprimo pli ĝuste aplikigis al la sacerdotoj diviintaj de la Kristanismo. Post lia reveno al la spirita mondo, la tuta Arabujo estis submetita al lia doktrino, per la forto de la glavo; sed liaj disĉiploj ne montris sin kontentaj pri tiaj konkeroj. Ili iniciatis en la eksterlando la “sanktajn militojn”, subjugante la tutan nordan Afrikon en la fino de la VII jarcento. En la unuaj jaroj de la sekvanta jarcento, ili transiris la markolon Ĝibraltaro, venkante Hispanujon pro la malforta rezisto de la Visigotoj turmentataj de la dispartigo, kaj ili ne sekvis la vojon trans la Pireneoj nur pro tio, ke la spirita mondo difinis limon al iliaj bataloj, sendante Karol-Martelon por la venkoj en 732.

### **Karolo la Granda**

Post tiu tempo Jesuo permesas la reenkarniĝon de unu el la plej noblaj romanaj imperiestroj, sopirante helpi la eŭropan spiriton ĉe ties dolora dekandenco. Tiu estulo tiam naskiĝis kun la nomo Karolo la Granda, efektiva reorganizanto de la disaj elementoj por fondo de la okcidenta mondo. Preskaŭ analfabeto, li kreis la plej vastajn tradicojn de energio kaj bonkoreco per la supereco, karakterizanta lian ekvilibrecan kaj alte evoluintan spiriton. Dum 46 sinsekvaj jaroj da regado, Karolo la Granda intensigis la kulturon, korektis administrajn erarojn, kiuj regis la malorganizitajn popolojn de Eŭropo, postlasante la plej belajn perspektivojn por la latinaj popoloj.



Jesuo konas kiom da larmoj kostis al li la realigo de tiaspeca tasko, kies plenumado postulis la plej altajn kvalitojn de cerbo kaj koro. Sed antaŭsentante la dolĉajn emociojn, atendantaj lin en la spirita mondo, multenombraj nevideblaj amikoj, kunlaborintaj kun li en la Romo de rajto kaj devo, ĉirkaŭis lian personon en la vespero de Kristnasko en 800, kiam lia penso altiĝis al Jesuo, per preĝo, en la baziliko Sankta Petro. Ia ondo da harmoniaj vibroj invadas la luksan medion, nemulte propran por elmontroj de pura spiriteco. Leono III, la reganta papo, sentas sin tuŝita de nekomprenebla raviteco, kaj alproksimiĝante al la brava batalanto por la bono, metas sur lian frunton kronon el oro, dum la homamaso per emociaj kaj entuziasmaj voĉoj alnomas lin “imperiestro de la romanoj”.

Karolo la Granda vidas, ke tiu urbo ankaŭ estas lia. Ŝajnas al li, ke li revenas en foran pasintecon, rigardante la tiaman Romon plena de digno kaj virto. Dankante Jesuon por la diaj favoroj, lia koro elverŝas larmojn, same kiel Jeremio en la Jerusalemo de siaj doloroj.

Post kiam fluis nemultaj jaroj super tiu okazaĵo, la granda imperiestro revenas en la helecon de la Transmondo, por rekonigi, ke lia klopodo falis en la animojn, kiel beno, sed la imperio de li organizita nelonge daŭros.

### **La feŭdismo**

Post la noblaj atenaj akiroj rilate la administran politikon, post la grandaj prosperoj de la romana juro en la mondo, estas ne facile kompreni la kialon de la feŭdismo, etendiĝinta en Eŭropo, de la VIII jarcento ĝis la XII jarcento, ŝajnanta al la studemulo de la Historio ia malprogreso de la tuta civilizacio.

La tuta politika unueco malaperas dum tiuj tempoj de brilaj esperoj por la Homaro. La individua proprieto neniam antaŭe atingis tiel grandan gravecon kaj la morala servuto ĝis tiam ne ricevis tiel fortan impulson. Per tiu reĝimo la fratomurdaj bataloj havis vastan

kampon en la eŭropa teritorio, disputante pri ia hegemonio, neniam veninta al ekvacio per militaj movadoj. Nur la nemultaj kristanaj kvalitoj de la Katolika Eklezio sukcesis malgrandigi la pereigan karakteron de tiu situacio, starigante la tiel nomatajn “batalhaltojn de Dio”, devigantaj la militistojn ripozi dum difinitaj tagoj de la semajno, por memorfesti la pasaĝojn de la vivo de Jesuo Kristo kaj defendi la pacon per perioda ĉesigo de la bataloj.

### **Pravigo de la feŭdismo**

Sed tiu reĝimo estas facile pravigebla.

La misio de Karolo la Granda estis organizita de la nevidebla mondo, kiel unu el la plej grandaj provoj de reorganizado de la imperio de Okcidento, sed rimarkinte la senutilecon de tiu provo, pro la hardeco de la plimulto de la koroj, la spiritaj aŭtoritatoj, sub la egido de la Kristo, renovigis la edukajn procedojn de la eŭropa mondo, tiam, en la komenco de la nuna civilizacio, alvokante ĉiujn homojn por la vivo sur la kampo, ke ili pli bone lernu el la trakto kun la grundo kaj el la kontakto kun la Naturo. Nur la feŭdismo povis realigi tiun verkon, kaj ĝiaj normoj, kvankam krudaj, estis profititaj en la peniga lernejo por spiritaj akiroj, kie rezonado kaj sentebleco estis aperontaj por la konstruado de la jarmila verko de la civilizacio de Okcidento.

## XVIII

### LA MISUZOJ DE LA RELIGIA POVO

#### Fazoj de la Katolika Eklezio

Malgraŭ la multenombraj devioj de la roma Eklezio, forgesinta la kristanajn principojn, tuj kiam ĝi estis vokita al la kabinetoj de la politiko de la mondo, la Katolikismo neniam estis tute forlasita de la potencoj de la bono, en la spirita mondo. Sennombraj admonoj estis al ĝi senditaj en ĉiuj tempoj de ĝia historia vivo, de la favorkoreco de la Kristo, kompatanta la malpiecon de ĉiuj, kiuj sub lia nomo, makulis la altaron de la temploj.

Dum ĝi estis subordigita al la imperiestroj en Konstantinopolo, tiu katolika institucio klopodis liberiĝi de tia protekto, strebante al pli granda spirita sendependeco, nur akirita post la papo Stefano II, en 756, per la maljusta organizo nomata Heredaĵo de Sankta Petro, konsistanta el la grekaj teritorioj, konkeritaj al la

lombardoj koste de frapoj de glavo. En tiu tempo la pluraj suverenoj manovris la Eklezion laŭ siaj personaj kapricoj, donante ekleziulajn funkciojn al la plej putriĝintaj konsciencoj. La sidejo de la Katolikismo aliĝis en vastan komercejon de ĉiaspecaj nobelaj titoloj. Eĉ post la X jarcento tia situacio de morala ruiniĝo daŭris plu en miriga kreskado. La Apostoloj de la Dia Majstro, en la heleco de la Senfino, bedaŭras tiajn spektaklojn de spirita mizero kaj preparas la reenkarniĝon de multnombraj helpantoj ĉe la elaĉeta tasko, ĉe la anaroj de la ordeno Sankta Benedikto. Tiuj misiuloj de la vero kaj bono restarigas la abatejon de Klunizo, el kie eliros novaj pensoj kaj regenerantaj energioj.

### **Gregorio VII**

Dum tiu movado de restarigo, Hildebrando, konata sub la alnomo Gregorio VII, aŭdinte la inspirojn de la nevidebla mondo, kiuj malsupreniris en lian koron, preparis sin por la misio, lin atendanta en la Vatikano. Lia figuro estas unu el la plej gravaj de la XI jarcento, pro la fido kaj sincereco, karakterizintaj liajn teniĝojn. Elikтите papo, post la elkarniĝo de Aleksandro II, li komprenis, ke la unuaj paŝoj lin koncernantaj estas batali kontraŭ simonio en la sino de la katolika institucio kaj restarigi la aŭtoritaton de la Eklezio, kiun li sincere deziris reenkonduki en la sinon de la Kristanismo, kvankam la luktoj kontraŭ Henriko IV ŝajnigas la malon. Kunvokinte koncilion en Romo, en la jaro 1074, li penis malpermesi la grandegecon de tiom da trouzoj rilataj al la komercado de sakramentoj kaj al la ekleziaj honoraĵoj. Filipo I kaj Henriko IV promesas subtenon kaj helpon al la decidoj de la pontifiko, por rebonigi la organizon de la Eklezio. Sed Henriko IV, apogita de la episkopoj kulpaj je simonio, ne plenumis sian promeson kaj, avertite de Gregorio VII, provas ĉi tiun eksigi, reunuigante en Vormso sinodon el deviintaj sacerdotoj. La papo ekskomunikas tiun ribelinton, kaj tiam fariĝas la famaj okazaĵoj en Kanoso. La lukto ankoraŭ ne estis

finiĝinta, kiam Gregorio VII eliras el la mondo en 1085, postlasante tamen la vojon preparitan por la Konkordato de Vormso, realigota de Henriko V, en 1122, por sendependeco de la Eklezio kaj preskaŭa regenerado de ĝia disciplino.

### La admonoj de Jesuo

Instalite en siaj grandegaj riĉaĵoj kaj disponante la tutajn povon kaj aŭtoritaton, la Eklezio malmultfoje komprenis la aman taskon, kiu koncernis ĝian edukan mision.

Alkutimiĝinte ĉiam ordoni, ĝi multfoje ricevis la admonojn de Jesuo, kiel kondamnindajn herezojn, kiujn estis necese kontraŭbatali kaj detru.

La admonojn de la Supro oni ricevis ne nur en la sino de la religiaj societoj, kie humilaj konfesantoj donis al siaj fieraj ekleziaj superuloj plej sanktajn lecionojn pri kristana kompatemo. Sed ankaŭ en la civila societo, la semoj de lumo antaŭvidigis la plej esperplenajn burĝonojn de kompreno kaj saĝeco pri la Evangelio kaj la ekzemploj de la Kristo. En ĉi tiu okazo estas Petro de Vaŭ (pr. Vo), kiu, estante homo de nogocoj en Liono, liberiĝis el la ligiloj, tenantaj lin ĉe la homaj riĉaĵoj kaj sin senposedigis de ĉiuj havoj favore por ĉiuj malriĉuloj kaj mizeruloj, kortuŝite de la legado de la ekzemplado de Jesuo en ties Evangelio de amo kaj elaĉeto. Tiu eksterordinara homo, ricevinta la mision de instrumento de la volo de la Sinjoro, tradukigis la sanktajn librojn por publika legado kaj, ĉe aliaj kunuloj kun la nomo Valdanoj, iniciatis grandan movadon de evangeliaj predikoj, laŭ la maniero de la apostolaj tempoj. La “Malriĉuloj de Liono” estis ekskomunikitaj unue de la ĉefepiskopo en la urbo kaj poste, en 1185, de la pontifiko en la Vatikano. La Eklezio ne povus toleri alian doktrinon, krom la sia, farita el fiero kaj apenaŭ kaŝebla ambicio. Ĉiu vera kaj sincera memoro pri ĝia dia Fondinto estis rigardata kiel abomeninda kaj plej severe puninda herezo. Sed estas vero, ke, se la Valdanoj estis kalumniitaj

de la katolikaj fortoj, iliaj predikoj kaj vokoj neniam plu malaperis en la mondo, ekde la X jarcento, ĉar iliaj organizoj kun pluraj nomoj daŭris plu en Eŭropo ĝis la Reformacio, malgraŭ la fergantoj de la Inkvizicio.

### **Francisko el Asizo**

La vokoj de la Supro daŭris plu, petantaj la atenton de la roma Eklezio, en ĉiuj lokoj. La nomataj “herezoj” elŝprucis ĉie, kie estis liberaj konsciencoj kaj sinceraj koroj, sed la aŭtoritatoj de la Katolikismo neniam montris sin pretaj ricevi tiajn admonojn.

En 1229 estis finiĝinta la milito kontraŭ la herezuloj, kies bataloj daŭris dudek jarojn, kiam kelkaj estroj de la Eklezio konsideras la oportunan okazon fondi la konfesejon, kies projektoj de longe okupis la penson de la Vatikano.

Oni maskus tiun faron, pretekstante la bezonon de religia unuigo, sed estas vero, ke la institucio deziris disvastigi sian regadon super la konsciencoj.

Tamen, se la Inkvizicio longe priokupis la aŭtoritatojn de la Eklezio, antaŭ ol sia fondiĝo, tiu nigra projekto ankaŭ priokupis la Spacon, kie pretiĝis disponoj kaj rimedoj de eduka renovigo. Tial unu el la plej noblaj apostoloj de Jesuo malsupreniris en la karnon kun la nomo Francisko el Asizo. Lia granda kaj luma spirito brilegis proksime de Romo, en la regionoj de la malgaja Umbrio. Lia reformanta aktiveco okazis sen la kolizioj propraj de la parolo, ĉar lia pastreco estis la ekzemplo de malriĉeco kaj la plej absoluta humileco. Sed la Eklezio ne komprenis la lecionon, kiu koncernis ĝin kaj ankoraŭfoje ne akceptis la donojn de Jesuo.

### **La franciskanoj**

Sed la potenca klopodo de tiu misiulo, se ĝi ne sukcesis ŝanĝi la fluon da ambicioj de la romaj papoj, postlasis lumegajn signojn de lia restado sur nia planedo.

Lia ekzemplo de simpleco kaj amo, de modesteco kaj fido, infektis multenombrajn homojn, kiuj sin donis al la sankta laboro rebonigi animojn por Jesuo.

La ordeno de la franciskanoj eĉ enkalkulis pli ol ducent mil misiistojn kaj partianojn de la granda inspiro. Ili rifuzis ĉian monan helpon por akcepti sole nur la plej modestajn kaj krudajn nutraĵojn, kaj la karaktero plej distinganta ilin de tiuj el la aliaj religiaj kolektivoj, estis ilia foriĝo de la monaĥejoj. Anstataŭ ripozoj en la ombroj de la klostroj, en trankvileco kaj meditado, tiuj abnegaciaj spiritoj komprenis, ke la plej bona preĝo, por Dio, estas la konstruanta laboro por perfektigo de la mondo kaj de la koroj.

### **La Inkvizicio**

Malmulte valoris la lecionoj de la bono, antaŭ la malbono triumfanta, ĉar en 1231 la Tribunalo de la Inkvizicio estis plifirmigita de Gregorio IX. Tiu institucio ironie, en tiu tempo, ne rekte kondamnis la supozatajn kulpulojn al la morto – bonfara kaj konsola puno antaŭ la turmentegoj trudataj al tiuj, kiuj falis en ĝiajn karcerojn –, sed povis submeti ilin al ĉiuj imageblaj torturoj.

La batalo kontraŭ la “herezoj” estis preteksto por plifirmigi en Eŭropo la Inkvizion, turniĝintan en torturadon kaj malfeliĉigon de la tuta mondo.

Longa periodo da ombroj invadis la apartaĵojn de la homa aktiveco. La duonombro de la temploj estis teatro de amaraj kaj sakrilegiaj scenoj. Abomenaj krimoj estis faritaj ĉe la altaroj, en nomo de Tiu, kiu estas amo, pardono kaj favorkoreco. Tiu pereiga institucio de la Eklezio estis kovronta la evoluan vojon de la homo per vualo el densa mallumo.

### **La verko de la papismo**

Ekzistas tiuj, provantaj pravigi tiujn longajn jarcentojn da ombroj per la moroj kaj konceptoj en tiu tempo. Sed estas vero, ke la progreso de la homoj povus

malhavi tiun meĥanisman de monstraj krimoj. Tial ĉe la romanaj ŝuldoj pezas tiuj prirespondoj tiel teruraj, kiel doloraj.

La Inkvizicio estis persona verko de la papismo, kaj ĉiu homo same kiel ĉiu institucio havas sian proceson de kalkulo ĉe la Dia Justeco. Jen kial ni ne povas pravigi la ekziston de tiu stranga tribunalo, kies krima kaj senmoraliga agado baris la evoluadon de la Homaro dum pli ol ses longaj jarcentoj.



## XIX

### LA KRUCMILITIROJ KAJ LA FINO DE LA MEZEPOKO

#### **La unuaj krucmilitiroj**

Parolante pri la XI jarcento, ni mencias la Krucmilitirojn, kiuj indas specialan rimarkon pro iliaj agadoj, karakterizaĵoj de tiu tempo.

Ekde Konstanteno, la sanktaj lokoj de Palestino havas konsiderindan gravecon por la okcidenta Eŭropo. Miloj da pilgrimantoj ĉiujare vizitadis la malgajajn scenejojn de Jerusalemo, rekonante la vojojn de la Pasiono, aŭ la signojn de la vivo de la Apostoloj. Dum troviĝis en la regiono la araboj el Bagdado aŭ el Egiptujo, la fluoj de la katolika turismo povis sentime sin direkti al la sanktaj lokoj; sed la Jerusalemo de la XI jarcento estis falinta sub la potenco de la turkoj, kiuj ne toleris plu la ĉeeston de la kristanoj, kaj ilin forpelis de tie, plej kruele.

Tiaj okazaĵoj naskis protestojn de la tuta katolika mondo de Okcidento kaj ĉe la fino de la citita jarcento prepariĝis la unuaj krucmilitiroj, serĉe de la venko kontraŭ la nekredanto. La unua ekspedicio, elirinta el la plej civilizitaj centroj, sub komando de Petro la Ermito, eĉ ne transpasis Eŭropon, ĉar ĝi estis dispelita de Bulgaroj kaj Hungaroj. Sed en la jaro 1096 Godfredo de Bujono (Bouillon) kun la fratoj kaj Tankredo el Sirakuzo kaj aliaj estroj, kunveninte en Konstantinopolo, ekiris Niceon kun armeo el 500.000 homoj. Post ekposedo de Niceo, ili ekokupis Antioĥion, triumfe penetrante en Jesusalemon. Tie oni volis donaci reĝkronon al Godfredo de Bujono, sed la duko de la Malsupra Loreno ŝajnis revidi la luman figuron de la Sinjoro de la Mondo, kies frunto estis aŭreolita per dornkrono, kaj konsideris sakrilegio tion, ke oni metus en liajn manojn sceptron el oro, dum la Kristo havis en siaj respektindaj kaj kompatemaj manoj sole nur ian malhonoran kanon. Multe kontraŭstarinte, li nur akceptis la titolon “defendanto de la Sankta Tombo”, organizante tuj poste la religiajn ordenojn kun ekskluzive milita karaktero, kiaj tiuj el Templanoj kaj Hospitalanoj.<sup>(\*)</sup>

Sed la turkoj ne ripozis. Post multe da bataloj, ili ekposedis Edeson<sup>(\*\*)</sup>, devigante la papon Eŭgeno III fari la necesajn paŝojn por la dua Krucmilitiro, kiu, estrata de Ludoviko VII de Francujo kaj Konrado III de Germanujo, ricevis la plej disrevigajn efikojn.

### Fino de la Krucmilitiroj

Ĉe la fino de la XII jarcento Jerusalemo falas sub la potenco de Saladino. La kristanaj estroj sin preparas por la tria krucmilitiro, kiam okazas la venkoj ĉe Sankta Johano de Akko. La bataloj en Oriento sinsekvis dum tutaj jaroj, kvazaŭ periodaj kaj detruantaj uraganoj. Tiam Palestino posedis siajn mirindajn regionojn kovrat-

---

(\*) Ordeno de Malto. – **La Trad.**

(\*\*) Latine Edessa. – **La Trad.**

ajn per abundaj verdaĵoj. Galileo estis vasta ĝardeno, plena de parfumo kaj floroj. Sed tiom multe estis la bataloj de la malamikaj armeoj, tiom multe la luktoj de ekstermado kaj ambicio, ke la propra Naturo ŝajnas malbeni por ĉiam tiujn lokojn, kiuj indus amon kaj zorgon de la homoj.

La lastaj krucmilitiroj estis direktataj de Ludoviko IX, la sankta reĝo de Francujo, kiu, post ekokupo de Damieto, falis sub potenco de la malamikoj, pagante grandegan sumon por sia elaĉeto kaj li malligiĝis de la surtera vivo en 1270, apud Tunizo, mortigite de pesto.

La senditoj de Jesuo, povantaj eltiri el ĉiuj okazaĵoj la faktorojn de la homa evoluo por la bono, penas profiti la utilecon de tiuj doloraj okazaĵoj. Ĝuste tial, la Krucmilitiroj, malgraŭ siaj kontraŭkristanaj karakteroj, alportis iajn bonaĵojn por ĉiuj popoloj, koncerne ekonomion kaj socion. En Eŭropo la influo de la Krucmilitiroj estis reboniga, malfortigante la tiranecon de la feŭdaj sinjoroj kaj renovigante la solvon de la problemoj pri proprieto, antaŭhaltigante multajn apartajn batalojn. Krom tio, iliaj movadoj treege intensigis la rilatojn inter Okcidento kaj Oriento, nur poste interrompitajn, pro la sovaĝeco de la turkoj kaj de la invadantaj popoloj.

### **La penado de la senditoj de la Kristo**

En la Senfino kolektiĝas la senditoj de la Dia Majstro, en multenombrajn kunvenojn, sub la egido de lia favorkora penso, organizante pliajn laborojn por la ĝenerala evoluo de ĉiuj popoloj de nia planeco. Ili bedaŭras la mallertecon de multe da misiuloj por bono kaj amo, kiuj, veninte de la Spacoj, saturitaj de la plej bonaj kaj plej sanktaj intencoj, suferas sur la Tero la perfidon de siaj propraj fortoj, influite de la kruda neperfekteco de la medio, al kiu ili estis kondukitaj. Multaj el ili, ravitaj de la nedaŭraj riĉaĵoj, dronante en oceano da regantaj vantaĵoj, haltante sur la evoluaj vojoj, kaj aliaj, kiel Ludoviko IX, de Francujo, trouzis la povon kaj aŭtoritaton, praktikante agojn de preskaŭa

sovaĝeco, plenumante siajn sanktajn spiritajn devojn kun malmulte da bonoj kaj grandaj ĝeneralaj malprofitoj por la homoj.

Sed pro la leĝoj de amo, regantaj la Universon, tiuj kompatemaj estuloj en la Supro neniam mankis sian sindonan helpon favore por la progreso de la popoloj, penante perfektigi la animojn kaj gvidante la misiulojn de la Kristo sur la plej dornoplenaj vojoj.

### **Intelektala mizero**

En la XIII jarcento estis definitive instalita la reĝa regado, kaj malaperis la plej fortaj esprimoj de la feŭdismo. Ĉiu eŭropa regiono penis kolekti ĉiujn elementojn necesajn por la organizado de sia politika unueco, sed estas vero, ke la malmultaj rimedoj de instruo ne favoris pli progresintan intelektan ekzistadon.

Tiuj fondiĝantaj Ŝtatoj organizis siajn konstruojn sub protekto de la Eklezio, kiu havis intereson ne pli grandigi la kampon de individua edukado, timante interpretojn, kiuj ne estis propraj de ĝi. Pergamenoj kostis grandajn sumojn kaj la libro estis malfacile trovebla. Ĝis la XII jarcento la lernejoj estis limigitaj al la medio de la monaĥejoj, kie multaj pastroj sin okupis pri refreŝigo de la literoj de la plej malnovaj manuskriptoj, farante aliajn por la posteularo. La Scienco, kies vertikala linio havas sian komencan punkton ĉe scivolemo kaj ĉe dubo, kaj ankaŭ la Filozofio, kiu konsistas el plej altaj spiritaj esploroj, estis tute sklavigitaj al la Teologio, tiam absolute estranta ĉiujn homajn laborojn, kun povo je vivo kaj morto super la homoj, se oni konsideras la absurdajn rajtojn de la Tribunalo de la Inkvizicio, post la XIII jarcento, kiam, laŭ inspiro de la Supro, jam estis fonditaj gravaj universitatoj, kiaj tiuj de Parizo kaj Bulonjo, kiuj servis kiel modelo por tiuj de Oksfordo, Coimbra (pr. Koimbra) kaj Salamanko.

### **Renesanco**

En tiu tempo okazas ia efektiva renaskiĝo de la intelekta vivo de la popoloj plej evoluintaj en la eŭropa

mondo. La universitato konsistis el kvar fakultatoj – teologio, medicino, juro kaj artoj –, enkalkulante milojn da inteligentoj avidaj je instruo, kiuj estos la grandaj elementoj por preparado de la estonteco. Roĝero Bacon (pr. Bejkn), angla franciskano, rimarkinda pro studoj kaj iniciativoj, estas unu el tiuj kulminaj punktoj de tiu spirita renaskiĝo. Sed la Eklezio, malpermesante esploron kaj liberan opinion, malhelpis tiun rapidan evoluadon, precipe sur la kampo de medicino, kiu, malŝatante la atentan observon de ĉiuj faktoj, sin donis al la magio, kaŭzanta seriozajn malprofitojn por la kolektivoj. Favorate de la bezono de la imponaj montroj de la ekstera kulto kaj ankaŭ de la privata riĉeco, la arkitekturo estis la plej kulturata el ĉiuj artoj, pro la grandaj kaj multenombraj konstruaĵoj, tiam en modo. Pro la nereakta influo de la spirita Gvidantoj de la pluraj popularaj grupoj, plifirmiĝas la lingvaj esprimoj de ĉiu lando kaj aperas la grandaj literaturaj tradicioj de ĉiu regiono.

### **Transmigrado de popoloj**

Tiam sennombraj senditoj de Jesuo, sub lia orientado, komencas grandan laboron kolekti Spiritojn, laŭ iliaj emoj kaj korligiteco, por formi la naciojn de la estonteco kun iliaj kolektiva personeco. Al ĉiu el tiuj nacioj estos donita difinita misio por harmonio de la estontaj popoloj, laŭ la saĝaj ordonoj de Kristo, kaj stariĝas la bazoj de iu nova mondo, post tiom multaj kaj sinsekvaj fiaskoj de la homa malforteco. Konstruiĝas la fundamentoj de la grandaj landoj, kia Anglujo, kiu, en 1258, organizas la Statutojn de Oksfordo, kiuj limigas la povojn de Henriko III kaj en 1265 starigas la Ĉambron de la Komunumoj, kie la burĝaro kaj la malpli favoritaj klasoj havas la parolon kun la Ĉambro de la Lordoj. Italujo sin preparas por sia misio de latineco. Germanujo sin organizas. La Ibera Duoninsulo estas grandega laborejo kaj Francujo provas definitivajn paŝojn al saĝeco kaj beleco.

La agado de la spirita mondo havigas al la homa historio la perfektan karakterizaĵon de la kolektiva

animo de la popoloj. Kiel la individuoj, tiel ankaŭ la kolektivoj revenas en la mondon sur la vojo de la reenkarnejo. Tiel estas, ke ni renkontas la fenicojn en Hispanujo kaj Portugalujo, sin denove donantaj al siaj preferoj por la maro. En la antikva Lutecio, transformiĝinta en la belan Parizon de Okcidento, ni renkontas la animon de Ateno kun ĝiaj altaj filozofiaj kaj sciencaj demandoj, malfermantaj klarajn vojojn al la rajto de la homo kaj de la popoloj. Ni iru iom pli kaj ni trovos en Prusujo la militeman spiriton de Sparto, kies difekta kaj devia edukiteco konstruis la abomenindan spiriton de la germanismo de la nuna Germanujo. Ni transiru Manikon kaj montriĝos en Britujo la romana magistrato kun sia edukiteco kaj prudento, denove reprenanta la perditan regadon de la Romana Imperio, por bonfari al animoj, atendintaj dum tiom multe da jarcentoj siajn protekton kaj helpon.

### **Fino de la Mezepoko**

De la nevidebla mondo kaj en ĉiuj tempoj, la abnegaciaj Spiritoj akompanis la Homaron dum ĝiaj tagoj da turmentego kaj gloro, ĉiam luktante por la paco kaj bono de ĉiuj homoj.

Parolante supraĵe pri la nobla figuro de Johana Darko, plenuminta altan mision ligitan al la principoj de justeco kaj frateco sur la Tero, kaj pri la doloraj militoj, signintaj la finon de la Mezepoko, ni ĉi tie asertas, ke post la nigraj konkeroj de Ĝingis-Ĥano kaj Timur kaj post falo de Konstantinopolo, en 1453, fariĝinta por ĉiam posedaĵo de la turkoj, okazis la fino de la Mezepoko. Iu nova erao komenciĝis por la surtera Homaro, sub la kontinua helpado de la Kristo, kies favorkoraj okuloj en la nesondebla Senlimo akompanadas la evoluadon de la homoj.

## XX

### RENEZANCO

#### **Regeneraj movadoj**

Ĉe la komenco de la XV jarcento, kiam la Mezepoko estis tuj estingiĝonta, tiam grandaj spiritaj kunvenoj okazas en la proksimeco de nia planedo, gvidante la regenerajn laborojn, kiuj, pro ordonoj de la Kristo, devos konduki la mondon en iun novan eraon.

Tiu tuta regenera penado efektiviĝas sub lia favor-kora kaj kompatema rigardo, verŝanta lumon en ĉiujn korojn. Sindonemaj senditoj reenkarriĝas sur la terĝlobo, por plenumado de amaj kaj elacetaj misioj. Sur la Ibera Duoninsulo, sub orientado de Henriko de Sagres, komisiita por grandaj kaj profitaj realaĵoj, fondiĝas lernejoj por navigantoj, kiuj iras sur la grandan oceanon, serĉe de nekonataj landoj. Multenombraj antaŭuloj de la Reformacio ĉie ekaperas, batalante kontraŭ religiaj trouzoj. Malnovaj majstroj el Ateno reenkarriĝas en

Italujo, dissemante sur la kampo de pentrarto kaj skulpturo la plej belajn juvelojn de genio kaj sento. Anglujo kaj Francujo sin preparas por la granda demokratia misio, kiun al ili donis la Kristo. Komerco delokiĝas de la malvastaj akvoj de Mediteraneo al la grandaj fluoj de Atlantiko, irante sur la forgesitaj vojoj al Oriento. Jesuo direktas tiun reviviĝon de ĉiuj homaj aktivecoj, difinante la pozicion de la pluraj landoj de Eŭropo, kaj donante al ĉiu el ili ian respondecon ĉe la strukturo de la ĝenerala evoluado de nia planedo. Por faciligi la eksterordinaran verkon de tiu grandega renoviga tasko, la helpantoj de la Dia Majstro sukcesas porti en Eŭropon la malnovajn inventojn kaj utilaĵojn el Oriento, ekzemple kompason por la mara navigado kaj paperon por diskonigo de la penso.

### **Misio de Ameriko**

La Kristo tiam metas sur Amerikon siajn plej kreivajn esperojn. La XVI jarcento komenciĝas per la eltrovo de la nova kontinento, kaj la eŭropanoj entute ne komprenis en tiu tempo la gravecon de tia okazaĵo. La fabelaj riĉaĵoj de Hindujo ravas la aventureman spiriton de tiu tempo, kaj la kronitaj fruntoj en la Malnova Mondo ne komprenis la moralan signifon de la kontinento de Ameriko.

Sed la laborantoj por Jesuo, ignorantaj la kritikon kaj laŭdon de la mondo, plenumas siajn devojn, inter la limoj de la novaj landoj. Laŭ superaj ordonoj organiziĝas la evoluaj planoj de la nacioj, kiuj tie floras en la estonteco. Sur tiu kampo de novaj kaj regeneraj luktoj, ĉiuj bonvolaj spiritoj povos labori por la alveno de la paco kaj frateco de la homa estonteco, kaj tial, laborante por la venontaj jarcentoj, ili difinis la rolon de ĉiu regiono de la kontinento, lokante la cerbon de la nova civilizacio sur la regionon, kie hodiaŭ kuŝas la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko, kaj ĝian koron sur la etendaĵojn de la fekunda kaj invitema lando, kie floras Brazilo, en Sud-Ameriko. La unuaj havas la materiajn povojn; la dua



la primicojn de la spiritaj povoj, destinitajn al la surtera civilizacio de la estonteco.

### **La nevidebla mondo kaj la koloniado de la Nova Mondo**

Post la eltrovo de Ameriko efektiviĝis granda klopodo de spirita selekto, en la sino de la eŭropaj luktoj, por krei en la Nova Mondo alian direkton de evoluado.

Se la koloniantoj de la regiono de Ameriko, en la unuaj tempoj, estis la ekzilitoj kaj proskribitoj el la eŭropaj societoj, ni atentu, ke tiuj kolonianoj venis ne sole nur el la grandaj ĉefurboj de la malnova kontinento, laŭ ekskluziva obeado al la materia plano. Ankaŭ el la nevidebla mondo alvenis sennombraj bonvolaj animoj, enkarniĝintaj sur la novaj landoj, kiel idoj de tiuj ekzilitoj multfoje persekutataj de la maljusta justico de la homoj. Al tiuj pli-malpli evoluintaj Spiritoj aliĝis multnombraj estuloj el Eŭropo, lacaj de la negloraj luktoj de hegemonio kaj ambicio, strebante al elaĉeto ĉe klopodo, konstruanta ian novan patrolandon sur solidaj bazoj de frateco kaj amo, tiel organizante inter la amerikaj popoloj pli perfektigintajn kodojn kaj sentojn, por la komprenado de la kontinenta loĝantaro. Se ni vidas en Ameriko la spiritan duoblaĵon de Eŭropo, ni konvinkiĝu, ke ĉi tiu Eŭropo estas pli saĝa kaj sperta, rilate ne nur la problemojn de internacia harmonio kaj la homan solidarecon, sed ankaŭ ĉiujn demandojn, kiuj signifas la efektivajn bonojn de la vivo.

### **Apogeo de la Renesanco**

Tiu Renesanco, komenciĝinta en la Supro, ĵetinte sur la Teron siajn renovigajn lumojn, en ĉiujn direktojn, trafis sian apogeon, en la materia mondo, de la fino de la XV ĝis la XVI jarcento.

La elpenso de la presilo kaŭzis la plej altan progreson en la sfero de la ideoj, kreante la plej belajn esprimojn de la intelekta vivo. La literaturo prezentas ian novan

vivon kaj la artoj atingas kulminojn, kiujn la posteularo ne povus trafi. Multenombraj metiistoj el malnova Grek-ujo reenkarriĝintaj en Italujo, postlasis neforviŝeblajn signojn de sia vivo, ĉe la altprezaj marmoraĵoj. Efektive ekzistas, sur ĉiuj kampoj de la artismaj aktivecoj, ia forta gusto de greka vivo, antaŭ ol la aŭsteraj disciplinoj de la Katolikismo en la Mezepoko, kies reguloj cetere rigore atingis nur tiujn, ne apartenantajn al la kadro de la ekleziaj aŭtoritatoj.

### Religia Renesanco

Tiujn reformigajn aktivecojn ne povis eviti la Eklezio, deviinta de la kristana vojo. La nevidebla mondo tiele ordonas veni en la mondon multenombrajn misiulojn kun la celo efektivi la reviviĝon de la religio, por regeneri ties malstreĉintajn fortcentrojn. Tiel, en la XVI jarcento aperas la respektigindaj figuroj de Lutero, Kalvino, Erasmo, Melanhtono kaj aliaj rimarkindaj personoj de la Reformacio, en Centr-Eŭropo kaj Nederlando.

Okaze de la unuaj protestoj kontraŭ la senmezura lukso de la estroj de la Eklezio, okupis la pontifikan seĝon Leono X, kies monduma vivo malagrabla impresis la sincere religiemajn spiritojn. Sub lia direktado kreiĝis en 1518 la fama “Libro de la Tarifoj de la Sankta Kancelario kaj de la Sankta Apostola Penitenciaro” (\*), kie troviĝas la prezo de absolvo por ĉiuj pekoj, por ĉiuj adultoj, inkluzive por la plej hororaj krimoj. Tiaj malaltiĝoj de la ekleziula digno motivis la predikojn de Lutero kaj ties kunuloj de apostoleco. Nenion helpis la persekutoj kaj minacoj al tiu eminenta aŭgustenano. Kelkaj historiistoj vidis en lia misio nuran esprimon de ĵaluzo pri liaj kunuloj de societo, pro la prefero de Leono X, komisianta la Dominikanojn prediki la indulgencojn. Sed la vero estas, ke la filo de Ejsleben fariĝis

---

(\*) **Penitencialis** latine estas sacerdoto, direktanta konfesantojn; penitenciaro, eklezia tribunalo, en Romo, por privataj aferoj, forpermeso ktp. – **La Trad.**

instrumento de la ĝenerala protesto kontraŭ la trouzoj de la Eklezio, rilate la dogman altrudon kaj forprenon de mono. La postuloj de Lutero estis antaŭ ĉio procedo de batalo kontraŭ la romanaj absurdaĵoj, ne estante la ideala vojo de la religiaj veraĵoj. La ekstremismon de trouzo li respondis per la ekstremismo de netoleremo, malutiligante al sia propra doktrino. Sed lia klopodado prenis rimarkindan gravecon por la vojoj de la estonteco.

### **La Kompanio de Jesuo**

La ondo da novaj lumoj feliĉigis ĉiujn konsciencojn, sed la mallumaj kaj malicaj Spiritoj, kiuj montris al la eŭropano aliajn uzojn de la pulvo, krom tiuj, kiujn la ĉinoj vidadis ĉe la beleco de artfajraĵoj, inspiris al la blindigita kaj mania cerbo de Ignaco de Lojola la fondon de la jezuitismo en 1534, por sufoki la liberecon de la konsciencoj.

La Eklezio, doninte fortan apogon al tiu ideo, inaŭguris unu el la plej malĝojigaj periodoj de la okcidenta historio. La tribunalo de la Inkvizicio, kun povo je vivo kaj morto, en la katolikaj landoj, faris milojn kaj milojn da viktimoj, malgajigante la vojojn de la popoloj. Sangaj kaj abomenindaj spektakloj okazis en preskaŭ ĉiuj grandaj urboj de Eŭropo, la aŭtodafeoj bruligis hororajn ŝtiparojn de la Sankta Ofico, ĉie, kie ekzistis pensantaj cerboj kaj sentantaj koroj. Oni starigis la traserĉon de ĉiuj sociaj institucioj kaj la invadon en ĉiujn hejmojn. En Hispanujo oni bruligis malfeliĉulon sur publika placo; en Francujo terura nokto kaŭzis ĝeneralajn premsonĝojn, rilate fidon; en Irlando multe da “kredantoj” nepre volis meti sur la altaron de Jesuo kandelon faritan el graso de la protestantoj.

### **Agado de la jezuitismo**

La Kompanio de Jesuo, je harhirtiga memoro, ignoris la rimedojn por sole nur strebi al la malmoralaj celoj, kiujn ĝi intencis atingi.

Ĝia agado daŭris longajn jarojn da mallumo, sur la landoj de la okcidenta civilizacio, forte kontribuante por la morala malprogreso, en kiu troviĝas la “scienca homo” de la modernaj tempoj.

Ĝiaj superregantaj, avidemaj kaj ambiciemaj hordoj ne nur martirigis la multjarcentan mondon. Ankaŭ la sinceraj pastroj multe suferis el ĝia pereiga superregado. Kaj tio estas des pli vera, ĉar, kiam la papo Klemento XIV provis ĝin estingi en 1773 per sia brevo “Dominus ac Redemptor”, li ekkriis afliktita: “Mi subskribas mian propran mortverdikton, sed mi obeas mian konsciencon.” Efektive en Septembro 1774 la granda pontifiko transdonis al Dio sian animon meze en hororaj suferoj, pro ia letala veneno, kiu iom post iom putrigis lian korpon.

## XXI

### TRANSIĜA EPOKO

#### **La luktoj de la Reformacio**

La Dieto de Vormso en 1521 vane kondamnis Luteron, kiel herezulon, devigante lin refuĝi en Vartburgo, ĉar la liberigaj pensoj estis ia nova lumo, disvastiĝanta kun rapideco de brulego.

La Eklezio eksuferis pli fortajn kaj dolorajn batojn, ĉar kelkaj ambiciemaj princoj profitis de la movado de la amasoj, konfiskante valorajn havaĵojn de ĝi. Multenombraj kamparanoj estuziasmigitaj de la rajto de pensolibereco, iniciatis grandan kampanjon kontraŭ la uzurpanta Eklezio, postulante agrarajn kaj sociajn reformojn, en la nomo de la Evangelio.

De 1521 ĝis 1555 la kleraj eŭropaj centroj travivis angorajn momentojn da atendo, malantaŭ la kulisoj de la religia tragedio, sed post la Konkordato de Aŭgsburgo, stariĝis ia reĝimo de pli granda reciproka toleremo.

Sed la rajto pri libera esploro dividis la Reformacion en plurajn religiajn apartaĵojn, laŭ la persona orientado de ĝiaj predikantoj, aŭ de la politikaj interesoj en la medio, en kiuj ili troviĝis. En Germanujo staris Protestantismo laŭ la partianoj de Martino Lutero; en Svisujo kaj Francujo staris Kalvinismo kaj en Skotlando la Presbiteriana Eklezio. En Anglujo la afero fariĝis pli grava. Henriko VIII, brava defendanto de la katolika fido, pro konveneco de personaj kapricoj fariĝis estro de la religia kaj politika povo, prenante la direktadon de la Anglikana Eklezio kaj sin malligante de la Katolikismo. En Francujo la hugenotoj estis bone organizitaj, sed okazas politikaj komplikaĵoj, kaj la despota genio de Katarina de Mediĉoj ordonas la hombuĉadon de Sankta-Bartolomeo, strebante elimini la admiralon Colgny (pr. Kolinji). Tiu nigra okazintaĵo, daŭrinta 48 horojn, komenciĝis en la 24a de Aŭgusto 1572, kaj la Reformacio suferis unu el siaj plej amaraj batoj. Nur en Parizo kaj antaŭurboj estis eliminataj tri mil personoj.

La senditoj de la Kristo bedaŭras tiel dolorajn okazintaĵojn, laborante por vekti la ĝeneralan konsciencon, eltirante ĝin el tiu halucino je murdo kaj sango, sed ni devas konsideri, ke ĉiu homo, same kiel ĉiu kolektivo, povas plenumi siajn devojn aŭ pligravigi siajn proprajn respondecojn, en la sfero de sia relativa libereco.

### **La Nevenkebla Mararmeo**

La luktoj en Eŭropo, dum la tuta XVI jarcento, anstataŭ plenumi celon, aliĝis en nigrajn batalojn, dronigante la popolojn de la Malnova Mondo en terurajn sinsekvajn reenkarniĝojn kaj dolorajn elaĉetojn.

Kvazaŭ ne sufiĉis la religiaj militoj, malfortigintaj la eŭropan organizon de antaŭ tre longe, ekaperas la persono de fanatika kaj kruela princo, en la tiama potenca Hispanujo, komplikante la politikan ekzistadon de la eŭropaj kolektivoj. La klopodoj de Filipo II, anstataŭinto de Karolo V, iel rilatis al la problemoj de la protestanta Reformacio; sed super ĉion li metis siajn

ambiciojn kaj despotecon. Kuraĝigite de la venkoj super la turkoj kaj islamanoj, li penis sufoki la politikan libercon de Nederlando, renkontante la plej heroecan rezistadon. Liaj malbonfaraj agoj, maskitaj per defendo de la Katolikismo, ĉien etendiĝis, devigante la spiritan mondon malpermesi liajn senmezurajn trouzojn de la povo. Tiel estis, ĉar organizinte la Nevenkeblan Mararmeon, en la jaro 1588, konsistantan el pli ol cento da ŝtupoj ekipitaj per 2.000 kanonoj kaj 35.000 viroj, por ataki Anglujon, sen ia motivo, praviginta tian agreson, li vidis tiun potencon eskadron tute detruita de furioza tempesto. Laŭ la planoj de la nevidebla mondo, venas al la marbordoj de Anglujo nur la pacamaj spiritoj, devigitaj per la forto partopreni en la detruita mararmeo, kiuj estis tie amike akceptitaj, renkontante ian novan patrujon.

Se Henriko VIII eraris kiel homo, la angla popolo estis preta plenumi grandan mision, kaj la spiritan mondon koncernis la laboro antaŭgardi ĝiajn konkerojn pri politika libereco.

### **Religiaj militoj**

Malgraŭ la subteno kaj helpo de la abnegaciaj senditoj de la Kristo, Eŭropo transiris en la XVII jarcenton, meze en teruraj luktoj, tiam pligravigitaj per la nigraj starigoj de Konfesejo. Oni preskaŭ povas aserti, ke la solaj jezuitoj, indaj je la nomo sacerdotoj de Jesuo, estas tiuj, venintaj en la nekonatajn regionojn de Ameriko, por la plenumado de la plej noblaj devoj de homa frateco, ĉar preskaŭ la tuta Kompanio, en la Malnova Mondo, dronis en oceano da politikaj malpacoj, multfoje finiĝintaj per krimaj tragedioj.

La esence religiaj militoj estis post longe finiĝontaj, pro ribeleco de ĉiuj elementoj, sed la senditoj de la Supro per penigaj klopodoj kondukis la eŭropajn kolektivitojn al la traktado de Vestfalia en 1648, plifirmigante la venkojn de la protestantismo antaŭ la nepravigeblaj altrudoj de la jezuitismo.

## Francujo kaj Anglujo

En tiu tempo Francujo jam estis preta por la plenumado de sia granda misio ĉe la popoloj, kaj sub la influo de la nevidebla mondo estis kreaĵoj la bonefikaj servoj de diplomatio. Post la kulisoj de la administra politiko firmiĝis la principoj de absolutismo sur la trono, sed ĝia granda kolektiva animo, plena de sento kaj grandanimeco, jam duonvidis la altvaloran klopodon, kiu koncernis ĝin en la estonteco. Flanke de ĝi Britujo iradis per grandaj paŝoj al la plej noblaj homaj konkeroj. Post estingiĝo de la dinastio de la Tudoroj en 1603, surtroniĝas la reĝo de Skotlando, Jakobo I. Dezirante revivigi la absolutismajn principojn, tiu devenanto de la Stuartoj inaŭguris periodon da pereigaj persekutoj, kiujn intensigis lia filo Karolo I, kies politikaj disonoj konsistis el la plej fortaj inklinoj al tiraneco. Malkonsentante kun la Parlamento kaj ĝin sinsekve estinginte, li vidis la popolon de la angla ĉefurbo kun armiloj en manoj, defendantan siajn reprezentantojn kaj kaŭzantan la civilan militon, kiu daŭris plurajn jarojn kaj finiĝis nur per ago de Kromvelo, kiu, post interkonsento kun la Parlamento, starigas la Respublikon, de kiu li fariĝas la “Protektanta Lordo”. Kromvelo estis brava spirito, sed ebria de la nigra vino de despotismo li ankaŭ estis vengema, fanatika kaj kruela diktatoro. Post lia morto, pro la politika nekapablo de lia filo la Stuartoj okazigas la restarigon de la trono. Sed la regado de la Stuartoj nelonge daŭras, ĉar la angloj, malkontentaj de la administrado de Jakobo II, kaj en sia tradicia amo al libereco, vokas al povo Vilhelmon de Oranĝo. La Parlamento redaktas la faman deklaron pri rajtoj, kiu difinis la emancipiĝon de la popolo kaj limigis la reĝajn povojn, kaj tiam la revolucio de 1688 surtroniĝis Vilhelmon III. Anglujo estis plenuminta unu el siaj plej noblaj devoj, plifirmigante la formulojn de la parlamentismo, ĉar tiel ĉiuj klasoj estas vokitaj al kunhelpado kaj kontrolado de la registaroj.



## Rifuĝejo de Ameriko

Konsiderante la movadon de la ĝeneralaj kaj apartaj respondecoj, la nevidebla mondo, sub orientado de Jesuo, kondukis en Amerikon ĉiujn sincerajn kaj laboremajn Spiritojn, kiuj ne bezonas reenkarriĝojn en la eŭropa mondo, kie individuoj kaj kolektivoj pli kaj pli ligiĝis en la ĉeno de la ekzistadoj de elaĉetaj provoj.

Al la hemisfero de la Nova Mondo alfluis ĉiuj estuloj aklamitaj por la organizado de la estonta progreso. Multaj el tiuj estuloj estis akirintaj la senton pri frateco kaj paco post multaj luktoj en la malnova kontinento. Lacaj serĉi feliĉon en la mallarĝaj limoj de la ekskluzivemaj sentoj, ili intime sentis la belajn floradojn de edifaj reformoj, komprenante la veran solidarecon en la universala komunumo. Ĝuste tial, de sia komenco, la politikaj organizoj de la kontinento de Ameriko fariĝis bastionoj de paco kaj frateco por la tuta mondo. Jen kial restado sur ĝia tero kaj en la kaŝitaj lumoj de ĝia socia medio estis konsiderata de ĉiuj Spiritoj kiel beno de Dio, antaŭ la sinsekvaj malkvietiĝoj de Eŭropo.

## La enciklopediistoj

La XVIII jarcento komenciĝis same inter renovigaj luktoj, sed altaj Spiritoj de filozofio kaj de scienco, speciale reenkarriĝintaj en Francujo, estas kontraŭbatalontaj la erarojn de la socio kaj de la politiko, pereiganta la principojn de la dia rajto, en kies nomo oni faris ĉiajn barbaraĵojn.

El tiu plejado da reformantoj ni renkontas la respektigindajn figurojn de Voltero, Monteskjo (Montesquieu), Ruso (Rousseau), d'Alembert (pr. Dalamber), Dideroto, Quesnay (pr. Kene). Iliaj noblaj lecionoj eĥis tiel en Nord-Ameriko, kiel en la tuta mondo. El la brilaj reprezentantoj de sento kaj genio, ili estis la aktivaj instrumentoj por rebonigo de la surteraj kolektivoj. Ekzistas iaj historiistoj kun karakteriza manio de sensacio, kiuj ne hontas sin prezenti antaŭ publiko por

aserti, ke tiuj studemaj kaj saĝaj spiritoj estis je soldo de Katarina II de Rusujo kaj de la princoj de Prusujo, kontraŭ la integreco de Francujo; sed tiaj konfesoj nur estas ofendaj kalumnioj, kiuj nur malutilas al tiuj, ilin eldirintaj, ĉar el tiuj grandanimaj koroj brilis la dia lumero de penso kaj libereco, bazo de ĉiuj sociaj konker-oj, pri kiuj fieras la modernaj popoloj.

### **Sendependeco de Ameriko**

La nobligaj pensoj de la aŭtoroj de la Enciklopedio kaj de la novaj sociaj teorioj trovis la plej sinceran akcepton en la anglaj kolonioj de Nord-Ameriko, organizitaj kaj edukitaj en spirito de libereco de la patrujo de parlamentismo.

Tiel, la nevidebla mondo uzas tiun oportunan okazon, decidante realigi en la novaj landoj la demokrati-ajn principojn predikitajn de la filozofoj kaj pensuloj de la XVIII jarcento. Sed dum Anglujo malrespektas ĉe siaj kolonioj la grandan principon firmigitan de ĝi mem, laŭ kiu “neniu devas pagi kontribuadojn, ilin ne voĉdoninte”, la amerikanoj decidis proklami sian politikan sendependecon. Post kelkaj incidentoj kun sia metropolo, ili publikigas sian emancipiĝon en la 4a de Julio 1776, poste organizante la Konstitucion de Filadelfio, modelo de la demokratiaj kodoj de la estonteco.

## XXII

### LA FRANCA REVOLUCIO

#### **Francujo en la XVIII jarcento**

La sendependeco de Ameriko vekis la plej vivan estuziasmon en la animo de la francoj, humiligitaj de la plej premantaj malfacilaĵoj, post la ekstravaganca regado de Ludoviko XV.

La senbrida lukso kaj la trouzoj de la klerikaro kaj de la nobelaro, en mirigaj proporcioj, ebligis la penetradon de ĉiuj liberaj kaj noblaj pensoj de la enciklopediistoj kaj de la filozofoj en la torturitan koron de la popolo. La situacio de la proletaroj kaj de la terkultivistoj karakteriziĝis per la plej terura mizero. La impostoj likvidis ĉiujn produktocentrojn, kaj ni devas diri, ke la nobeloj kaj la pastroj estis liberaj de tiuj devoj. De 1614, la Ĝeneralaj Ŝtatoj ne plu kunvenis, kaj la monarĥa absolutismo pli fortiĝadis.

Nenion helpis la penado de Ludoviko XVI, vokanta la pli praktikajn eminentajn spiritojn por kunlabori kun siaj administrantoj, kiaj Turgot (pr. Tirgo) kaj Mallesherbes (pr. Malerb). La bonkora monarĥo, kiu faris ĉion por restarigi la reĝecon el ĝia bedaŭrinda falo, pro ekscesoj de sia antaŭulo sur la trono, apenaŭ sciis, laŭ sia nemulta sperto pri la homoj kaj la vivo, ke ia nova erao komenciĝis por la politika mondo de Okcidento, per doloraj transformiĝoj, postulantaj lian propran vivon.

Kunvenintaj en Majo 1789 la Ĝeneralaj Ŝtatoj, en Parizo, plej grandaj malkonsentoj eksplodis inter iliaj membroj, malgraŭ la bonvolo kaj kunlaboro de Necker (pr. Neker), en la nomo de la Reĝo. Post kiam la kunveno transformiĝis en Konstuciantan Asembleon, post multenombraj incidentoj, komenciĝas la revolucio instigata de la parolo de Mirabo (Mirabeau).

### **Epoko de ombroj**

Post falo de la Bastilo en la 14a de Julio 1789 kaj post la fama Deklaracio pri la Homaj kaj Civitanaj Rajtoj, ia vico da reformoj okazas sur ĉiuj kampoj de la socia kaj politika vivo de Francujo.

Sed tiuj renovigoj iniciatis la plej dolorajn okazaĵojn. Multenombraj familioj uzis la militalton por serĉi rifuĝon en najbaraj landoj, kaj Ludoviko XVI mem provis transiri la landlimon kaj estis arestita en Varennes (pr. Varen) kaj rekondukita al Parizo.

Amaso da ombroj invadis la konsciencojn de la nobla Francujo, tiam vokita de la spirita mondo al la plenumado de sankta misio ĉe la suferanta Homaro. Koncernis ĝin sole nur profiti la anglajn konkerojn, por rompi la sceptron de la absoluta reĝeco kaj starigi novan administran procedon en la renovigo de la politikaj organizoj de la terglobo, laŭ la saĝaj lecionoj de ĝiaj filozofoj kaj pensuloj.

Sed, se iuj Spiritoj estis preparitaj por la heroa irado de tiu jarcento, malfeliĉe multaj aliaj personoj kaŝe atendadis en la mallumo la psikologian momenton

por satigi sin je sango kaj povo. Tial, post multaj rimarkindaj figuroj de la revolucia komenco, aperis nigr-aj spiritoj, kiaj Robespiero kaj Mara (Marat). La volupto je la venko ĝeneraligis fortan ebriecon de murdado en la animo de la amasoj, ilin kondukantan al la plej abomen-aj okazaĵoj.

### **Kontraŭ la ekscesoj de la Revolucio**

Tiel la Franca Revolucio estis tuj atakata de la aliaj nacioj el Eŭropo, kiuj sub orientado de Pitto (Pitt), ministro de Anglujo, tenis kontraŭ ĝi mortan lukton, dum longaj jaroj.

La Nacia Konvencio, malgraŭ la garantioj, kiujn la Konstitucio de 1791 donadis al la persono de la reĝo, dekretis lian morton ĉe gilotino, kaj lia ekzekuto okazis la 21an de Januaro 1793, sur la loko, kie nun kuŝas Placo Konkordo. Ludoviko XVI vane penas pravigi sian senkulpecon al la popolo de Parizo, antaŭ ol la ekzekutisto fortranĉis lian kapon. La plej sinceraj paroloj elfluas el liaj lipoj, kaj li meze en ondo da larmoj kaj sentoj, bolantaj en lia koro, petegas atenton de siaj subuloj, malgraŭ sia ŝajna flegmo. Renoviĝas la ordonoj al gvardianoj ĉe la eŝafodo kaj tondre bruas la tamburoj, dampantaj liajn asertojn.

Francujo altiris al si la plej dolorajn kolektivajn provojn per tiu torento da malsaĝaĵoj. Sub la angla influo, organiziĝas la unua eŭropa koalicio kontraŭ la nobla lando.

Sed ne nur en la administraj kabinetoj fariĝis rebon-igaj disponoj. Ankaŭ en la spirita mondo kunvenas la genioj de la latinaj popoloj, sub la beno de Jesuo, petegante liajn protekton kaj favorkorecon por la granda deviinta nacio. Tiu, kiu estis la kuraĝa kaj modesta filino de Domremi, revenas al la medio de sia malnova patrolando, antaŭe de grandaj armeoj da konsolantaj Spirit-oj, mildigante la afliktitajn animojn kaj prilumante novajn vojojn. Multenombraj karavanoj de turmentataj estuloj, ekster sia materia korpo, estas kondukataj de

ŝi al la regionoj de Ameriko por regenerantaj enkarniĝoj de paco kaj libereco.

### **La periodo da teroro**

La leĝo de la kompensoj estas unu el la plej grandaj kaj vivaj realaĵoj en la Universo. Sub ĝiaj saĝaj kaj justaj disponoj la urbo Parizo ankoraŭ dum multe da tempo devis esti loko de tragediaj okazaĵoj. Tial instaligis la abomeninda revolucia tribunalo kaj la tiel nomata komisiono de publika savo kun la plej nigraj spektakloj de la pendo. La konscienco de Francujo vidis sin envolvita en densa mallumo. La tiraneco de Robespiero ordonis la murdado de multenombraj kamaradoj kaj multaj honestaj kaj dignaj homoj. Karlota Korde (Corday) vane penis malgrandigi la ekscesojn de murdo, sin donante al la malsaĝaĵoj de krimo en la hejmo mem de Mara, celante redoni liberecon al la popolo de sia lando kaj pagante sian ekstreman agon per sia propra vivo. Estis okazoj, kiam pli ol dudek personoj ĉiutage supreniris la eŝafodon, sed Robespiero kaj liaj sekvantoj post nelonge ankaŭ devis supreniri la ŝtupojn de la pendo, pro la reago de la sennomaj kaj suferantaj amasoj.

### **La Konstitucio**

Post grandaj luktoj kontraŭ la regado de la ombroj, la genioj de Francujo sukcesis inspiri al ĝiaj politikuloj la Konstitucion de 1795. La leĝodonaj povoj estis destinitaj al la “Konsilio de la kvincent” kaj al la “Konsilio de la plejaĝuloj”, kaj la ekzekutivo estis konfidita al Direktorio el kvin membroj.

Tiel fariĝis pacperiodo uzata por la rekonstruado de notindaj intelektaj verkoj. La militistaj centroj luktis kontraŭ la invadodecidoj de aliaj eŭropaj potencoj, kies tronoj estis minacataj je sia stabileco, pro la alveno de la novaj pensoj de liberalismo, kaj la politikuloj sin donis al la ampleksa laboro de edifado, kaj la plej noblaj faroj prosperis el tiu klopodo.

Sed Francujo post siaj frenezaĵoj de libereco estis minacita de invado kaj dismembriĝo. Tamen ekzistas popoloj, kiuj fariĝas meritantoj de la helpo de la Supro dum plenumado de siaj altaj kompromisoj ĉe aliaj kolektivitoj de nia planedo. Tiel, kun misiistaj devoj Napoleono Bonaparto, ido de senfama korsika familio, estis vokita al la kulminoj de la povo.

### **Napoleono Bonaparto**

La humila korsika soldato, destinina por granda tasko ĉe la socia organizado de la XIX jarcento, ne povis kompreni la celojn de sia granda misio. Sufiĉis liaj venkoj en Arcole (pr. Arkole) kaj en Rivoli, kun la paco de Kampo-Formio en 1797, por ke vantamo kaj ambicio ombris lian penson.

Lia ekspedicio al Egiptujo, longe antaŭ la batalo apud Vaterlo, signis por la spirita mondo la nemultan efikecon de lia klopodo, pro la vantamo kaj mondregemo, mastrantaj liajn renovigajn energiojn. Sieĝita de la revo pri absoluta mondposedo, Napoleono estis ia deviinta Mahometo, de la Francujo de la liberalismo. Kiel la profeto de la Islamo nemulte alproksimiĝis al la Evangelio, kiun lia agado devus validigi, tiel ankaŭ la aktivecoj de Napoleono nemulte alproksimiĝis al la noblaj pensoj, kondukintaj al la revolucio la francan popolon. Lia historio ankaŭ estas plena de brilaj kaj mallumaj faktoj, elmontrantaj, ke lia persono de generalo ŝanceliĝis inter la fortoj de malbono kaj de bono. Per siaj venkoj li garantiis la integrecon de la franca lando, sed li dissemis mizeron kaj ruinon en la sinon de aliaj popoloj. En la plenumado de lia tasko organiziĝis la Civila Kodo, kolekto da plej belaj formuloj de la juro, sed disvastiĝis rabado kaj insulto al la sankta emancipiĝo de aliaj popoloj, per movado de liaj armeoj, ensorbantaj kaj aldonantaj aliajn popolojn.

Lia frunto de soldato povas resti aŭreolita de gloraj tradicioj, por la mondo, sed estas vero, ke li estis misiisto de la Supro, kvankam perfidita de siaj propraj fortoj;

sed en la Transmondo, lia koro plibone sentis la amplekson de siaj verkoj, konsiderante justa la malmultan kompaton de Anglujo, lin ekzilinta en Sankta-Helenon, post lia peto pri helpo kaj protekto. Sankta-Heleno estis por lia spirito la prologo de liaj doloraj kaj malgajaj meditoj, en la vivo en la Senfino.

### Allan Kardec <sup>(\*)</sup>

La agado de Bonaparto, kiu invadis la aliulan kultivejon per sia movado de transformo kaj konkeroj, dekliniĝante de la funkcio kiel misiisto ĉe la reorganizado de la franca popolo, instigis la spiritan mondon fari energiajn disponojn kontraŭ lia despoteco kaj fiera vantamo. Alproksimiĝis la tempo, kiam Jesuo devos sendi en la mondon la Konsolanton, konforme al siaj ĝojigaj promesoj.

Insistaj petoj estas direktataj de la protektantaj genioj de la surteraj popoloj al la Dia Majstro. Multenombraj kunvenoj okazas kaj kunfratiĝas en la spacoj, en la sferoj pli proksimaj al la Tero. Unu el la plej lumaj disĉiploj de la Kristo malsupreniris sur nian planedon, konsciante pri sia konsola misio, kaj du monatojn antaŭ ol Napoleono Bonaparto konsekris sin imperiestro, devigante la papon Pio VII lin kroni en la preĝejo Notre Dame, en Parizo, naskiĝis Allan Kardec, en la 3a de Oktobro 1804, kun la misio malfermi vojon al la Spiritismo, la granda voĉo de la Konsolanto promesita al la mondo de la favorkoreco de Jesuo Kristo.

---

<sup>(\*)</sup> La lastan nomon legu **Kardek**. – **La Trad.**



## XXIII

### LA XIX JARCENTO

#### **Post la revolucio**

Post kiam Napoleono estis forigita for de la politikaj movadoj en Eŭropo, la Kongreso de Vieno de 1815 faris la plej vastajn disponojn por la reapero de la eŭropaj popoloj.

La diplomatio okazigas memorindajn farojn, profitante la dolorajn spertojn el tiuj jaroj da ekstermado kaj revolucio.

Ludoviko XVIII, grafo de Provenco, frato de Ludoviko XVI estas rekondukita sur la francan tronon, kaj restariĝis en tiu sama tempo, malnovaj dinastioj. De la granda inventaro profitis ankaŭ la Eklezio, al kiu oni redonis la Ŝtatojn, kie ĝi fondis sian pereeman regnon.

Paciga blovo reanimas tiujn kolektivojn lackonsumitajn de la fratmurda batalo, ebligante la nerektan inter-

venon de la nevideblaj fortoj en la landan rekonstruadon de la grandaj popoloj.

Sed multaj reformoj realiĝis post la sangaj okazaĵoj komencitaj en 1789. Precipe en Francujo, tiaj renovigoj estis pli vastaj kaj multenombraj. Krom tio, ke la regado de Ludoviko XVIII helpis sin per la angla sistemo, pluraj liberalaj principoj de la Revolucio estis adoptitaj, kiaj la egaleco de la civitanoj antaŭ la leĝo, la libereco de kultoj, kaj stariĝis flanke de ĉiuj politikaj kaj sociaj konkeroj ia reĝimo de individua respondeco en la meĥanismo de ĉiuj departementoj de la Ŝtato. La Eklezio mem, al kutimiĝinta al ĉiaj arbitroj, en sia dogma mieno, rekonis la limigon de siaj povoj ĉe la popolamasoj, rezignaciante pri la nova situacio.

### **Politika sendependeco de Ameriko**

La plimulto de la popoloj el nia planedo, akompanante la sinsekvojn de la okazaĵoj, provis elimini la lastajn vestiĝojn de absolutismo de la tronoj, alproksimiĝante al la respublikaj idealoj aŭ starigante la konstitucian reĝimon kun limigo de povoj de la suverenoj.

Ameriko, destinita ricevi la sanktajn spertojn de Eŭropo, por la estonta civilizacio, penas apliki la grandajn principojn de la francaj filozofoj al sia politika vivo, irante al la plej perfekta emenciĝo. Sekvante la ekzemplon de la anglaj kolonioj, la kvar vicreĝoj de Hispanujo provas lukti por sia sendependeco. En Meksikio la patriotoj ne toleras alian suverenecon, krom la propra, kaj en la Sudo, per agado de Bolivar kaj decidoj de la Kongreso de Tukumano en 1816 oni proklamis la politikan liberecon de Sud-Ameriko. Brazilo en 1822, pere de Petro I, aŭdigis sian krion de emancipiĝo, kaj ni devas rimarki la klopodon de la nevidebla mondo por teni ĝian teritorian integrecon, kiam la tuta suda regiono de la kontinento disdividiĝis en malgrandajn respublikojn, atentante la mision de la brazila popolo en la civilizacio de la estonteco.

## Allan Kardec kaj liaj kunlaborantoj

La XIX jarcento prezentadis al la mondo torenton da lumoj, preparantaj ĉiujn landojn por la utilaj kaj altvaloraj reformoj.

La sanktaj lecionoj de la Spiritismo estis aŭdotaj de la suferanta Homaro. Jesuo, laŭ sia grandanimeco, dispartigos la sanktan panon de espero kaj kredo kun ĉiuj koroj.

Sed Allan Kardec, en sia klariga kaj konsola misio, estis akompanata de plejado da kunuloj kaj kunlaborantoj, kies regenera ago manifestiĝos ne nur ĉe la doktrinaj problemoj, sed ankaŭ sur ĉiuj kampoj de la intelekta aktiveco en la XIX jarcento. La Scienco en tiu tempo altigas siajn suverenajn flugojn, kiuj kondukos ĝin sur la kulminojn de la XX jarcento.

La progreso de la presarto sukcesas interesi ĉiujn nukleojn de homa laboro, kaj fondiĝas cirkulantaj bibliotekoj, revuoj kaj multenombraj ĵurnaloj. La komunikofacileco per telegrafio kaj fervojoj estigas la rektan interŝanĝon inter popoloj. La literaturo pleniĝas de notindaj kaj senmortaj esprimoj. La laboratorio definitive apartiĝas de la sakristio, pliigante la komfortaĵojn de la civilizacio. Konstruiĝas la kolonpilo, eltroviĝas la magneta induko, aperas telefono kaj fonografo. Aperas la unuaj sulkoj sur la kampo de la senfadena telegrafio, troviĝas la spektra analizo kaj la ero de la fizikaj energioj de la Naturo. Oni studas la atoman teorion kaj la fiziologio ĵetas definitivajn bazojn kun la kompara anatomio. La artoj atestas ian novan vivon. La pentrarto kaj muziko montras rafinitan guston de alta spiriteco.

La ĉiela dono de interŝanĝo inter la videbla kaj nevidebla mondoj venas sur nian planedon, meze en tiu ondo da neesprimeblaj lumoj. Konsolanto de la Homaro, laŭ la promesoj de la Kristo, la Spiritismo venis prilumi la homojn, preparante ilian koron por la perfekta uzo de tiom da riĉaĵoj el la Ĉielo.

## La sociaj sciencoj

La kampo de la filozofio ne restis for de tiu renovigata torento. Aliĝante al la fizikaj sciencoj, la sciencoj de la animo ne toleras la altrudon de la absurdaj dogmoj de la Eklezio. La kristanaj kredoj, turmentataj kaj dividitaj, travivis en siaj temploj ian mortan malpacon. Anstataŭ praktiki tiun fratecon de la Dia Majstro, ili sin donis al ĉiuj sektaj ekscesoj. La Filozofio tiam retirigis en sian transcendan negativismon, aplikante al siaj manifestoj la samajn principojn de la racia kaj materialisma scienco. Ŝopenhaŭro (Schopenhauer) estas elokventa montrado de ĝia pesimismo kaj la teorioj de Spencer kaj de Comte (pr. Kont) klarigas niajn asertojn, malgraŭ la sincereco, kun kiu ili estis ĵetitaj sur la vastan kampon de la ideoj.

La Roma Eklezio estis kulpa pri tiaj devioj. Potencante per fero kaj fajro, konformiĝinte al la estroj en la mondo, ĝi ne klopodis fondi la spiritan imperion de la koroj, en sia akceptema ombro. Ne sekvante la ekzempladon de la Nazaretano, ĝi amasigis neutilajn trezorojn, pliigante la bezonojn de la suferantaj popolamasoj. Ĝi forprenis, anstataŭ doni, tenante la neklercon, anstataŭ disvastigi la lumon de kono.

## La tasko de la misiisto

La tasko de Allan Kardec estis malfacila kaj kompleksa. Li devis reorganizi la ruiniĝintan konstruaĵon de la kredo, rekondukante la civilizacion sur ĝiajn solidajn religiajn bazojn.

Konsidere la mision de konkordo kaj frateco de Ameriko, la nevidebla mondo tie starigis la unuajn tuŝeblajn manifestaĵojn de la spirita mondo, en la fama vilaĝeto Hydesville (pr. Hajdsvil), naskante la plej vastajn agitadojn de opinio. La fajrero venis de la amerikaj regionoj, kiel ankaŭ venis de ili la plifirmigo de la demokratiaj konkeroj.

Eŭropo penas disvastigi la novajn kaj noblajn pensojn, kiuj renkontas la disĉiplon sur lia posteno de preĝo

kaj viglo, pretan elaŭdi la vokojn de la Sinjoro. Multenombraj pli proksimaj kunlaborantoj de lia tasko helpas lian sanktan penadon, disvolvante liajn resumojn en glorigajn kompletigaĵojn. La terглоbo kun siaj sociaj kaj politikaj institucioj atingis periodon de grandiozaj transformiĝoj, kiuj konsumis pli ol jarcenton da doloraj kaj elaĉetaj luktoj, kaj la Spiritismo estos la esenco el tiuj novaj konkeroj, rekondukante la korojn al la mil-da Evangelio de la Kristanismo.

### **Kolektivaj provoj en Francujo**

Ni devas rimarki la dolorajn provojn de Francujo post ĝiaj ekscesoj en la Revolucio kaj dum la napoleon-aj kampanjoj. Post la revolucioj en 1830 kaj 1848, per kiuj efektiviĝis penigaj elpagoj, fare de individuoj kaj de kolektivoj, eksplodas la franca-prusa milito en 1870. La granda latina nacio, pro kaŭzoj nur konataj de la spirita mondo, estis dispremita kaj venkita de la fiera Germanujo de Bismarko, kiu siavice ebria kaj blindigita de la triumfo, estis suferonta la amarajn dolorojn en 1914-1918.

Parizo, ĉeestinta kun ia indiferenteco la dolorojn de la kondamnitoj de la Teroro, irante al la nigraj spektaklojn de la eŝafodo kaj aplaŭdante la subpremantojn, suferas mizeron kaj malsaton en 1870, antaŭ ol fali en la manojn de la senkompataj malamikoj, en la 28a de Januaro 1871. La politikaj altrudoj de la imperiestro Vilhelmo en Versajlo kaj la ĝenerala sufero de la franca popolo en la tagoj de la malvenko, signifas elpagon pro la devioj de la granda latina nacio.

### **Provoj de la Eklezio**

Kiam alproksimiĝas la jaro 1870, kiu signis la falon de la Eklezio per la deklario de la papa neeraremo, tiam la Katolikismo suferas amarajn kaj dolorajn provojn.

Lackonsumite de ĝiaj altrudoj, ĉiuj kleraj popoloj en Eŭropo vidis nenion alian en ĝiaj institucioj, ol religiajn lernejojn, limigante iliajn edukajn celojn kaj kontrolante ilian meĥanismon de aktiveco.

Komprenante, ke la Kristo penis akapari nenian teritorion de la terglobo, la italoj memkompreneble pledis por siaj rajtoj sur la kampo de postuloj, provante organizi tiun unuon de Italujo, sen la protekto de la Vatikano. De 1859 fariĝis la lukto, kiu longe estis nutrata, pro decido de Francujo, kiu tenis tutan armeon en Romo por garantii la pontifikon de la Eklezio. Sed la situacio en 1870 devigis la francan popolon postuli la revenon de la gvardianoj ĉe la Vatikano, kiam triumfis la pensoj de Kavuro (Cavour) kaj la papo seniĝis je ĉiuj materialaj povoj kaj malpliĝis lia materiala posedo.

Komenciĝas detempe de Pio IX la granda leciono de la Eklezio.

La periodo de la grandaj transformiĝoj estis komenciĝinta, kaj ĝi, kiu ĉiam diktis ordonoj al la estroj de la mondo, en sia soifo je regado, estis fariĝonta instrumento de premado en la manoj de la potenculoj.

Oni vidas interesan fenomenon. La Eklezio, neniam memoranta doni reĝan titolon al la figuro de la Kristo, tuj kiam ĝi vidis disfali la tronon de la absolutismo per la venkoj de la Respubliko kaj de la Juro, konstruis la bildon de la Kristo-Reĝo por la supro de siaj altaroj.

## XXIV

### SPIRITISMO KAJ LA GRANDAJ TRANSIĜOJ

#### **Estingiĝo de la sklaveco**

La XIX jarcento karakteriziĝas per siaj multenombraj konkerroj. Kune kun la grandaj fenomenoj de la scienca kaj industria evoluado, kiuj skuis ĝin, oni ankaŭ rimarkas politikajn okazaĵojn de plejgranda graveco, kiuj renovigas la sociajn vidpunktojn de ĉiuj popoloj de la blanka raso.

Unu el tiuj grandaj faktoj estas la estingiĝo de la sklaveco. Plenumante la ordonojn de la Dia Majstro, liaj senditoj el la nevidebla mondo agadas ĉe la administraj kabinetoj, por faciligi la venkon de la libereco.

La decidoj de la Kongreso de Vieno, malaprobantaj la trafikon de liberaj homoj, profunde eĥis en ĉiuj landoj. En 1834 la angla parlamento decidis abolicii la sklavecon en ĉiuj kolonioj de Britujo. En 1850 Brazilo malpermesis la trafikon de afrikaj negroj. Okaze de la

militribelo de 1848 Francujo decidis estingi la sklavecon en siaj teritorioj. En 1861 Aleksandro II de Rusujo deklaras liberaj ĉiujn kamparanojn, kiuj laboradis sub reĝimo de servuteco, kaj de 1861 ĝis 1865 abomena milito ruinigas la gastaman regionon de la Amerikaj Ŝtatoj de la Nordo, dum la lukto por la sekvonta ŝtatregado, kiu finiĝis per la venko de la libereco kaj de la progresemaĵoj de la granda nacio de Ameriko.

### La socialismo

Grandaj ideoj floras en la tiama menso. Tie reaperas la malnovaj doktrinoj pri absoluta egaleco. Aperas socialismo, proponanta radikalajn kaj tujajn reformojn. Kelkaj idealistoj aludas al la Utopio de Tomaso Morus aŭ al la perfekta Respubliko laŭ Platono. Fondiĝas aliancoj por anarkio, la societoj kun universala karaktero. La sociologia revolucio kun neantaŭvideblaj sekvoj minacas la stabilecon de la civilizacio mem, kondamnante ĝin al la plej kompleta detruigo.

La ĵus pasinta jarcento estas la scenejo de tiuj sengloraj luktoj. Ĉiuj socialaj sciencoj estas vokataj al la grandaj debatoj, efektiviĝintaj inter kapitalismo kaj laboro. Kie do troviĝas la moralaj fortoj, kapablaj realigi la grandan miraklon prilumi ĉiujn spiritojn? La Roma Eklezio, nutrinta la okcidentan civilizacion, ekde ĝia lulilo, estis danke la cirkonstancojn la institucio indikita por solvi la grandan problemon.

Sed post la deklaroj en la Silabo (\*) kaj post la fama diskurso de la episkopo Strossmayer (pr. Štrosmaer) en 1870, en la Vatikano, kiam Pio IX dekretis la pontifikan neeraremon, tia solvo fariĝis malfacila al la Eklezio. Sed Leono XIII venis kun la encikliko “Rerum Novarum” sur la kampon de lukto, provante estigi la harmonion inter laboro kaj kapitalo, al ĉiu el ili indikante la plej sanktajn devojn. Se la efiko de tiu dokumento havis konsiderindan gravecon por la klasoj plej kleraj

---

(\*) Listo de eraroj kondamnitaj de papo. – **La Trad.**



de la Malnova kaj Nova Mondo, ĝi tamen nenion helpis ĉe la klasoj plej malfavoritaj, jam saturitaj de vortoj.

### **Restarigante la veron**

Tiel la Spiritismo venis en la psikologia horo de la grandaj transformiĝoj, kuraĝigante la homan spiriton, ke ne perdiĝu la sankta frukto de ĉiuj, kiuj laboris kaj suferis ĉe la peniga klopodo de la civilizacio. Ree semante la eternajn instruojn de la Kristo en la koron de la homoj, ĝi per pruvoj de postvivado, restarigis la Kristanisman, kiun la Eklezio falsis. Per la veraĵoj de reen-karniĝo ĝi eksplikis la absurdon de la teorioj pri absoluta egaleco, kunlaborante por restarigo de la vera vojo de la homa progreso. Metante la Socialismon en la kadr-on de la kristanaj principoj, ĝi ne iluzias sin per la eksteraj reformoj, por veni al konkludo, ke la sola valora renovigo estas tiu de la interna homo, vivanta ĉelo de la socia organismo de ĉiuj tempoj, luktante por intensigi la edukajn movadojn de la homo, laŭ la eterna lumo de la Evangelio de la Kristo. Instruante la leĝojn de la kompensoj sur la vojo de saviĝo kaj de la individua kaj kolektiva provoj, ĝi starigas reĝimon de respondeco, en kiu ĉiu spirito devas riĉigi la provizon de siaj propraj valoroj. Ĝi ne eraras pri utopioj de la absoluta egaleco, pro la konoj de la leĝo de klopodo kaj de la individua laboro, kaj ĝi ne aliĝas en instrumenton de premado ĉe la magnatoj de ekonomio kaj povo, konsciante la devojn de la homa solidareco. Indiferenta por ĉiuj revolucioj, ĉar nur la evoluado estas ĝia kampo de aktiveco kaj spertado, for de ĉiuj militoj pro kompreno de la fratecaj ligiloj, reunuigantaj la universalan socion, ĝi instruas la puran fratecon al la homoj kaj al la patrolandoj, al la familioj kaj al la grupoj, pliiĝante la vidpunktojn de la ekonomika justeco kaj korektante la spiriton ekscititan de la ekstremismaj ideologioj.

En ĉi tiuj doloraj tempoj, kiam la plej penigaj transiĝoj sin prezentis al la homa spirito, nur la Spiritismo povas reprezenti tiun moralan valoron, kie trov-

iĝas la necesa apogo por konstruado de la estonteco. Dum la utopiistoj de la ekstera reformo sin donas al la protekto de la senkompataj diktatoroj, kiaj tiuj de la Rusujo kaj Germanujo, en iliaj nigraj revoluciaj aventuroj, ĝi, la Spiritismo, daŭrigas sian edukan laboron ĉe la intelektaj klasoj kaj ĉe la sennomaj kaj suferantaj amasoj, preparante la morgaŭan mondon per la senmortaj lumoj de la leciono de la Kristo.

### **Dekadenco de la Katolika Eklezio**

De 1870, jaro signinta por la homo la dekadencan de la Eklezio, pro ĝia defalo de la plenumado de la grandaj devoj al ĝi konfeditaj de la Sinjoro, en la apostolaj tempoj, iu periodo de profundaj transiĝoj markas ĉiujn homajn aktivecojn.

La mondo vane atendis la kristanajn verkojn komencitajn en la imperio de Konstanteno. Aliĝinte al la Ŝtato kaj vivante ĉe la tablo de ĝiaj ekonomikaj interesoj, la Eklezio zorgis nenion alian ol sian pereeman regnon. Forgesinte Dion, ĝi neniam penis alniveligi la evoluon de la fizika homo al tiu de la spirita homo, sin katenante al malaltaj kaj malŝatindaj interesoj de la pasema politiko. Tial nun ŝvebas sur ĝia frunto la plej nigraj profetaĵoj.

### **Renovigaj luktoj**

La XX jarcento aperis sur la horizonto de la terglobo, kvazaŭ ampleksa areno por renovigaj luktoj. La sociaj teorioj daŭrigas sian vojon, multfoje atingante la danĝeran kurbon de la ekstremismo, sed la revelacioj de la transmondo malsupreniras al la animoj, kvazaŭ nemateria roso, preparante la pacon kaj lumon de iu nova erao.

Multenombraj transformiĝoj estas atendataj kaj la Spiritismo prilumas la korojn, rebonigante la spiritan memecon de la homoj por la alproksimiĝanta estonteco.

La rusoj-japanaj militoj kaj la eŭropa de 1914-1918 estis komencoj de pli granda batalo, kiu ne longe

malfruos, kiam nia planedo forpelos ĉiujn Spiritojn ri-belemajn kaj ŝtoniĝintajn en la krimado, kiuj ne sciis uzi la donon de la multenombraj jarmiloj, en la sankta posedaĵo de la tempo.

Tiam la Tero, same kiel tiu fora mondo de Kapelo, liberiĝos de la estuloj, malmoliĝintaj en malbono, ĉar, la homo samtempa de la radiotelefonio kaj de la trans-atlantikaj vojaĝoj bezonas animon kaj senton por ne perversigi la sanktajn akirojn de la progreso. Restados en la mondo tiuj, kiuj povos kompreni la lecionon de amo kaj frateco sub la egido de Jesuo, kies favorkoreco estas la fonto de vivo kaj lumo, ekde la komenco.

De la unuaj jaroj de ĉi tiu jarcento, periodo da amaraj luktoj, la milito konstante loĝis en preskaŭ ĉiuj regionoj de nia planedo. La Ligo de Nacioj, la Traktato de Versajlo kaj ankaŭ la paktoj por sekureco de la paco estas nenio alia ol fenomenoj de la milito mem, kiuj nur elfiniĝos post la apogeo de tiuj fratmurdaĵaj bataloj, en la proceso de fina selekto de la spiritaĵoj esprimoj de la surtera vivo.

### Ameriko kaj la estonteco

Kvankam devigite partopreni en la proksimaj luktoj (\*), pro determinismo de la cirkonstancoj de sia politika vivo, Ameriko estas destinita ricevi la sceptron de la civilizacio kaj de la kulturo, en la orientado de la estontaj popoloj.

Ĉirkaŭ ĝiaj ekonomikaj provizejoj kolektiĝos la eŭropaj spertoj, profitante la penigan klopodon de tiuj, kiuj falis en la verko de la civilizacio de Okcidento por edifado de la spirita homo, kiu ja devos esti supera ol la karna homo de nia planedo, rilate la plenan konon pri la grandaj problemoj pri la esto kaj destino.

Por tiu grandioza aspiro, la spirita mondo sin preparas por klarigado de la noblaj kontinentaj devoj. La

---

(\*) Ni rimarku, ke ĉi tiu libro estis skribita en 1938, unu jaro antaŭ la eksplodo de la Dua Grand-Milito. – **La Trad.**

sincera klopodo de kunhelpo en la laboro kaj de konstruado de la paco ne estas tie ia utopio, kiel en Eŭropo saturita de multejarentaj prijuĝoj.

### Jesuo

Ekzistas en la mondo iu neniam vidita movado por armiĝoj kaj municioj. Ĉu ĝi do komenciĝis en ĉi tiu momento? Ne. La konkuro en armiĝado de la XX jarcento komenciĝis antaŭ la batalo ĉe Porto-Arturo (\*) en 1904. La militaj industrioj atingas neantaŭviditajn kulminojn. La kampoj restas sen homoj. La homoj iris sur la zonojn de trupkoncentrado, atendante la malamikon, ne sciante, ke ilia kontraŭulo estas en ilia spirito mem. Eŭropo kaj Oriento estas vasta kampo de agresado kaj terorismo, esceptinte la Demokratiajn Respublikojn, kiuj vidas sin devigitaj efektiviĝi grandajn programojn de rearmiĝado, antaŭ la Moloko (\*\*) de la ekstremismo. Kie do la moralaj valoroj de la Homaro? La eklezioj estas silentaj pro ekonomikaj kaj politikaj cirkonstancoj. Nur la Spiritismo, malhavante ĉiujn surterajn garanti-  
ojn, faras la grandegan klopodon teni lumanta la lampon de la fido, en tiu delikata barko de homo senscia pri sia glora destino, barko provanta reveni al la fluoj de forto kaj perforto, for de la prilumitaj regionoj de la Racio, de la Kulturo kaj de la Juro.

Estas grave rimarki, ke la klopodo de la Spiritismo preskaŭ superas siajn proprajn fortojn, sed la mondo ne estas je la dispono de la surteraj diktatoroj. Jesuo estas ĝia sola direktoro sur la kampo de la senmortaj realaĵoj, kaj nun, kiam la mondo sin donas al ĉiaj angoraj atendoj, la spacoj pli proksimaj al la Tero moviĝas favore por la restarigo de la vero kaj de la paco, por iu nova erao.

---

(\*) Nun "Ljuŝun". – **La Trad.**

(\*\*) "Moloch", idolo de la amonidoj, al kiu oni horore oferis la unuenaskitojn, ĉi tiujn ĵetante sur ardantajn karbojn. – **La Trad.**

Abnegaciaj kaj prilumitaj Spiritoj parolas al ni pri ia baldaŭa kunveno de la societo de la anĝelaj estuloj de la suna sistemo, de kiu Jesuo estas unu el la diaj membroj. Ree kunvenos tiu ĉiela societo, je la tria fojo, en la surtera atmosfero, de kiam Kristo ricevis la sanktan mision subteni kaj savi nian Homaron, plian fojon decidante pri la destinoj de nia mondo.

Kio do rezultos el tiu renkontiĝo de Anĝeloj de la Senfino? Dio ĝin scias.

En la grandaj transiĝoj de la forpasanta jarcento, ni fidu liajn amon kaj favorkorecon.

## XXV

### LA EVANGELIO KAJ LA ESTONTECO

Modesta resumo de la Historio igas nin duonvidi la eternajn fadenojn, kiuj ligas ĉiujn generaciojn en la evoluaj periodoj de niaj planedo.

La scenejo de la civilizacioj multfoje estis ŝanĝita, kaj ĝiaj dekoracioj ricevis profundajn renovigojn, sed la aktoroj estas la samaj, irante en la purigaj luktoj direkte al la perfekteco de Tiu, kiu estas la Lumo, ekde la komenco.

La unuajn tempojn de la Homaro, la surtera homo estis nature kondukita al la eksteraj laboroj, glatigante la vojon de la naturo por la solvo de la problemo de la vivo, sed estis tempo, kiam lia spirita plenaĝeco estis proklamita de la saĝeco de Grekujo kaj de la romanaj organizoj.

En tiu tempo, la veno de la Kristo sur nian planedon signus la plej grandan eventon por la mondo, ĉar la Evangelio estus la eterna mesaĝo de la Ĉielo, ligante la

Teron kun la lumplena regno de Jesuo, en la okazo de ĝia asimilado fare de la spirita homo, rilate ĝiajn diajn instruojn. Sed la pureco de la Kristanismo ne sukcesis resti senmakula, tuj kiam revenis en la nevideblan mondon la helpantoj de la Sinjoro, reenkarneigintaj sur la terglobo por glorigo de la apostolaj tempoj.

La sieĝo de la mallumo ekposedis la koron de la homoj.

Tri jarcentoj post la sanktigaj instruoj de Jesuo, aperis falso kaj perfido, adaptiĝante al la intereso de la politikaj povoj, tordante ĉiujn liajn principojn favore por la doktrinoj de la oficialigita perforto.

La Dia Majstro vane sendis siajn misiistojn kaj plej karajn disĉiplojn al la medio de la surteraj luktoj. Kiam ili ne estis barbare mortigitaj de la krimaj popolamasoj aŭ de turmentistoj de konsciencoj, tiam ili estis devigitaj kapitulaci antaŭ la neklereco, atendente la foran juĝon de la posteularo.

De tiu tempo, kiam la evangelia mesaĝo vastigadis la sferon de la homa libereco, pro sia matureco kompreni la belajn kaj konsolajn veraĵojn de la ekzistado, la spirita homo haltas sur siaj ŝtupoj de progreso, nekapabla akompani la karnan homon en ties irado sur la vojoj de kono.

Ĝuste tial, en la tempo de grandegaj aviadiloj kaj de la radiotelefonio, ligantaj ĉiujn kontinentojn kaj landojn de la nuneco, indikantaj la imperativojn de la leĝoj de homa solidareco, ni vidas la koncepton pri civilizacio insultatan de ĉiuj izolismaj doktrinoj, dum la popoloj sin preparas por ekstermado kaj detruado. Ankoraŭ ĝuste tial, en la nomo de la Evangelio oni faras ĉiajn absurdojn en la tiel nomataj kristanaj landoj.

Estas vero, ke la okcidenta civilizacio eĉ ne kristaniĝis. En Francujo oni havas gilotinson, en Anglujo pendingon, en Germanujo hakilon kaj en Ameriko mem, lando de frateco kaj konkordo, la elektran seĝon, kaj ni menciis sole nur la supercivilizitajn naciojn de nia planedo. Ĉu Italujo ne efektivigis sian agreson kontraŭ Abisenujo en la nomo de la kristana civilizacio de Okci-

dento? Ĉu la italaj pastroj ne benis la kanonojn kaj la konkerajn mitralojn en la nomo de la Evangelio? En la nomo de la Kristo oni disemis dum ĉi tiuj dudek jarcentoj ĉiajn malpacojn kaj ĉiajn amaraĵojn en la mondo.

Sed estas veninta la tempo de reĝustigo de ĉiuj homaj valoroj. Kiam la doloraj kolektivaj elaĉetoj anoncas la periodon de la lastaj “ĝemoj” de la Apokalipso, tiam la spirita mondo devas penetri en la organizojn de la karna homo, ilin kondukante por la bono de la tuta Homaro.

La Spiritismo, en sia misio de Konsolanto, estas la subteno de la mondo en ĉi tiu jarcento da devioj, de ĝia Historio; nur ĝi en sia mieno de reviviĝinta Kristanismo povas savi la religiojn, malaperantajn inter la ekbatoj de forto kaj ambicio, de egoismo kaj superregado, indikante al la homo ties verajn vojojn. El ĝia torento da klarigoj oni povas trinki la kristalklaran akvon de konsolantaj veraĵoj de la Ĉielo, kaj la animoj sin preparas por la nova erao. Estas venintaj la tempoj, kiam la fortoj de malbono estas devigitaj forlasi siajn lastajn poziciojn de superregado en la surteraj medioj, kaj iliaj lastaj triumfoj estas vere la signo de ia kuraĝa kaj malfeliĉa reago, akcelanta la realigon de la nigraj profetaĵoj, pezantaj sur ilia pereema imperio.

Diktatoroj, armeoj, ekonomikaj hegemonioj, ŝanĝiĝemaj kaj senkonsciaj popolamasoj, negloraj militoj, jarcentaj organizoj forpasos, kiel ĉagreno de premsonĝo.

La venko de la forto estas heleco de artfajraĵo.

La tuta realaĵo estas tiu de la Spirito kaj la tuta paco estas tiu el kompreno de la regno de Dio kaj el ties justeco.

La forpasanta jarcento efektivigos la dividon de la ŝafoj de la grandega grego. La bastono de la paŝtisto kondukos la suferon en la peniga tasko de selekto kaj la doloro plenumos la laboron, kiun la homoj ne akceptis kun amo.

Tempesto da amaraĵoj balaos la tutan Teron. La filoj de la Jerusalemo de ĉiuj jarcentoj devas plori,



rigardante la pluvon da larmoj kaj sango, kiu ekfalos el la pezaj nuboj de siaj nigraj konsciencoj.

Kondamnite de la nenuligeblaj verdiktoj de siaj sociaj kaj politikaj eraroj, la eŭropa supereco malaperos por ĉiam, kiel la Roma Imperio, transdonante al Ameriko la frukton de siaj spertoj, por la estonta civilizacio.

Nun, sur la Tero, oni travivas krepuskon, kiun sekvas profunda nokto; kaj la XX jarcenton koncernas la misio elfini tiujn terurajn okazaĵojn.

Sed, estante humilaj laborantoj de la Kristo, ni aŭdu lian voĉon en la interno de nia animo:

*“Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo! Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos! Feliĉaj estas la plorantaj, ĉar ili konsoliĝos! Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj!”<sup>(\*)</sup>*

Jes, ĉar post mallumo venos aŭroro. Konsolaj lumoj envolvos la tutan terglobon rebonigitan de la bapto de sufero. La spirita homo estos unuigita al la karna homo por la glora irado en la Senlimo, kaj la Spiritismo estos eltirinta el sub iliaj ruboj la dian animon de la religioj, kiujn la homoj perversigis, ilin ligante en la akceptema brakumo de la Kristanismo restarigita.

Ni laboru por Jesuo, eĉ kiam nia laborejo estu lokita en la dezerto de la konsciencoj.

Ni ĉiuj estas vokitaj al la granda tasko kaj nia plej alta devo estas respondi al la invito de la Elektito.

Rememorante la bildojn de la Historio de la mondo ni sentas tranĉantan malvarmon en ĉi tiu dolora krepusko de la okcidenta civilizacio. Ni memoru la favorkorecon de la Patro kaj ni faru niajn preĝojn. La nokto baldaŭ venos kaj meze en ĝia densa mallumo, ni ne forgesu

---

<sup>(\*)</sup> Mateo, 5:3, 6, 4 kaj 9. – **La trad.**

Jesuon, kies senfina kompatemo estos, kiel ĉiam, la senmorta heleco de la estonta matenruĝo el paco, frateco kaj savo.

## Konkludo

Miaj amikoj, Dio donu al vi multe da paco.

Mi dankas vian kunlaboradon ĉe tiu ĉi plia humila klopodo de nia grupo por disvastigi la grandajn principojn de la evangelia Spiritismo, kiel ankaŭ la dian favorkorecon por la benata okazo, kiu estis al ni konsentita. Dum nia modesta studo de la Historio unu sola celo orientadis nian laboron – nome elmontri la sanktan influon de la Kristo ĉe la organizado de ĉiuj progresoj de la civilizacio de nia planedo, ekde ĝia geologia formado.

Nia kontribuo povas peki kontraŭ la normo pro ekscesa resumo, sed ni ne pensis fari plian aŭtopsion de la Historio de la Terglobo en ĝiaj sociaj kaj politikaj esprimoj, kaj nur montri ankoraŭ unu fojon la mistikajn fortojn, kiuj regas la centrojn de la homa progreso, en ĉiuj ĝiaj apartaĵoj.

Mi sentas min feliĉa pro via sindona kaj amika kunlaborado. Iun tagon Dio konsentos al mi la ĝojon paroli pri la ligiloj nin kunigantaj de tre foraj tempoj,

ĉar ne sen motivo ni troviĝas kunvenintaj kaj kunfratigitaj en la samaj laboro kaj idealo.

Mi ĉi tie renovigas mian kortuŝitan kaj sinceran dankon.

Kiam, tie ekstere, la mondo sin preparas por la luktoj pli doloraj kaj pli krudaj, ni devas danki Jesuon por la feliĉo, ke ni estas pace en nia laborejo, sub la egido de lia dia amo. Mi promesas verki eseon kun romana formo, kiel eble plej baldaŭ (\*). Dio permesos, ke ni estu feliĉaj. Mi ĝin tiel esperas, ĉar mi ne dubas pri lia senfina favorkoreco.

Dio vin gvidu kaj benu, tenante la sanktan trankvilecon de viaj hejmoj kaj koroj.

EMMANUEL.

(Mesaĝo ricevita en 21-9-1938.)

---

(\*) Emanuelo aludas al la “romano” pri sia vivo de roma patricio kaj de delegito en Judujo, en la tempo de la Kristo, libro jam elfinita kaj publikigita en du volumoj, nome “Antaŭ du mil jaroj...” kaj “50 jaroj poste”. – **La Eldonistoj**.